


INTERNACIA  
FERVOJISTA  
ESPERANTO-  
FEDERACIO



# HISTORIO

1909  
1984



*G. GIMELLI '87*

**INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO**

# **HISTORIO**

**1909-1984**

Historia Retrorigardo  
eldonita 1984  
okaze de la 75jara jubileo  
de la fervojista Esperanto-Movado

*La busto de d-ro L. L. Zamenhof estas kreita de Barbara Tribe (1965) en Stoke-on-Trent (GB) 2.1(f)*

# ENHAVO

Antaŭparolo	3
Mallongigoj uzitaj en la broŝuro	4
Ia Sekcio Internacia Movado	
1a ĉapitro Epoko 1908 – 1919	6
2a ĉapitro Epoko 1920 – 1945	9
3a ĉapitro Epoko 1945 – 1984	16
4a ĉapitro Funkciuloj de la Fervojista Movado	
Ĉiuj estraranoj de 1909 ĝis 1984	34
Honoritoj flanke de IFEF kaj FISAIC	36
La ĝisnunaj IFEF-prezidantoj	37
5a ĉapitro La Internacia Organo	38
6a ĉapitro IFEF-junularo kaj -skisemajnoj	40
7a ĉapitro Fakaj Komisionoj kaj prelegoj	
Terminara Komisiono	42
Fakprelega Komisiono	46
Tabelo de fakaj prelegoj kaj ekskursoj	48
8a ĉapitro Esperanto ĉe la Fervojoj	
Esperanto en horaroj	55
Esperanto en varbiloj kaj informiloj	56
9a ĉapitro Ni kaj FISAIC	58
Iia Sekcio Landaj Asocioj	
Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio	60
Belga Esperanto Fervojista Asocio	61
Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj	62
Fervojista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio	62
Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio	63
Dana Esperantista Fervojista Asocio	64
Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj	65
Franca Fervojista Esperanto-Asocio	66
Germana Esperanta Fervojista Asocio	68
Hispana Esperanto Fervojista Asocio	70
Fervojista Fakoj de Hungara Esperanto-Asocio	71
Itala Fervojista Esperanto-Asocio	72
Japana Esperantista Ligo Fervojista	73
Jugoslavia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj	74
Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda	75
Norvega Esperanta Fervojista Asocio	76
Landa Fervojista Sekcio de Pola Esperanto-Asocio	77
Sveda Esperanta Fervojista Asocio	77
Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj	78
La ĝisnunaj IFEF-kongresoj	79
Organiza skemo	80
Aneksaĵo	
Kunmetaĵo de la ĝisnunaj IFEF-kongresinsignoj kaj de la plej multaj kongreslibroj	

## ANTAŬPAROLADO

Preskaŭ cent jarojn la Internacia Lingvo ekzistas. Kaj en tiu jarcento la fervojistoj dum 75 jaroj ludis gravan rolon, por realigi la ideojn de d-ro Ludoviko Zamenhof, kreinto de la lingvo.

Ne multaj profesiuloj tiom klare estas destinitaj sekvi tiajn celojn kiel ĝuste la fervojistoj. Pro tio ni opinias, ke estas tempo, krei por la generacioj post ni koncizan kompilaĵon, kiu ĉefe baziĝas sur protokoloj kaj oficialaj raportoj kaj pro tio havos dokumentan valoron, sen tion ni esperas - fariĝi enuiga legaĵo. Ĝi iru nun okaze de la 75jara jubileo de IFEF al ties membroj kaj al ĉiuj homoj, kiuj interesiĝas pri la agado de la fervojistoj esperantistaj. Intence la Historio-Komisiono de IFEF malmulte utiligis la kajeron "Historio de la Fervojista Esperanto-Movado 1908-1968". Ĝin ni konsideras kiel esencan kontribuon samdirektan. Ili ambaŭ kompletigu unu la alian. La komisiono dum jaroj kolektis abundan materialon, el kiu kristaliĝis la nun aperanta broŝuro. Ĉi-loke mi deziras danki al la membroj de la Komisiono, kiuj prefere helpis en la planado kaj kolektado. Estis Germaine Lemonnier (F), Ingvard Kensing (DK) kaj Gvozden Sredić (YU). Precipe mi dankas al Johanna Gössl (A), kiu transprenis post malsaniĝo de Ingvard Kensing la sekretariajn taskojn kaj la tajpadon, kaj al Jaap Labordus (NL), kiu dekomence kontribuis siajn valoregajn konsilojn, kaj kiu korektis kaj reviziis la tekstojn. Dankon ankaŭ al Gianluigi Gimelli (I), kiu desegnis la titolpaĝon kaj al Gernot Ritterspach (D) pro la fotomuntaĵoj kaj multaj konsiloj kaj helpado. Dankon nelaste al ĉiuj, kiuj per alsendo de materialo, fotoj kaj monoferoj kunhelpis, ke tiu ĉi broŝuro povas aperi en belaspekta formo.

La disponebla spaco malpermesis trakti multon, kio valorus esti traktata, malhelpis mencii multe da personoj, kiuj estus meritintaj mencion. Ilin ni petas ne grumbli. Ĝuste tia dokumento pravas, ke la sekreto por la vivo de niaj lingvo kaj movado troviĝas en la sindona agado de generacioj da sennomuloj. Por ili tiu modesta libreto estu monumento kaj danko. Por ni ĝi estu modelo, instigo kaj komisio.

Por la Historio-Komisiono de IFEF Joachim Giessner

# MALLONGIGOJ

uzitaj en la Historio-Broŝuro

AFEF	Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio
BAEF	Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj
BEFA	Belga Esperanto Fervojista Asocio
BSO	poste BSSO
BSSO	Nederlanda sekcio de FISAIC kaj USIC
BSW	Sociala organizo de la Germana Federacia Fervojo
CIM	Internacia Konvencio pri la Fervoja Vartransporto
CIV	Internacia Konvencio pri la Fervoja Pasaĝer- kaj Pakajtrafiko
ĈSD	Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj
ĈK	ĉefkomitatano
DB	Germana Federacia Fervojo
DEFA	Dana Esperantista Fervojista Asocio
DJIF	Dana sekcio de FISAIC
DSB	Danaj Ŝtataj Fervojoj
EAF	Esperanto-Asocio de Finnlando
EFG	Esperanto-Filmo-Germanujo
ESFF	Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj
FE	Fervoja Esperantisto
FERN	Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda
FFEA	Franca Fervojista Esperanto-Asocio
FIRAC	Internacia Federacio de Radioamatoraj Fervojistoj
FISAIC	Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj
FK	Fakprelega Komisiono
GEFA	Germana Esperanta Fervojista Asocio
GEA	Germana Esperanto-Asocio
HEFA	Hispana Esperanto Fervojista Asocio
HFM	Hungara Fervojista Mondo
HPK	Honora Patrona Komitato
IAEF	Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj
IEMW	Internacia Esperanto-Muzeo Wien
IF	Internacia Fervojisto
IFEA	Itala Fervojista Esperanto-Asocio
IFEF	Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
IFES	Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno
IFETT	Internacia Federacio de Esperantistaj Trafik- kaj Transport-laboristoj
IKK	Internacia Kunordiga Komitato
ILEPTT	Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomunikoj kaj Transportoj
ISAE	Internacia Scienca Asocio Esperantista
ISU	Internacia Somera Universitato
ITF	Internacia Transportlaborista Federacio
JAFE	Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj
JELF	Japana Esperantista Ligo Fervojista
JŽ	Jugoslaviaj Fervojoj
Kĉ	Ĉeĥoslovaka krono
K-go	kolego
K-ano	Komitatano
l.a.	landa asocio
LG	Leksikono Ĝenerala (fervoja, de UIC)

LIF	La Internacia Fervojisto
LKK	Loka Kongresa Komitato
LTF	Leksikono Fervoja Teknika
MÁV	Hungaraj Ŝtataj Fervojoj
NEFA	Norvega Esperanta Fervojista Asocio
NEL	Norvega Esperanto-Ligo
NS	Nederlandaj Fervojoj
NSB	Norvegaj Ŝtataj Fervojoj
ÖBB	Aŭstria Federaciaj Fervojoj
PEA	Pola Esperanto-Asocio
PFEF	Pola Fervojista Esperanto-Fakgrupo
PIV	Plena Ilustrita Vortaro
RENFE	Hispanaj Ŝtataj Fervojoj
SAEF	Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
Sc	Spescento
Sm	Spesmilo
SJ	Svedaj Ŝtataj Fervojoj
SEFA	Sveda Esperanta Fervojista Asocio
SNCF	Francaj Ŝtataj Fervojoj
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TELF	Tutmonda Esperantista Fervojista Ligo
TK	Terminara Komisiono
UAICF	Franca Sekcio de FISAIC
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UIC	Internacia Unuiĝo de la Fervojoj
UK	Universala Kongreso (de UEA)
UNESKO	Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Sciencoj kaj Kulturo
UNFEG	Unua Nederlanda Fervojista Esperanto-Grupo
UNO	Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj
USIC	Internacia Sporta Organizo de Fervojistoj

-----

A	Aŭstrio	F	Francio	NL	Nederlando
Aus	Aŭstralio	GB	Granda Britio	P	Portugalio
B	Belgio	GR	Grekio	PL	Pollando
BG	Bulgario	H	Hungario	R	Rumanio
CH	Svisio	I	Italio	S	Svedio
CS	Ĉeĥoslovakio	IL	Israelo	SF	Finnlando
D	Germanio (FR)	J	Japanio	SYR	Sirio
DK	Danio	L	Luksemburgio	YU	Jugoslavio
E	Hispanio	N	Norvegio		

# I-a Sekcio

## Internacia Movado

### 1-a ĉapitro

#### Periodo ĝis 1919

Por esti ekzaktaj, ni devas komenci en 1898. Tiam aperis en la hungara faka revuo "Vasuti Lapok" artikolo de kolego Lajos Jakab kun titolo "Mondlingvo ĉe la fervojoj" kaj unu semajnon poste suffice detala gramatiko de Esperanto kun kelkaj frazoj. Tio estas pruvo, kiel frue jam fervojistoj ekkonis la valoron de la Internacia Lingvo kaj propagandis ĝin. Pli poste, en 1907, aperis la unuaj nomoj de fervojistoj kiel partoprenantoj de la 2-a Germana Esperanto-kongreso. Sed ne nur temis pri personoj el Germanio, sed ankaŭ el Aŭstrio, Francio kaj Svisio. Krome oni povis legi pri kursoj, eĉ favorigoj flanke de fervojaj kompanioj. La unuan decidan paŝon tamen faris la franca fervojisto Armand Berlande. Li aperigis alvokon en "Esperanto" (Marto 1909), kiun ni publikigas, ĉar el ĝi ekgermis nia internacia faka movado:

"Mi estas fervojisto kaj Esperantiano. Mi opinias, ke la kunligo de la esperantistaj fervojistoj, kiaj ajn ili estas, estus utila por nia afero kaj, ke en la Barcelona kongreso oni povus aranĝi fakan kunvenon por krei tian ligon. Sed antaŭ ĉio estus bone kalkuli la fervojistojn, kiuj konas Esperanton. Mi do proponas, ke ĉiu el ili sendu poŝtkarton ordinaran (kun certaj indikoj, la red.). Oni klasifikos ilin, kaj oni povos presi specialan nomaron tre taŭgan por la vojaĝantoj. Tiu nomaro aperus en la Oficiala Jarlibro de UEA, se la oficistoj estas Esperantianoj, kiel dezirinde."

Kaŭze de tiu alvoko poste eblis fondi la unuiĝon "Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj" (IAEF) la 7an de Septembro 1909. Tio okazis en la 5a Universala Kongreso de Barcelona. Ĉeestis 11 fervojistoj, inter kiuj anglo, aŭstro, dano, francoj, germanoj, ruso (polo). Oni elektis estraron (vidu liston sur paĝo 34). El la difinitaj celoj de la asocio ni menciu la propagandon de zamenhofa Esperanto, starigon de terminareto, interŝanĝon de profesiaj ideoj kaj faciligon de interŝanĝaj vizitoj de fervojistaj infanoj. La asocia jarkotizo estis 1/2 spesmilo (fiktiva mono, 1 spesmilo valoris ekz. 2.5 fr. frankojn, 2 germ. markojn aŭ 1 rusan rublon). Klarigojn pri "spesmilo" vidu fine de la 1a ĉapitro. Ĉiu membro ricevis membrokarton, kiu surhavis la fotografajon de la posedanto.

Unu jaron poste, la 30an de Aŭgusto 1910, sekvis kunsido en Kopenhavn. En la protokolo oni jam povis konstati similajn problemojn kiel konataj en nia tempo, ekz. pri asocia insigno, portado de la stelo sur la uniformo, koresponda servo. Ankaŭ jam komenciĝis la unuaj persekutoj, ekz. al pola kolego en la tiam rusa Warszawa. En Kopenhavn oni ankaŭ antaŭvidis la eldonon de propra organo. Tio fakte okazis en Decembro 1910 sub la titolo "Fervoja Esperantisto". El diversaj protokoloj en tiu gazeto konstateblas jena membrostato: fine de 1909 = 63, 1910 = 177, 1911 = 214 (el 15 nacioj), 1913 = 227. Ĉiuj membroj ricevis membroliston. Minimume ekde 1912 la asocio aliĝis kiel "Esperantia Entreprene" al UEA, kio kostis por 1912 du kaj por 1913 tri spesmilojn. Aperis kelkfoje adresaroj pri la membraro, ordigitaj laŭ 15 landoj, nome Aŭstrio-Hungario, Bulgario, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Granda Britio, Japanio, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Ruslando, Svedio, Svisio, Usono. En la tiamaj Universalaj Kongresoj regule kunvenis la fervojistoj en propraj kunsidoj, nome en Barcelona (1909) dufoje, Kopenhavn (1910) unufoje, Antwerpen (1911) trifoje, Kraków (1912) trifoje, Bern (1913) dufoje.

El la konservitaj tekstoj de protokoloj kaj paroladoj ekkoneblas, ke same kiel nuntempe la plej multaj membroj ne kontentige

*Vasuti Lapok (Fervojaj Revuoj). hungara porfervojista revuo el la jaro 1898 2.6(f)*

kunlaboris, alivorte, ke nur malmultaj aktivuloj zorgis por funkciado de la asocio.

Sed ni iomete rigardu la gazeton "Fervoja Esperantisto". La unua numero havis 8 pagojn. En la dua legeblas teksto de agnoska letero sendita de d-ro Zamenhof. Tiu modesta, sed riĉenhava kaj ĉiam bone presita revuo aperis ĝis Julio 1914 - kvankam "monata" - dum 44 monatoj kun entute nur 17 numeroj kaj 116 paĝoj en formato 15,3x23,3 cm. Ĝi estis presita en Paris. La abono por unu jaro kostis 1 spesmilon, tre malmulte, kaj ne estis ligita al la membreco en la asocio. La sekvo estis, ke ĝi ofte ne povis akurate aperi pro daŭra manko de abonantoj. En preskaŭ ĉiu numero oni petegis la membrojn aboni la gazeton, evidente sen la dezirita rezulto. Prezidanto Berlande diris en Antwerpen: "Ni ricevis multe da komplimentoj, sed ne sufiĉe da abonoj". Tamen la enhavo de tiuj 116 paĝoj donas kompletan bildon pri la vojo, kiun iris nia faka movado, kiam ĝi faris la unuajn paŝojn. Apud la oficialaj protokoloj kaj komunikoj oni jam ek de la tria numero trovas fakajn artikolojn, kies aŭtoroj estis kolegoj el Bohemio, Danio, Finnlando, Germanio, Granda Britio, Nederlando, Svedio kaj Svisio. La tre varia enhavo donas sciigojn pri fervojfakaj faktoj, kiuj parte tute ne plu estas konataj resp. dum la jardekoj komplete ŝanĝiĝis kaj moderniĝis. Ankaŭ trovigas raportoĵoj jam en 1910 pri ilustrita prospekto de la "North Eastern Railway" (Anglio) kaj en 1911 pri gvidlibro eldonita de la franca kompanio "Paris-Orléans". La aŭstriaĵoj fervojoj en 1910 sendis oficialan cirkuleron al siaj fervojistoj, en kiu ili atentigis je la lerneblecoj de Esperanto. Kaj al la personaro, kiu deĵore kontaktiĝis kun internaciaj pasaĝeroj, estis donita helpilo en Esperanto. Tio nur estas ekzemploj por la agado generala. Jam en la tria numero de "Fervoja Esperantisto" aperis la unuaj klarigoj pri terminoj fervojaj, prilaboritaj de k-go Bal (NL). Kaj ekde la kvara numero oni kelkfoje publikigis kolektajojn de terminoj, entute pli ol cent. Krome en la 12a numero la supera termezuristo Reuss el Regensburg (Germanio) komencis aperigi sian tradukon de tiam tre grava faka reglamento, la "Internacia Kontrakto pri fervojoj Transportaĵoj" de la 14a de Oktobro 1890 (Konvencio de Bern). Bedaŭrinde nur ekzistas la traduko ĝis artikolo VIII, la daŭrigan malhelpis la milito.

Kuriozaĵoj troveblas en n-ro 16, kie en la programanonco por la "Kvina Faka Kongreso de la Fervojistoj" en la kadro de la UK Paris (ne okazis pro la milito) oni uzis la 24horan tempindikon. Samnumere oni aperigis artikolon, kiu varbis por Hull, la "plej malkara el la ĉefaj havenoj de Granda Britio" kaj por transportoj per "Hull kaj Barnsley Fervojo".

*"La novaj Fervojoj tra Aŭstriaĵoj Alpoj" kaj "Pejzaĝoj en Aŭstrio" estis du kajeretoj en formato ĉ. A6, ĉiu kun pli ol 100 paĝoj, kiujn eldonis la Imperiestra Reĝa Ministerio por Fervojaj Aferoj en Wien ĉirkaŭ 1912. El ili ni publikigas titolpaĝon kaj "Viadukto de Hollenburg" 2.7(2f)*



Ni finu la trarigardon de la eta revuo per komuniko en la marta numero 1914, kiu sciigis la morton de la unua prezidanto kaj iniciatinto de la asocio, Berlande, en Januaro. Tiel tiu dinamika kaj entuziasma kolego ne plu devis travivi la eksplodon de la unua mondmilito kaj la detruon de ĉio, kion li kun siaj amikoj estis kreinta.

Jen ni citas kelkajn frazojn, kiujn direktis la dua asocia prezidanto, k-go Schwarz (Aŭstrio-Hungario) komence de 1912 al la membraro: "Se ni ĉiuj komprenos la noblajn, pacemajn kaj praktikajn celojn, kiujn sekvas nia asocio, se ni ĉiuj tiel ame, sincere kaj pacience plenumos niajn libervole promesitajn devojn, kiel ili (Berlande kaj aliaj, rim. de la red.) tion ĉiam senprofite, ofereme montris kaj faris, ni restos fortegaj eĉ en nia nune ŝajna malforteco."

En Aŭgusto 1914 komenciĝis la unua mondmilito. Por la pacaj celoj de la esperantistoj ne plu estis spaco. La asocia vivo estingiĝis. Kaj kun ĝi multaj vivoj de esperantistoj dum la sekvaj kvar jaroj. Pri la vicprezidanto Szymanowski ni scias, ke li mortis kiel ano de kirastrajno.

Pri la monsistemo de "Speso"

En la jaro 1906 prot. René de Saussure, svisa aktiva esperantisto, havis la ideon por la esperantistoj krei internacian helpmonon bazitan sur metra sistemo.

Per artikolo en la "Internacia Scienca Revuo" li proponis kiel monunuon la nomon "speso". Al ĝi li donis tre malgrandan valoron, por ke oni povu esprimi ĉiun ajn nacian monsumon per spesoj. Por la praktika uzo servis la spesmilo (Sm). Ankaŭ ekzistis spescento (Sc) kaj spesdeko (Sd). La kurzojn en Oktobro 1912 ni indikas en nia tabelo. Spesmilo teorie havis valoron de 0,8 gramo da pura oro. Unu Sc ekzemple valoris la afrankon por letero al fremdaj landoj. Jam en 1907 kelkaj svisaj bankoj enkondukis internaciajn spesmilo-cekojn, cekojn kun nura Esperanto-teksto.

Ankaŭ en 1907 Herbert F. Höveler (konata sub la pseudonimo "ĉefeĉ" kiel iniciatinto de la famaj "ŝlosilo"-vortaretoj) fondis en London "La Ĉekbanko Esperantista". Ĝi celis unue faciligon de pagoj inter diversnaciaj esperantistoj kaj komercistoj kaj due prepari vojon por ĝenerala enkonduko de internacia monunujo. La unua ĉeko iris de Saussure al Zamenhof. Ĉekoj estis realigeblaj ĉe ĉiu banko en la mondo en ekvivalentan valoron de anglaj pundoj, male transpagiloj nur inter konto-posedanto kaj Ĉekbanko.

La Ĉekbanko tuj sukcesis. La 30an de Aprilo 1914 ekzistis 730 konto-posedantoj en 320 urboj en 43 landoj. Ankaŭ tiun esperplenan entreprenon detruis la unua mondmilito.

### *KURZARO*

*De la ĉefaj naciaj monunuoj en francaj frankoj kja spesmiloj, ĝisdate korektitaj (Oktobro 1912)*

## 2-a ĉapitro

### Periodo de 1920 ĝis 1945

La unua mondmilito finigis la 11an de Novembro 1918. Sed daŭris ankoraŭ pli ol unu jaron, ĝis la postrestantaj anoj de IAEF kapablis, almenaŭ en kelkaj landoj, denove restarigi vivon de la movado. Evidente en tio sukcesis kolegoj en Ĉeĥoslovakio, ĉefe en Olomouc, sub gvidado de Josef Blažek, kaj baldaŭ ankaŭ en Germanio sub Georg Habellok.

El Olomouc oni sendis al ĉiuj eŭropaj fervojoj "Alvokon" Esperantolingvan, en kiu oni atentigis pri la komplikaj traduklaboroj ĉe la internacia interfervoja korespondado kaj sugestis uzi Esperanton, "ĉar ĝi jam estas uzata en la tuta mondo." Respondis sep fervojoj, sed favore respondis nur Aŭstrio. Tial Blažek devis raporti en ia fervojista kunveno 11.8.1920 dum la 12a UK en Den Haag (NL), ke la iniciato malsukcesis. En tiu kunveno oni ankaŭ interkonsentis, publikigi koncizajn raportojn en la revuo de UEA "Esperanto", ĉar ne eblis eldoni propran organon.

Pro la 13a UK 1921 en Praha la fervoja ministerio rekomendis organizi Esperanto-kursojn. La fervoja direkcio Olomouc eldonis Konversacian Kajereton por ebligi interkompreniĝon de fervojistoj kun eksterlandaj pasaĝeroj. En la distrikto de la direkcio Bratislava laŭ ties rekomendo 110 fervojistoj lernis Esperanton. Ĉefa iniciatinto estis Josef Řebíček, ĉefo de la komerca departemento en Olomouc.

Decida fervojista kunveno okazis en la 13a UK en Praha 2.8.1921. Ĉeestis 27 fervojistoj el 5 landoj, kaj ankaŭ la ĝenerala sekretario de UEA, Hans Jakob. Oni restarigis la unuiĝon "Internacia Asocio de la Esperantistoj-Fervojistoj" (IAEF) sub gvidado de jena estraro: Prezidanto: G. Habellok (D), vicprez.: A. Kašpárek (CS) (rezignis pro malsano), sekretario: J. Blažek (CS) kaj kasisto: E. Kubásek (CS). Jarkotizo 5 ĉ. kronoj aŭ 2 fr. fr. aŭ 10 germ. markoj.

Parolante pri 1921, ni nepre ne preterlasu mencii gravan rezulton de la aktiveco de la finnaj kolegoj. Tie ekaperis en la fervoja horaro "Turisti" la klarigoj por. pasaĝeroj ankaŭ en Esperanto. Tio daŭris seninterrompe ĝis 1949, do estis kun certeco la unuan fojon, ke en horaro aperis nia lingvo.

En 1922 ekaperis propra organo kun la jam tradicia nomo "Fervoja Esperantisto", sed bedaŭrinde nur du numeroj (37 x 26,5 cm, po 4 paĝoj). Redaktis ĝin J. Ivanović (iam J. Schwarz) en Praha. Prezidanto Habellok en gvidartikolo akcentis, ke la milito ne sukcesis detru la Esperanto-movadon, ke precipe la malgrandaj nacioj, fariĝintaj memstaraj, bezonas internacian lingvon, kaj ke ankaŭ la Ligo de Nacioj ekinteresiĝas pri ĝi. Pri la fondintoj de la antaŭmilita IAEF li skribis: "Ilia verko disfalis, sed vivas ilia spirito". La kvar paĝoj de tiuj du numeroj enhavis multajn pagitajn anoncojn laŭ la stilo de ĉiutaga gazeto, eĉ el Italio kaj Japanio. Krome oni trovis kompletajn adresojn de 183 membroj.

*Finna horaro el la jaro 1921, kiu enhavis la klarigojn de la signoj kaj ĝeneralajn rimarkojn en Esperanto de 1921 ĝis 1949. 2.9(f)*

En 1923 sekvis nova organo sub redaktado de J. Blažek, Olomouc. Ĝi aperis en Plzen (CS) kaj portis la nomon "La Fervojisto" (27 X 19 cm, 8 paĝoj).

La unua numero aperis en Julio, kaj ĝi restis la sola. En ĝi oni sciigis, ke la jarkotizo de la asocio por 1923/24 estas 15 kĉ aŭ 6 sv. frankoj. Ĝi ankaŭ raportas pri fervojista kunveno en la 14a UK Helsinki, 1922. Tie oni elektis novan estraron sub prezidanto G. Bontemps (F), vicprezidanto J. Blažek, sekretario J. Barviř, kasisto E. Kubásek (ĉiuj CS). Krome oni elektis 5 asesorojn (landajn delegitojn). En Helsinki oni ankaŭ aprobis novan statuton, kiu en multaj artikoloj similis al nia nuntempa.

Entute stagnis la asocia agado. Ĉiam kaj ĉie mankis mono, sed tutklare ankaŭ intereso. Gravaj malhelpaĵoj estis la ne certaj valutaj rilatoj kaj precipe la terura inflacio en Germanio ĝis Novembro 1923.

La tiama germana prezidanto Habellok eldonis terminareton manskribitan kaj multobligitan kun 1300 terminoj el la funkcia, komerca kaj oficeja medioj. Eldonkvanto 200. J. Řebiĉek oficiale proponis por la jarkunveno 1924 subteni Habellok per starigo de "Terminara Komitato". Sed tio ne realiĝis. Unu ekzemplero de tiu terminareto kostis en Sept. 1923 1,2 milionojn da markoj (!). Tamen oni invitis la fervojistojn al la 15a UK en Nürnberg (D) 1923, en kiu partoprenis 4963 kongresanoj. Oni tiam vivis malmultekoste en Germanio. En Novembro 1923 aperis en "Esperanto" n-ro 279 unupaĝa "Oficiala Informilo de IAEF". Tio ripoetiĝis ĝis Julio 1924 kiel sola rimedo, informi la membrojn de la agonianta fervojista movado.

Venis la decida jaro 1924.

Venis nova estraro. Venis nova organo. Venis nova vento. Jugoslavaj kolegoj transprenis la gvidadon. "La Fervojisto" sub redakto de Ilija Puhalo (Zagreb), kiu ankaŭ fariĝis vicprezidanto, la unuan fojon aperis en Oktobro 1924, nun en formato 31,5 X 23,8 cm. La nova prezidanto Stevan V. Stojniĉ skribis: "Anstataŭ miloj da membroj ni vidas nur tri centojn. Anstataŭ havi multpaĝan fakan revuon, nenion ni havas. Anstataŭ labori, ni dormegas." Arda alvoko al kunlaboro, idealismaj petoj al la membraro.

Sed tiu esperplena evoluo estis akompanata de novaj nuboj, ĉi-foje pro la fervojista kunveno en la 16a UK en Wien, somero 1924. Pro kvereloj pri la kandidatigo de la jugoslavaj kolegoj ekŝiĝis certa nombro da aŭstroj kaj germanoj el IAEF kaj fondis duan internacian organizon sub

*Terminareto Germana-Esperanto el la jaro 1923 de Georg Habellok (D), la unua iam eldonita 2.10(f)*

*Prezidanto Stojniĉ 2.10(f)*

nomo "Tutmonda Esperantista Fervoĵista Ligo" (TELF) sub gvidado de H. Steiner (A).

La vivo de TELF tamen ne longe daŭris. Jam komence de 1925 la germanoj decidis reveni, kaj ties prezidanto Habellok deklaris, ke ĉefe pro lia neĉeesto en Wien okazis misinterpreto de lia opinio en tiu afero.

De Novembro 1924 ĝis Januaro 1925 laŭplane aperis la n-roj 2 ĝis 4 de "La Fervoĵisto" monate; poste ili sin sekvis ĉiun duan aŭ trian monaton, sed kun 12, eĉ 16 grandaj paĝoj. Gravaj ĉefartikoloj de prezidanto Stojniĉ aŭ redaktoro Puhalo prezentis la direkton, kiun la nova estraro antaŭvidis por la asocio. Ĉefa temo restis la aktivigo de la membraro. Ĉiam denove oni variis tiujn petojn, varbi membrojn, sendi kontribuaĵojn por la revuo, vigligi la lokajn grupojn, sed ankaŭ - pagi la asocian kotizon, kiu nun inkludis la abonon de la revuo. Konjektable oni estis lerninta el la daŭraj fiaskoj dum la dekaj jaroj, kiam la abonado de la asocia revuo estis libervola.

Karakteriza por la tiamaj jaroj estis la senĉesa klopodado, evolui la fakan lingvon. Preskaŭ en ĉiu numero de la asocia revuo aperis kolektaĵoj de terminoj, ofte kun difinoj kaj eĉ indikoj de la respektivaj terminoj en angla, franca, germana, itala, hungara ktp. Ĉefe respondecis pri tio inĝ. Edward M. Rosher. Multaj membroj aklame laŭdis tion kaj petis daŭrigon. Rosher ankaŭ liveris, same kiel inĝ. Ŕebiĉek, interesajn artikolojn.

La lerta redaktoro Puhalo faris el "La Fervoĵisto" seriozan internacian fakrevuon. Ĉu temis pri problemoj de fervoĵistoj aŭ de iliaj vivkondiĉoj, aŭ pri teknikaj progresoj, gravaj akcidentoj aŭ prifervoĵistaj humoraĵoj aŭ eĉ internacie kompareblaj enketoj, sed ankaŭ instruaj tradukoj el fakaj revuoj, ĉion oni trovis en tiu revuo. Esprimis siajn opiniojn fervoĵistoj de ĉiuj rangoj ĝis la plej alta. Tio ebligis eĉ al fervoĵoj kaj sindikatoj, utiligi tiujn opinio-interŝanĝojn por siaj celoj.

Interesan proponon faris la estona asesoro Pung, nome eldoni fervoĵistan jarlibron. Sed ĝi ne realiĝis. En n-ro 3 oni laŭde menciis Ernst Eriksson el Stockholm kiel fervoran membron kaj gravan subtenanton. Eriksson estis parlamentano kaj ĉefestrarano de la Sveda Fervoĵista Sindikato: li i.a. regule publikigis en la sveda fervoĵista gazeto "Signalen" artikolojn sub la titolo "Tra Esperanta Mondo" kaj malavare donis monon por la asocio.

En la maja n-ro 1925 de "La Fervoĵisto" aperis la unuaj 6 artikoloj de "La Internacia Konvencio pri Transporto de Komercaĵoj per Fervojo (Konvencio de Bern, 1890). Tradukis ĝin Ernst Muthschall (D). Sed en la sama n-ro la redaktoro plendis, ke li grave suferas pro manko de kontribuaĵoj.

Post kiam komence de 1925 estis anoncita fondo de ĉeĥoslovaka landa ligo kun 224 membroj, el kiuj 86 anoj de IAEF, la 1.7.1925 realiĝis la forta germana landa ligo, same revenis la aŭstroj.

Tiel la fervoĵistaj esperantistoj denove estis unuigitaj en unu movado. TELF likvidiĝis. En multaj revuaj numeroj aperis adreslistoj de novaj anoj, el kiuj tamen ne estis ekkonebla la fakta membronombro, ĉar oni ĉiam alkalkulis la novajn al pli frue donitaj ciferoj senkonsidere, ke iuj anoj intertempe eksiĝis aŭ mortis.

Ekde la n-ro 1-2-3/1925 "La Fervoĵisto" havis verdan kovrilon. En ĝi oni trovis raporton pri la fervoĵistaj kunvenoj en la 17a UK Genève, 4.8.1925. Ĝin partoprenis 15 anoj el 6 landoj. El la estraro nur ĉeestis la vicprezidanto Puhalo. li voĉlegis deklaron de prezidanto Stojniĉ, en kiu tiu plendis pri la neaktiveco de la membraro kaj pri nesufiĉa kunlaborado en la revuo. El la tiama kasista raporto oni povas ekkoni la fortan fluktuaĉon inter la

*Redaktoro Puhalo 2.11(f)*

membroj: de 303 malnovaj anoj pagis kotizon nur 67 (!). Nove aliĝis 258, el kiuj ne pagis 12, do entute 313 anoj el 19 landoj. Konsiderinde fortaj nur estis CS = 109, D = 94, YU = 57, S = 14 kaj Estonio = 12. La bilanca sumo estis 9.775 jug. dinaroj (10 dinaroj estis proks. 1 svisa franko).

En Septembro 1925 aperis nova statuto, presita en Zagreb. Ĝi havis 78 paragrafojn. Laŭ § 6 ekzistis Aktivaj Anoj, Subtenantaj Anoj (ankaŭ nefervojistoj, eĉ entreprenoj), kiuj pagis la normalan kotizon, Bonfarantaj Anoj (pagis unu fojon 100 sv. fr.) kaj Honoraj Anoj. La asocia jaro daŭris de Aŭgusto ĝis Julio, depende de la jarkunveno okazinta kutime dum Univerŝala Kongreso de UEA. La kotizo povis esti pagata jare aŭ kvaronjare.

§ 18 diris, ke viroj kaj virinoj estis egalrajtaj kaj elekteblaj en ĉiujn funkciojn. Krom la estraro ekzistis "konsilantaro" (estraro, asesoroj kaj revizoroj). Laŭ § 56 la estraro havis la rajton, elekti la landajn asesorojn (landaj reprezentantoj), ĉar ne ekzistis landaj estraroj.

### **Administrado**

Nepre necesas iom priskribi la metodon, laŭ kiu en la tiamaj jaroj la asocio estis administrata. Ĉiuj fadenoj kuniris ĉe la vicprezidanto Puhalo. Li havis la internacian membrokartoteknon, kiun li daŭre devis adapti al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. Tio i.a. signifis, ke li devis konformiĝi nomojn, titolojn, adresojn ktp., ampleksa laboro. Krome li rekte korespondis kun la membroj en ĉiuj landoj. Kaj, ĉar li samtempe estis redaktoro, li ankaŭ mem verkis artikolojn kaj redaktis la revuon. Estas apenaŭ imageble, ke kaj kiel tio povis funkcii.

Kaj fakte ja ne kontentige funkciis.

Jam kelksemajna malsano rezultigis konsiderindajn malfruiĝojn en korespondado kaj aperigo de la revuo.

Sed en la jaro 1926 oni eĉ plivastigis tiun organizan aparaton. Aldone al la revuo "La Fervojisto", kiun ricevis ĉiuj membroj, oni forsendis "Cirkulerojn", kiujn ricevis la asesoroj. Krome la estraro en Zagreb enkondukis la eldonon de "Oficiala Bulteno", kies enhavo tuŝis apartajn gravaĵojn kaj estis direktita nur al asesoroj kaj tre aktivaj membroj. La unua tia Bulteno aperis la 24an de Aprilo 1926. Konataj al ni estas 5 numeroj, la lasta fine de Septembro 1926. Por povi prilabori tiujn amasojn da papero kaj la forsendadon de ĉio, oni devis alekti duan sekretarion. Supozeble ekde vintro 1926/27 kaj la cirkuleroj kaj la Oficiala Bulteno ekdormis por ĉiam.

Tamen, unu konsekvencon oni ekkonis: oni oficiale petis la ĉiulandajn membrojn, ne plu rekte korespondi kun la asocia estraro, sed fari tion pere de siaj landaj asesoroj. Tio kompreneble grave reduktis la nombron de la estraraj korespondaĵoj. Kaj la asesorojn oni petis, zorgi en siaj landoj por distribuado de la revuo.

La jara kotizo de 4 sv. fr. estis simile bagatela kiel la nuntempa. Kaj same simile kiel nuntempe oni ankaŭ tiam malsparis valoran tempon por kvereli pri kotizo. Pri tio akre plendis la svisa asesoro Perlet en n-ro 6-8/1926. En la sama numero tiu svisa asesoro interkonsente kun la estraro publikigis la kondiĉojn por balotado pri internacia insigno por la fervojistoj esperantistaj. Daŭris kelkajn jarojn, ĝis kiam la plano realiĝis.

La aŭgusta n-ro 1926 de la revuo enhavis liston de 16 asesoroj (inter ili en

*Titolpaĝo de statuto el la jaro 1925 2.12(f)*

Estonio kaj Latvio). Kaj en la sekvanta numero la estraro publikigis gvidartikolon, kiu tre klare karakterizis la tiaman situacion. Post plendoj de la vicprezidanto/redaktoro Puhalo pri la malbonegaj laborkondiĉoj li raportis pri helpo flanke de la jugoslavia fervojo, kiu disponigis laborĉambron en Zagreb. Sed oni urĝe bezonis skribmaŝinon, kaj Puhalo petis financan subtenon de la tuta membraro, por povi repagi la ŝuldojn faritajn pro jam aĉetita maŝino. Malavare la svedoj, precipe asesoro Eriksson, donacis konsiderindan sumon kaj krome pruntedonis la reston. Sed venis petita helpo nek de UEA nek de Internacia Transportlaborista Federacio (ITF).

Tiam oni ankaŭ diskutis la demandon, ĉu sekvi proponon faritan de UEA, aliĝi al UEA kiel faka organizo. Sed la estraro argumentis, ke tia aliĝo de pure faka asocio ne havus sencecon por UEA, kaj ke la asociaj anoj ne bone akceptus tion. Sed oni proponis al UEA reciprokan subtenon diversspecan, pri kies realigo ni ne estas informitaj.

Komence de la asocia jaro 1926-27 oni promesis, ke "La Fervojisto" nun ĉiumonate aperos kun 8 paĝoj. Tamen funkciis nur unu fojon, poste sekvis paŭzo de duona jaro. Tio kaŭzis multe da ĉagreno ĉe la membroj kaj eĉ membroperdojn. La posta numero havis 16 paĝojn kaj estis verkita ekskluzive de la estoniaj kolegoj. Ĝi enhavis multajn priskribojn kaj detalojn pri la fervojoj de Estonio.

Komence de la asocia jaro 1927/28 Puhalo sub titolo "Tri jaroj" donis superrigardon pri la revuo. Kortuŝe li plendis pri la kritikuloj, kiuj tamen neniel kunlaboris, kaj laŭdis la malmultajn personojn, kiuj ebligis la aperigon de la revuo dum tri jaroj kun 152 paĝoj plus 32 kovrilpaĝoj. Cetere ekde la aŭgusta n-ro 1927 "La Fervojisto" aperis denove sen kovrilpaĝo. Kaŭzoj oficiale donitaj por neregula funkciado de la revuo estis "manko de kunlaborantoj, manko de mono, troa okupado de la redaktoro".

En la 19a UK en Danzig 1927 kunvenis 10 kolegoj el 6 landoj. El la tie donita raporto estas menciinde, ke la eĥo pri Esperanto en naciaj fakaj revuoj dum la antaŭaj jaroj konsiderinde kreskis. Kaj ankaŭ pri la kreskanta reputacio de la fervojista asocio en la movado oni estis kontenta. Sed Puhalo, kiu donis la raporton, akre kritikis la daŭrajn ŝanĝojn inter la sekretarioj, kiuj forlasis la postenojn, rimarkinte, ke ĝi postulis iom da laboro. La raporto enhavis ankaŭ tre interesajn indikojn pri la agado de la asesoroj. Resumante ĝin, oni konstatas, ke el 19 menciitaj asesoroj la vicprezidanto pozitive prijuĝis nur 12.

De Septembro 1927 ĝis Junio 1928, do dum 10 monatoj, Puhalo sukcesis regule eldoni la revuon ĉiumonate, 10 numerojn kun entute 88 paĝoj pli grandaj ol formato A4 kaj en eldonkvanto de 600. Nekredeble bona rezulto. Por povi daŭrigi en tiu maniero, jam en Januaro 1928 aperis alvoko, instigita de Ernst Eriksson el Svedio, krei garantian kapitalon de minimume mil svisaj frankoj. Eriksson mem tuj donis la duonon de tiu sumo. En la marta numero oni jam oficiale kvitancis la unuajn donacojn, kiuj venis el 8 landoj kaj atingis sumon de ĉirkaŭ 600 svisaj frankoj. Samtempe oni kvitancis sumojn de 190 sv.fr. por skribmaŝino, 55 sv.fr. por la revuo kaj 750 fr. ĝenerale por la asocio. La sumo de tiuj donacoj estis multe pli alta ol al sumo de la jarkotizoj de ĉiuj anoj kune.

Malgraŭ du alvokoj en la januara kaj maja revuoj neniu anoncis sin por asocia jarkunveno en UK Antwerpen. Ankaŭ neniu estrarano povis tien veturi. Sekve la jarkunveno 1928 ne povis okazi. La laŭstatuta elekto de nova estraro estis farita tute senceremonie laŭ propono, publikigita en la revuo. Prezidanto kaj

*Josef Ŕebiĉek (CS), nask. 6.8.1875, mortis 6.5. 1960. Seninterrompe kaj senbrue li verkis, tradukis, laboris dum jardekoj por IAEF kaj IFEF. 2.13(f)*

vicprezidanto/redaktoro restis. La novaj sekretario Prebil kaj asesoro Zupanić estis kolegoj, kiuj dum longaj jaroj post la milito denove kunlaboris en la jugoslava landa asocio. Zupanić eĉ ricevis pro tio en la IFEF-kongreso Maribor 1971 arĝentan medalon de FISAIC.

Post preskaŭ duonjara paŭzo, kaŭzita de malsano de la redaktoro, denove aperis numero de "La Fervojisto". Iom seniluziigita Puhalo plendis, ke pro tiu neapero sufiĉe da anoj negative reagis, kaj li klare petis, varbi, varbi membrojn, por ke la asocio havu pli larĝan bazon kaj ne estu dependa de la sanstato de unu persono. Lia finfrazo tekstis: "Tiuj kelkaj linioj estas instrua leciono ĉerpita el la malsano." En la sama numero oni urĝe petis helpantojn por inĝ. Rosher, kiu jam dum jaroj laboris preskaŭ sola por krei fakan terminaron. Krome oni konatigis, ke la kotizo ekde nun por ĉiuj landoj estos same alta, nome 1 US-dolaro. Ĝis tiam la kotizo diferencis laŭ la vivkondiĉoj de la unuopaj landoj. Sed ĉu kaj kiel oni vere povis prijuĝi tiujn kondiĉojn?

El la jarraporto pri 1927/28 interesas, ke la insignoj proponitaj de la svisa asesoro Perlet ĝis nun ne povis esti menditaj, ĉar la prezo postulita de svisa firmao estis tro alta. Josef Řebiček finis la tradukadon de la Internacia Konvencio por la vartransporto. Aperis ankaŭ listo de nacilingvaj fakaj kaj sindikataj revuoj, kun kiuj oni interŝanĝis "La Fervojisto" kaj kiuj parte eĉ regule aperigis priesperantajn artikolojn, precipe en CS, F, D, YU, S kaj CH, krome en la organo de ITF. Fine de la jarraporto oni diskonigis la membrociferojn, nome 259 membrojn en 21 landoj, el kiuj 13 tamen havis pli malmulte ol 10 membrojn. Nun eĉ ekzistis kelkaj landaj asocioj, kiuj iam post iam estis fonditaj.

Aparte interesa estis la maja numero 1929. Ĝi enhavis la fotografaĵojn de 20 asesoroj el Aus, A, B, GB, BG, CS, DK, Estonio, SF, F, D, E, H, YU, Latvio, NL, PL, S, CH kaj USA. Krome ĝi prezentis la novan insignon de la asocio kaj la mendokondiĉojn.

En multaj numeroj de la revuo oni diskutis fervojajn terminojn kun la celo, eldoni terminaron. En tiu konekso ĉiam denove oni povis legi la nomojn Řebiček kaj Rosher. Tamen pro konstanta manko de kunlaborantoj tiuj du personoj solaj ne kapablis solvi tiujn gigantajn taskojn.

En somero 1929 vicprezidanto Puhalo devis kuraci sin en Dubrovnik ĉe la maro. Sed eĉ dum tiuj 2 monatoj li plenumis sian funkcion kaj petis sendi korespondaĵojn al li poŝtrestante. Tamen evidente la kuracado ne povis resanigi lin. Poste li eĉ bezonis operacion. Dum la malsano de Puhalo komplete lamis la estrara laboro, ĉar ĉiu por ĝi necesa materialo troviĝis en la oficejo de Puhalo en Zagreb. Komence de 1930 oni dividis la laborojn inter la estraranoj, esperante tiel eviti similajn malfacilaĵojn. Samtempe la estraro invitis al internacia kongreso en Hirschberg en Silesio (Germanio). Tamen la esperantista fervojista movado ricevis fortajn batojn en 1930. En tiu jaro

*La asocia insigno en la dudekaj jaroj 2.14(f)*

*Invito al fervojista kongreso en Hirschberg 1930 2.14(f)*

la malbona sanstato de Puhalo montriĝis senespera. (Li mortis 21.6.1937, nur 38 jarojn aĝa). Krome la translokiĝo de prezidanto Stojnić al Sarajevo kaŭzis novajn malfacilaĵojn. Instigoj al aliaj asocioj transpreni la gvidadon de la internacia movado ne havis rezulton. Grandajn zorgojn kaŭzis la financa stato de la asocio pro tio, ke multaj membroj ne akurate pagis sian kotizon.

Kiel lastan pason por savi la asocion, ĝia prezidanto sendis petskribon al la Generala Direkcio de la Jugoslavaj Fervojoj, alvoki ĉiujn staciestrojn kolekti mondonacojn por tri numeroj de "La Fervojisto", presotaj en la presejo de la fervojo en Subotica. La negativa respondo al tiu peto signifis mortigan baton por IAEF.

Restis tamen la internacia fervojista esperantistaro, restis vasta reto de lokaj grupoj kaj landaj organizoj. Do ekzistis bazo por restarigo de la movado, necesis nur interliga iniciato. Kaj tiun iniciaton donis ITF.

Jen estas la loko, kie ni ensovu ĉapitron pri la rolo, kiun ludis la kontaktoj kun ITF. En ties kongreso 1924 en Hamburg la delegito de la sveda fervojista sindikato estis proponinta, ke tiu kongreso deklaru sin favora al Esperanto. La propono estis unuanime akceptita. Kvar jarojn poste en la ITF-kongreso de Stockholm denove la sveda fervojista sindikato proponis rezolucion, en kiu i.a. oni esprimis, ke adopto de la Internacia Lingvo ne nur signifas ŝparon de tempo kaj mono, sed ankaŭ kapabligus ĉiun individuan membron partopreni en internacia agado. La rezolucio, denove akceptita unuanime, ankaŭ postulis, ke la sindikatoj per siaj gazetoj, en kursoj ktp. aktive zorgu por disvastigo de Esperanto, por ke oni povu uzi ĝin praktike.

Precipe entuziasma estis la sekretario de la Fervoja Sekcio de ITF, N. Nathans. Li zorgis, ke en 1930 ekaperis la "Komunikoj de ITF por Gazetaro" ankaŭ en Esperanto. Tiuj "Komunikoj" baldaŭ plivastigis kaj aperigis novaĵojn pri ĉiufakaj transportistoj en 18 landoj. ITF rigardis la esperantistojn kiel inter siaj plej aktivaj membroj.

En 1930 membroj de la ankoraŭ ekzistanta Svisa Asocio de Esperantaj Fervojistoj vizitis la ITF-centron en Amsterdam. Sekve de tiu vizito la svisoj dissendis cirkuleron kun propono, ke oni konstruu novan movadon en la kadro de ITF.

Simile esprimis sin aŭstraj kaj germanaj kolegoj. En la 9a SAT-kongreso Aŭgusto 1931 en Amsterdam estis fondita "Internacia Federacio de Esperantaj Trafik- kaj Transportlaboristoj (IFETT)". Ĝi ne havis individuajn membrojn, sed konsistis el landaj asocioj, kiuj kunlaboris kun la sindikatoj. La "Internacia Oficejo" rekte rilatis kun ITF. La "Komunikoj por la Gazetaro" fariĝis organo de IFETT. La leĝdona instanco estis ĝiaj Internaciaj Konferencoj dum la kongresoj de ITF. Tiel do la nova organizo estis intime ligita kun strukturo kaj agado de la transportista sindikata movado sur ĉiuj ties organizaj stupoj: de loka sindikata branĉo ĝis la internacia centro. Tiu aranĝo donis al la Esperanta movado sancon penetri profunde en sindikatan medion, servi al la sindikatoj en iliaj konkretaj taskoj kaj problemoj, reciproke ĝuante iliajn agnoskon kaj subtenon. Lingvo Internacia fariĝis unu el la organizaj kaj ideologiaj faktoroj de la monda transport- kaj trafiklaborista sindikata movado.

Aliaflanke tiu intima kunlaboro kun ITF kaj dependeco de ĝi kaŭzis, ke IFETT ne atingis ĉiujn grupojn de esperantistaj fervojistoj. Aproboj kaj promesoj de kunlaboro venis el A, B, BG, D, E, NL, N kaj S; britaj kaj francaj grupoj retenis sian aprobon pro ideologiaj motivoj, dum fervojistaj kaj tramistaj grupoj en H kaj I, kvankam simpatiantaj, ne povis aliĝi pro la reĝimoj regantaj en tiuj landoj. La aŭstria sekcio de IFETT, konsistanta el la fervojista kaj tramista fakgrupoj de la Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, akceptis la taskon organizi kaj gvidi la Internacian Oficejon de IFETT en Wien. Pro praktikaj kaŭzoj la Internacia Oficejo baldaŭ translokiĝis al la ĉefsidejo de ITF en Amsterdam. Gvidis ĝin S. Cohen, M. Demmenie kaj Jan Lok, la postmilita longjara IFEF-sekretario. Flanke de ITF kunlaboris A.V. Klatil. Krom la oficialaj konferencoj kun ITF en 1932, '35 kaj '38 oni neoficiale aranĝis kunvenojn de transportlaboristoj kadre de la SAT-kongresoj. Evoluigis fruktodona internacia agado en multaj landoj. Ekzemple oni organizis studvojaĝojn, interŝanĝan gastigadon de infanoj aŭ tutaj familioj, eĉ internaciajn renkontiĝojn de fervojistoj en Svisio. IFETT-anoj ankaŭ estis invitataj prelegi aŭ verki artikolojn pri siaj spertoj; kaj pro sia multflanka aktiveco ili ofte estis elektitaj funkciuloj en la sindikatoj.



Estis dum jaroj krea reciproka kunlaborado.

Tamen la nuboj de la tiama monda ekonomia krizo ombrumis la junan organizon. Sed plej forta bato estis la membroperdo de 25 ĝis 30 %, kaŭzita pro neniigo de la sindikatoj en la diversideologiaj landoj ekde 1933. Perdiĝis la germana bone organizita asocio en 1933, la aŭstria en 1934, en la sama jaro la latvia pro likvido de la demokratio ankaŭ tie, en 1936 la portugala kaj ankaŭ la bulgara kaj jugoslavia. Grave suferis la hispanoj kaj en 1938/39 malaperis la fervojistaj grupoj en Ĉeĥoslovakio. Kiam en Septembro 1939 eksplodis la dua mondmilito, ITF decidis daŭrigi sian laboron por kaj per Esperanto. Bedaŭrinde la septembra numero de la "Esperantaj Komunikoj", en kiu aperis tiu decido, estis la lasta. La sidejo de ITF baldaŭ translokiĝis al London, kio malebligis multajn taskojn. Tio okazis jam monatojn antaŭ la invado en Nederlando. La amsterdamaj fervojistoj A. Compagner kaj J. Lok, respektive prezidanto kaj sekretario-kasisto de la Internacia Federacio de Esperantaj Trafik- kaj Transportlaboristoj, aranĝis IFETT-aferojn en la sindikata domo "Vondelstraat" en Amsterdam, kie ili ĉiam ĝuis aŭtoblan akcepton.

Skribmaterialo kaj skribmaŝino estis libere disponeblaj por laŭeble konservi la skriban kontakton kun la Federacia reprezentanto Klatil en London.

Iom post iom la ceteraj internaciaj kontaktoj reduktiĝis pro militaktiveco en kelkaj landoj, ĝis la invado en Nederlando (Majo 1940) malebligis ĉiun kontakton ekster la landlimojn. Abundon da materialo, kiel grandan stokon de la "Komunikoj por la gazetaro", korespondaĵojn kaj adresaron oni forbruligis. Por eviti eventualan konfiskon, la kasenhavo, du skribmaŝinoj kaj konciza adresaro trovis lokon en privata hejmo. En la amsterdama fervojista grupo UNFEG M. Demmenie savis la kasenhavon kaj la geedzoj Hoen la bibliotekon de tiu grupo.

Posta konfisko de restinta materialo ne havis malagrablajn konsekvencojn. Dum proksimume unu jaro la UNFEG-membroj ankoraŭ regule kunvenis en la konstruaĵo "Vondelstraat", kiu estis la sidejo de la loka Fervojista Sindikato, ĝis malpermeso finis ĉiun regulan kontakton. La kontakto nur restis dum la laboro kaj reciprokaj hejmaj vizitoj. Fine, la fervojista striko de la 17a de Septembro 1944 metis finon ankaŭ al tiuj kontaktoj, kiam subite malaperis la nederlanda fervojistaro.

-----

### 3-a ĉapitro

Periodo de 1945 ĝis 1984

Antaŭrimarko: La temoj "Internacia Organo, Junularo, Skisemajnoj, Terminara Komisiono, Fakprelega Komisiono kaj FISAIC" pli detale estas traktitaj en la ĉapitroj 5 ĝis 9.

Post la giganta ŝoko de la dua mondmilito oni prave povis demandi: Kaj nun? Ĉu la fervojista movado estis mortinta?

Okazis kvazaŭ miraklo. Jam en Majo 1945, tuj post la militfino, ekvivis en Amsterdam "Unua Nederlanda Fervojista Esperanto-Grupo" (UNFEG), kiu fariĝis ĝermo de la venonta nova internacia fervojista movado IFEF. Tamen, estis longa vojo al tiu celo, kiu en 1945 ankoraŭ ne klare estis ekkonebla. En la cerbojn de la gvidantoj, ĉefe la k-joj Demmenie, Hoen kaj Lok, venis novaj ideoj, kies plej grava estis, ke oni devos konstrui internacian movadon sendependan kaj neŭtralan. Movadon do, kiu estu akceptebla por ĉiu ajn fervojisto en la mondo. La entuziasmon ni ekkonu el la fakto, ke en vintro 1945-46 en kurso oni instruis en "nevarmigita ejo, surhavante surtutojn kaj ĉapelojn kaj kun gutantaj nazoj" (citaĵo de J. Lok).

Sekvis dua paŝo, nome la starigo de tutlanda organizo. Ĝi fondiĝis la 14an de Novembro 1946 en Utrecht kiel "Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda" (FERN). Ĉefe estis k-go Lok, kiu renovigis antaŭmilitajn kontaktojn kaj strikte sekvis la vojon de sendependeco. Ekestis korespondaj rilatoj kun A, DK, F, H, N, CH.

La jaro 1947 ebligis la unuajn personajn kontaktojn. En la SAT-kongreso Aarhus okazis "Trafik- kaj Transportlaborista Fakkunveno" (5.8.47), kiu elektis komisionon por pliaj preparoj. Krome venis 24 francaj gefervojistoj en Majo al Amsterdam, nederlandaj kolegoj reciprokis la viziton en Novembro. El tiuj plej amikaj renkontiĝoj kreskis la firma intenco, restarigi internacian fervojistan movadon okaze de la 21a SAT-kongreso. La organo

de SAT "Sennaciulo" invitis al fervojista konferenco, kiu okazis la 4an de Augusto 1948 en Amsterdam. Tiun tagon fondiĝis la nuna IFEF sub la nomo "Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj", Ĉeestis 60 k-joj el DK, F, NL, S kaj CH. La aŭstroj ne ricevis enirvizon. Kiel estraranoj estis elektitaj W. Stapel (prez.), H. Hoen (vicprez.), J. Lok (1a sekr.), E. Drijfhout (2a sekr.), W. Biesheuvel (kas.), D. Muller (red.) kaj A. Wissink (asesoro), ĉiuj de UNFEG. La nova IFEF havis tri landajn asociojn (DK, F, NL) kun 250 membroj entute. La membrokotizo egalvaloris 3 internaciajn respondkuponojn jare. Lok transdonis kiel "komenclkapitalon" 106 guldenojn, kiujn li estis savinta tra la milito el la iama kaso de IFETT. Post tiu "starto" ni ne forgesu mencii, ke en aŭtuno 1948 la juna federacio sukcesis eldoni sian unuan kajeron de "Bulteno". Pri ĝi kaj ĝia evoluo legu la apartan ĉapitron "La internacia organo".

1949

La vojo evidente ne estis glata. Komence de 1949 la prezidanto plendis en "Bulteno", ke kelkaj membroj deziris renovigi IFEF laŭ antaŭmilita sistemo interne de la sindikatoj, kaj li pledis pri nepra neŭtraleco kaj sendependeco. Sed la gvidantoj primajstris la danĝeron. Komence de Marto 1949 la organizo jam havis 450 membrojn en 6 landaj asocioj kaj 9 izolajn membrojn en pliaj 5 landoj.

La aŭstraj kolegoj, ĉagrenitaj pro la fakto, ke ili ne ricevis la enirvizon al Amsterdam, aranĝis apartan kunvenon, "Tuteŭropa Fervojista Konferenco", la 1an ĝis la 3a de Aprilo 1949 en Wien. Partoprenis fervojistoj el A, DK, F, NL kaj CH. Sed bedaŭrinde komplete fiaskis la intenco, partoprenigi kolegojn el orienta Eŭropo. La konferenco ne nur estis tre festa, sed ankaŭ efika. Ĉeestis i.a. la ĝeneraldirektoro de la aŭstria fervojoj. Estis akceptitaj du Deklaracioj, el kiuj unu diris, ke IFEF "estu fundamento por disvastigo de Esperanto inter la Fervojistaj Sindikatoj kaj Fervojaj Administracioj". La alia temis pri akcepto de Esperanto por la internacia fervoja telegrafado.

Jam unu monaton poste, en Majo 1949, la juna IFEF travivis sian unuan grandan manifestacion: la dana sekcio kurage estis invitinta la unuan IFEF-Kongreson al Aarhus. Venis 149 gek-joj el 8 landoj al tiu unika travivaĵo. La juna federacio ekpruvis, ke fervojistoj ne nur estas granda faka, sed ankaŭ lingva familio. Kaj jam audiĝis flanke de la redaktoro samaj, kiel nuntempe konataj plendoj pri mankanta kunlaboro de la landaj asocioj. La Bulteno tiam estis sendita ĉefe nur al landaj estraroj, ne kontentiga, sed necesa solvo pro manko de mono. Tamen IFEF ekmarŝis. La jarraporto pri 1948/49 anoncis jam la landajn sekciojn NL, F, DK, N, A. CH. Kiel gravaj kaj decidaj estis tiuj tagoj en Aarhus, montru la vortoj de prezidanto Stapel: "Se vi povus scii miajn sentojn en tiu ĉi momento, larmoj venus en viajn okulojn".

1950

Grandan progreson oni povas konstati en 1950. La jarraporto de la sekretario mencias 557 membrojn sub dato de 1.3. (7 landaj asocioj kun 542 + 15 izolaj, komence de 1950 aliĝis D). En la 2a IFEF-Kongreso en Salzburg partoprenis 395 personoj. Grava traktajpunkto estis propono de CH, aranĝi fervojistajn kunvenojn en Universalaj kaj SAT-Kongresoj. Duonakceptita, ĝi ne estis realigita dum la sekvontaj jaroj. Sed io tre grava realiĝis, nome la terminara laboro. Ekde tiu kongreso ekzistis komisiono, kiu pli malpli intensive okupas sin pri fervoja terminaro (komp. la ĉap. "Terminara Komisiono"). Por la vakanta posteno de la redaktoro oni elektis k-gon K.G.J. de Jong, kaj same kiel en la dudekaj jaroj la federacio baraktis pro pli bonkvalita skribmaŝino. La bilancsumo estis 333 gld.

Regularoj

Neniu organizo povas ekzisti sen kelkaj reguloj, des malpli, kiam ĝi estas sendependa, demokrata kaj internacia. Pro tio ankaŭ la estraro de IFEF formulis unuan "Regularo de IFEF", kiu konsistis el 13 paragrafoj. Bedaŭrinde ĝi ne indikas daton de validigo. Sed ĉar en la organo de la nederlanda IFEF-sekcio en Januaro 1949 jam aperis la teksto de tiu regularo, ĝi sendube estis starigita baldaŭ

*Provizora Kongreskarto de Unua IFEF-Kongreso 1949.*

post fondo de IFEF. En la federacia organo de Januaro 1951 aperis iomete ŝanĝita dua "Regularo". Ambaŭ i.a. diris, ke ĉiujare, prefere en Majo, okazu kongreso. Se en lando minimume estis 5 membroj, tio jam sufiĉis por formi "landan rondon". La landaj kasistoj respondecis pri enkasigo de la federacia kotizo. Tiel oni dekomence evitis la gravan eraron el pli fruaj jaroj, kiam la federacia kasisto devis enkasigi la kotizojn rekte de la membroj. La kotizo (3 rpk) inkludis la abonon de la federacia organo. La regularo postulis, ke la estraranoj devis loĝi en sama lando. Tio tiam estis realigebla, ĉar la forta nederlanda asocio dum longa tempo kapablis disponigi ĉiujn estraranojn. Nelaste tiu unua regularo klare fiksas la neŭtralecon de la federacio. Krome ĝi aljuĝis al delegitoj, reprezentantaj pli ol cent membrojn, du voĉojn por voĉdonado.

Kiel menciite, en Januaro 1951 estis publikigita iom korektita dua regularo. Tamen jam baldaŭ sekvis tria "Regularo", kiu anstataŭ 13 havis 22 paragrafojn. Denove ĝi ne prezentis daton de validigo. Sed ĉar ĝi enhavis decidojn el la tria kongreso de Paris, oni povas konjekti, ke ĝi validis ekde autuno 1951. Novaj en ĝi estis pli detalaj priskriboj de kongresaranĝoj, oficiale konfirmita starigo de Terminara Komisiono kaj en paragrafo 10, ke la estrarkerno (prez., sekr. kaj kas.) rajtis memstare decidi, kvankam poste ili devis respondeci al la kongreso, ne tute demokrata sistemo. Krome ĝi fiksas la komenciĝon de la organiza jaro je Majo, de la administra jaro je la 1a de Januaro.

1951

En la 3a kongreso (Paris) la gvidanto de TK, H. Pape (D), jam prezentis planon por terminareto kun proksimume 1500 vortoj. Plano por internacia adresaro ne estis realigebla pro la kostoj, tria plano pri kunfandiĝo kun ILEPTT ne estis akceptita.

1952

En la sekvintaj jaroj oni cerbumis pri kreado de federacia insigno. Inter alie oni intencis proponi la kongresinsignon de la 4a kongreso en Lindau. Sed tiu ideo ne estis akceptita. Ankaŭ nova propono pri pli intima kunlaborado kun UEA estis malakceptita. En Lindau la germana asocio (k-go Simon) donacis al ĉiu landa asocio tablostandardon en formo de landa flageto. Tiujn standardetojn la landaj delegitoj en la kongresaj kunsidoj starigis antaŭ si. En 1979 la IFEF-komitato decidis, donaci ilin al la Muzeo en Wien. Ĉiujare la sepkapa estraro (la regularo postulis nur kvin) estis reelektita, sed en 1952 nur ankoraŭ ses estraranoj estis je dispono pro morto de k-go Wissink. Novaj landaj sekcioj, kiuj aliĝis al IFEF, estis en 1951 Aus, SF, GB kaj en 1952 ankaŭ B kaj S, entute nun 13 landaj asocioj. En 1952 la nederlandanoj kreis novaĵon: ili organizis feriosemajnon en Zwolle, kiu ripetigis ĝis 1972 ĉiujare.

*La estraro en 1952, de mald. Biesheuvel, Lok, Stapel, de Jong, Hoen, Drijfhout 2.18(f)*

## 1953

Laŭ decido de la 2a kongreso la federacio kreis glumarkojn. El ilia vendado oni esperis aldonajn enspezojn. Sed spite al daŭra reklamo ili ne sufiĉe vendiĝis, tiel, ke ili alportis eĉ deficiton. Tio fariĝis klara en la 5a kongreso (Utrecht). Tie partoprenis unuan fojon la prezidanto de FISAIC (Internacia Federacio de Kulturfllegantaj Fervojistoj), s-ro Mollion (F), kiu poste ofte estis gasto en la IFEF-kongresoj. La germana asocio transdonis al la estraro ekzempleron de la germana horaro, en kiu ekde somero 1953 la "horarŝlosilo" apud la angla kaj franca aperis ankaŭ en Esperanto. La terminara laboro faris certajn progresojn. Kaj la kongreso decidis, akcepti la staton de kunlaboranta faka asocio de UEA, resp. de subtenanto de SAT. Krome ĝi akceptis novan (la 4an) "Regularo"-n, kiu havis 24 artikolojn. Ĝi estis publikigita en Bulteno 3/54 (Januaro) kaj i.a. kreis konfliktaĵoj kaj kaskontrolan komitatojn. En la 38a UK Zagreb la tie ĉeestantaj fervojistoj sub gvidado de k-go de Jong kunvenis kun jugoslavaj kolegoj kaj sindikatanoj. Tio fariĝis la ĝermo por posta jugoslava IFEF-sekcio.

## 1954

En la 6a kongreso (Verona) venis franca propono, estonte kunlabori kun FISAIC. Ĝi estis unuanime akceptita, grava decido, laŭ kiu estis rekomendite al la landaj asocioj, aliĝi al siaj respektivaj FISAIC-sekcioj. Tiamaniere en 1954 komenciĝis evoluo, kiu kondukis en 1967 al la unua IFEF-kongreso sub auspicio de FISAIC. Krome laŭ svisa propono la kongreso kreis unuafoje komitaton por fakprelegoj, kiun gvidis la redaktoro de Jong. "Bulteno" aperis en tiu jaro jam kun entute 68 paĝoj. Aliĝis du novaj landaj asocioj, nome E kaj Saarlando (tiam memstara teritorio), nun entute 15, krome troviĝis izolaj membroj en 8 pliaj landoj.

## 1955

En la 7a kongreso (Zürich) oni nove ordigis la kotizon. Ĝia ĝistiam fikso je 3 rpk kaŭzis, ke la membroj ne en ĉiuj landoj estis same ŝarĝitaj. Pro tio la estraro proponis trionan dolaron, sed fine oni fiksas la kotizon je 1 gld jare. La franca k-go A. Blondeaux prezentis valoran rezulton de la terminara agado, nome terminaron kun 5000 terminoj ĉefe teknikaj, grava paso antaŭen.

En Bulteno 3/55 troviĝis listo de estraroj kaj lokaj reprezentantoj, dum n-ro 6/55 anoncis, ke nun ankaŭ la germana horaro por longdistancaj trajnoj enhavis Esperanton. Kaj fine de la jaro la franca asocio anoncis sian intencon, organizi ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. Same fine de 1955 kaj denove en aŭtuno 1956 la germana asocio en "Bulteno" prezentis detalajn planojn, sendi infanojn el multaj landoj al trisemajna internacia renkontiĝo okazonta en domo de la Fervoja Sociala Servo, helpe de nur la lingvo Esperanto. Bedaŭrinde kaj spite al kongresa akcepto la plano fiaskis pro manko de kunlaboro. Fuŝita okazo prui la valoron de nia afero.

Kiel nove aliĝinta landa asocio en la jaro 1955 estu menciata YU. La membronombro de IFEF nun superis 1700. Ne estis mirige, ke tiu rapida kreskado dum nur 7 jaroj kaŭzis apenaŭ primajstreblajn administrajn laborojn en Amsterdam. Aludojn pri tio oni trovas en la ĉiujaraj raportoj de la sekretario, kiu helpe de duobla kartoteko zorgis pri ĉiam akurata superrigardo. Ekzemple en 1954 li devis skribi 870 novajn membrotarojn kaj prilabori 120 adresŝanĝojn. Alvenis 409 leteroj, poŝtkartoj kaj presajoj kaj estis forsenditaj 301.

Oni povis antaŭvidi, ke la sekretario Lok ne daŭre kapablis elteni tiun laborkvanton. Sed ankaŭ por la landaj asocioj, precipe la pli grandaj, estis grandega ŝarĝo, ĉiam liveri al IFEF la multnombrajn aktualaĵojn. Vere stariĝis la demando, ĉu necesis por IFEF koni la adresojn de la landaj membroj kaj doni al ili membronumeron. Fakte baldaŭ la sistemo estis simpligita kaj IFEF kontentiĝis pri la nombro de pagitaj kotizoj.

## 1956

La 8an kongreson en Stockholm salutis parlamentano Einar Dahl nome de la ministro por komunikado, krome Edvard Oredssen nome de la Svedaj Ŝtatformoj, kaj UEA-prezidanto Ernfrid Malmgren. Ĉeestis kongresanoj el 14 landoj.

En la 41a UK Kopenhavn 1956 denove kunvenis 40 fervojistoj sub gvidado de la svisa k-go Walder. Tamen tiuspecaj kunvenoj ne havis decidan karakteron kiel en la dekaj kaj dudekaj jaroj, sed celis ĉefe la kontakton inter la hazarde ĉeestantaj fervojistoj. Fine de 1956 reduktiĝis la nombro de landaj asocioj je unu, ĉar laŭ kontrakto inter Francio kaj F.R. Germanio Saarlando ekde 1.1.1957 apartenas al D.

1957

En la jarraporto de la sekretario oni jam de jaroj povis legi avertojn pri la maljuniĝo de la estraranoj. Kaj komence de 1957 (Bulteno Februaro) tre klare estis dirite, ke en 1958, en la 10a kongreso, nepre estu elektata nova estraro, ĉar tri estraranoj tiam estos emeritoj. Ĝis nun la procedo estis simpla, ĉar la sama estraro senŝanĝe ĉiujare estis reelektita aklame. Tio same okazis en la 9a kongreso (Rijeka). Kaj ankaŭ interne de ĝi nenio ŝanĝiĝis. En la sama Bulteno legeblas "Alarmkrio de la redaktoro" kun akraj plendoj, ke spite al kongresdecido, laŭ kiu ĉiu landa asocio komisiu respondecan personon por liveri kontribuojn por "Bulteno", ne nur nenio pliboniĝis, sed la nombro de ensendaĵoj eĉ fariĝis nula.

LKK de la 9a kongreso lerte utiligis la modernajn rimedojn (gazetojn, radion), por propagandi niajn movadon kaj aferon. La unuan fojon partoprenis delegitoj el BG, H kaj PL. Kaj granda ĝojo kaj honoro estis, ke ĉeestis Stevan V. Stojnić, prezidanto de IAEF de 1924 ĝis 1930. S-ro Mollion, ĝen. prez. de FISAIC, distingis per francaj meritmedaloj la IFEF-prezidanton W. Stapel kaj la prezidantinon de JAFE, M. Milisavljević. En la 42a UK (Marseille) ne nur kunvenis denove fervojistoj el 9 landoj, sed ankaŭ ĉeestis germana filmteamo "Esperanto-Filmo-Germanujo", konsistanta el fervojistoj el Braunschweig. Ili tie produktis unuhoran sonfilmon 16 mm largan originale en Esperanto sub la titolo "Vojaĝo al Marseille". Estis filmo, kiu prezentis ĉarman rakonton, sed ankaŭ dokumentajn scenojn pri tiu kongreso.

1958

Venis 1958 kaj kun ĝi la jubilea 10a kongreso en Aarhus, kie plej altaj eminentuloj alparolis la kongreson esperantlingve. Sur la muroj pendis grandaj multkoloraj afiŝoj prezentantaj la insignojn de ĉiuj ĝistiamaj kongresoj. La kongreso aprobis la starigon de "Koresponda Servo" sub gvidado de k-go Biesheuvel (NL). La plej grava evento tamen estis, ke post 10 jaroj la unuan fojon oni elektis novan estraron, kiu nun konsistis el 5 personoj: K.G.J. de Jong (prez.), J. Lok (sekr.), E.R. Oosterwijk (kas.), H. Hoen (red.), J. Poptie (2a sekr.), denove ĉiuj el NL. Do, la restantaj estraranoj transprenis aliajn taskojn (krom la sekr.). LKK-prezidanto Kensing transdonis al IFEF novan flagon, kiu ekde tiam ornamis la kongresejojn. Jubileaj mondonacoj venis el 5 landoj al la IFEF-kaso. Aliaflanke la kotizo ekde 1959 plialtiĝis al 1,5 gld.

Regule nun en UK fervojistoj okazigis sian kontaktkunvenon. Impona ĝi estis en la 43a UK Mainz (D) 1958. La germana fervojo DB por la tuta kongressemajno liberigis 6 kolegojn, kiuj en uniformo kun manikobendo "Esperanto" deĵoris en aparta informejo. Faka ekskurso al la tiam plej moderna eŭropa centra regadejo en Frankfurt/Main kaj tradukita fakprelego de DB-prezidanto Geitmann allogis 60 fervojistojn el 9 landoj. Krome la uniformportantaj kolegoj akompanis la kongresan ekskurstrajnon. Ankaŭ en la SAT-kongreso 1958 en Helsinko kunvenis 15 k-goj el 9 landoj. Novan rekordon ni povas noti por la fino de 1958: la membronombro de IFEF kreskis al 2002.

1959

Ei tiu jaro ni ĉefe menciu, ke la 11a kongreso en Linz (A) akceptis aŭstrian proponon, laŭ kiu la emajla parto de la kongresinsigno por daŭro fariĝis oficiala IFEF-insigno. Krome oni konsistigis komitaton (pli poste komisiono), kies tasko estis zorgi pri pli altnivelaj fakprelegoj (vidu la koncernan ĉapitron). EFG prezentis 3 filmojn, i.a. pri la UK Marseille kaj Mainz, parte eĉ kun originalaj paroladoj de eminentaj UEA-anoj. En la sekvinta 12a kongreso (Helsinki 1960) la Fakprelega Komitato (FK) trovis sian definitivan formon. S-ro Mollion transdonis al Antti Ruhanainen honoran medalon de la urbo Paris. La Koresponda Servo estis likvidita pro manko de disponeblaj adresoj.

*Lokomotivo de kongresa ekskurstrajno en Aŭstrio kun la nova insigno 2.20(f)*

## 1961

En la 13a IFEF-Kongreso (Barcelona) la delegitaro akceptis germanan proponon, laŭ kiu estonte por protokolado de la laborkunsidoj estu uzataj sonbendoj. Tiel oni nun povis eviti neekzaktaĵojn en la protokoloj. Daŭris iom da tempo, ĝis kiam la nova maniero komplete funkciis. Tamen, alia flanko de tiu novaĵo estas, ke la postkongresa prilaboro de la protokoltekstoj daŭras pli longe ol laŭ nur skribaj notoj.

Necesas diri ĉi-loke kelkajn vortojn pri la "Regularo". Jam en la kongreso de Utrecht 1953 oni estis akceptinta novan (la kvaran) regularon kun 24 artikoloj. Novaĵoj en ĝi estis ekz., ke la art. 1 eksplikis, ke "La Internacia Federacio de Fervojistaj Esperantistoj" nun estis nomata "Internacia Federacio Esperantista Fervojista (IFEF)". En art. 3 la unuan fojon aparte estis menciita "fakterminaro". Laŭ art. 12 la "landaj organizoj" havu propran regularon kaj membroliston, de kiuj ili sendu kopiojn al la estraro. Longa art. 14 estis dediĉita al la ĉiujaraj kongresoj. Nove fiksita estis, ke delegitoj por po 100 landaj membroj havis 1 vocon, maksimume 6. Ankaŭ la voĉdonado la unuan fojon estis regulita. Art. 15 diris, ke "Informoj de la Federacia Estraro en LIF havas la aprobon de la estraro kaj estas decidaj". Laŭ tio eblis decidi sen kunagado de la delegitaro, kio povis kaŭzi nedemokratajn decidojn - kaj fakte kaŭzis. Tiu regularo el la jaro 1953 kelkloke estis ŝanĝita en la kongreso de Barcelona 1961 (kvina regularo). Ĝia plej grava ŝanĝo en art. 1 estis, ke IFEF "havas sian sidejon en la lando, kie loĝas la sekretario". Tio estis preparo por la tempo, kiam la estraro internaciigos kaj ne plu ĉiuj estraranoj loĝos en la sama lando. Konsekvence la postulo "loĝi en sama lando" ne plu ekzistis en la regularo. Krom la 24 artikoloj estis akceptita "Kongresa Regularo", kiu aldone al art. 14 priskribis pli detale la organizadon kaj financigon de la kongresoj kaj prezentis apartan artikolon pri la fakaj prelegoj.

La bilancsumo fine de 1961 intertempe estis kreskinta ĝis preskaŭ 5000 gld, la budĝeto por 1962 ampleksis preskaŭ 8500 gld, la federacio disponis pri kapitalo de 4200 gld. Sekve la financio estis sanaj kaj la kasisto kontenta pri la kotizpagado de la landaj asocioj. La membronombro kreskis kaj atingis 2439.

## 1962

Elstara fariĝis la 14a kongreso en Budapeŝto pro diversaj kaŭzoj, nome la alta nombro da kongresanoj (1004), aktiva partopreno de la samideana ministro Kossa kaj de la eminenta esperantisto Julio Baghy, eldono de speciala Esperanto-poŝtmarko, eldono de aparta gramofondisko kaj disponigo de liberaj biletoj por ĉiuj kongresanoj, valorega favoraĵo. Neforgebla la subtera engrota koncerto de la MÁV-sinfoniorkestro. Tiu kongreso krome estis la naskiĝo de l' posta "Junulara Sekcio" (vidu sesan ĉap.).

La estraro estis reelektita, nur la du sekretarioj interŝanĝis siajn postenojn, tiel ke Poptie fariĝis la kaj Lok 2a sekretario. Fine de tiu jaro oni povis legi unuafoje alvokon en LIF, ke pro antaŭvidebla ekŝiĝo de du estraranoj en 1963 kandidatoj ankaŭ nenederlandaj estu anoncataj.

## 1963

La jaro 1963 komenciĝis per trista evento: la 28an de Januaro mortis la eksprezidanto kaj Honora membro de IFEF, Walig Stapel, en la aĝo de 66 jaroj. La nekrologo precipe substrekiis liajn entuziasmigajn kongresparoladojn. 10 jarojn li estis gvidinta la federacion ekde la fondkunveno en 1948 ĝis la 10a kongreso, kaj li povis travivi dum tiu tempo kaj ankaŭ dum la jaroj ĝis sia morto la daŭran progreson de IFEF. Certe li

*Julio Baghy alparolas la 14an I FEF-kongreson 2.21(f)*

rimarkis, ke la gvidado de la federacio restis en bonaj manoj. Kaj kia kruela hazardo: la tagon antaŭe mortis Maarten Demmenie, iama sekretario de IFETT, tre meritplena persono dum kaj post la milito por la estonta IFEF.

Sed la jaro 1963 ankaŭ donis pli ĝojigajn rezultojn. Ekzemple okazis la unua internacia skisemajno de IFEF en Aŭstrio (vidu la sesan ĉapitron). Ĝojigaj ankaŭ estis la junulara aktiveco en la 15a kongreso (Stoke-on-Trent), la tiea verva festparolado de prof. d-ro Lapenna (tiam sekretario de UEA), la inaŭguro de Esperanto-strato kaj la impona partoprenado de oficialaj aŭtoritatuloj.

La kongreso akceptis polan proponon, laŭ kiu la nomo de la federacio pro bel sono iom estis ŝanĝita. El "Internacia Federacio Esperantista Fervojista" fariĝis "Internacia Fervojista Esperanto-Federacio". La mallongigo do restis "IFEF". Post longa diskutado oni krome akceptis svisajn proponojn, kiuj celis doni pli da respondeco al la delegitoj, estonte "komitatanoj". Tio estis la plej esenca ŝanĝo en la ĝistiam ekzistado de IFEF, ĉar ekde nun la delegitoj ne nur "ekzistis" dum kongreso, sed daŭre. Kaj ili - la komitato - fariĝis la leĝdona "parlamento", dum la estraro fariĝis plenumanta "registaro", respondeca al la komitato. Alia grave ŝanĝo estis, ke landa asocio ĝis 200 membroj rajtis je 1 komitatano kaj por ĉiuj komencitaj kromaj 200 po unu plia k-ano. Aldone la delegitoj elektis seskapan komisionon sub gvidado de O. Walder (CH), kies tasko estis, ellabori novan regularon.

Laŭ pola propono la dua sekretario Lok ricevis kaj transprenis la taskon, ellabori historion de IFEF, kio poste tamen ne okazis. Nur pene povis esti konservata kvinkapa estraro. Spite al la anonco, ke li ne plu estis reelektebla, k-go Lok lasis sin persvadi resti ankoraŭ unu jaron kiel asosoro. Nova redaktoro fariĝis k-go Burgler (NL), dum H. Hoen por emeritiĝo ekzistis kaj fariĝis Honora Membro. En LIF 5.63 aperis la nomoj de la novaj IFEF-komitatantoj.

Cetere en la 48a UK Sofia la aranĝoj por la fervojistoj estis tre variaj kaj vizititaj plej multnombro (300). Eĉ parolis la vicministro por transporto kaj komunikado. Bedaŭrinde fine de la jaro 1963 la movado denove perdis eminentan membron: mortis en Jugoslavio la iama prezidanto de IAEF, Stevan V. Stojnić.

Tute ne kontentiga estis la decido de la "Eŭropa Horarkonferenco" en Septembro. Laŭ ĝi ankaŭ estonte ĉiu fervojo laŭ sia bontrovo decidis, ĉu kaj kiujn fremdlingvojn ĝi uzas en sia horaro.

Kaŭĉuka sinteno al la bona propono de la Aŭstria Federaciaj Fervojoj. Tamen, fino bona, ĉio bona: la federacio atingis la membronombro 2502.

1964

Gravajn novaĵojn alportis la 16a kongreso en Bruselo. Tie ekfunkciis la nova komitato kun 21 membroj. Samtempe ĝi elektis el inter si ĉefkomitatanon, nome k-gon Jaap Labordus (NL). Li ĉefe estas administra peranto inter estraro kaj komitato. Tiu nova komitato tuj elektis novan estraron, kiu la unuan fojon konsistis el nur 4 nederlandanoj kaj unu sviso. Estis de Jong (prez.), Walder (CH, vicprez.), Poptje (sekr.), Oosterwijk (kas.) kaj Burgler (red.). Krome la komitato decidis plialtigi la jaran kotizon de 1,5 al 2,5 gld kaj konfirmis, ke d-ro Ferenczy (H) restas komisiito por junularaj aferoj.

Menciindas, ke en Septembro k-go Giessner prelegis en internacia kongreso de la fervojistaj radioamatoroj (FIRAC) en Hamburg. Li prezentis la avantaĝojn de Esperanto por ilia okupo kaj ofertis la helpon de niaj landaj asocioj. Oni tamen devis atendi ĝis 1980 81, por kolekti la unuajn fruktojn de tiu prelego. De tempo al tempo oni ankaŭ jetu rigardon al la ciferoj de la kasisto: Bilancsumo fine de 1964 = 4912 gld, (1965 = 333 gld), budĝeto por 1965 = 11088 gld.

1965

Denove batis la morto. La 15an de Februaro tutsubite forpasis la redaktoro D. Burgler en la aĝo de 61 jaroj. Estis kortusa gesto, ke tuj lia vidvino, E. Burgler-Jeszó, transprenis la taskon de la edzo, tiel, ke LIF n-ro 3 jam aperis sub sia redaktado.

Ĝojiga evento en la 17a kongreso (Hamar) estis akcepto de nova landa asocio, nome la ĉeĥoslovaka, kun provizore 60 membroj. La meritplena, longjara sekretario Jan Lok (kun karesnomo "motoro de IFEF") estis nomumita Honora Membro, vere pli ol merita omaĝo. Publike tre efikan aranĝon travivis la kongresanoj en Elverum, kie oni inaŭguris Esperanto-straton. La statut-komisiono prezentis post du-jara

laboro novan statuton, kiun la komitato post longa diskutado akceptis. Ĝi estis la sesa dum la ekzistado de IFEF.

La kongreso krome decidis okazigi "Referendumon" pri LIF, kiu aperis en n-ro 5/65. Oni demandis pri kutimoj de legado, enhavo, formato kaj eksterajoj. Kritiko kaj sugestoj estis petataj. Jen kelkaj vortoj pri la rezulto de tiu referendumo (aperis en LIF 1/67): respondis 114 legantoj el 16 landoj. 92 % el ili regule legis la revuon. 83 % kontentiĝis pri la enhavo kaj 85 % pri la formato, 77 % konservis la revuon, 23 % deziris ŝanĝojn de la eksterajoj. La UK ĉi-jare okazis en Tokio. Ĝojige eĉ tie la fervojistoj sukcesis aranĝi kontaktkunvenon kun 18 partoprenantoj el 8 landoj.

1966

Tiu jaro diversilate progresigis la federacion. Tio ĉefe evidentigis en la 18a kongreso en Utrecht. Tie la statutkomisiono prezentis la anoncitajn tekstojn de "Ĝenerala Regularo" kaj "Kongresa Regularo", kiuj kompletigis la statuton de 1965. La komitato akceptis ambaŭ, tiel ke IFEF nun havis Statuton kun Regularoj, kiuj bone taŭgis por demokrate gvidi kaj administri la federacion. Sekve la unuan fojon estis alelektitaj du junularaj kromkomitatantoj.

El la kongresproponoj pleje gravis tiu de la svisoj, laŭ kiu IFEF fariĝu "Aliĝinta Faka Asocio de UEA". Tiu propono kaŭzis longan, parte akran diskutadon, ĉar kelkaj timis perdon de la sendependeco de IFEF. Tamen fine ĝi estis akceptita per 12 kontraŭ 8 voĉoj. La komitato de UEA akceptis tiun aliĝon de IFEF la 30an de Julio 1966. La jaroj de post tiu akcepto pruvigis, ke la timoj estis senkaŭzaj. Neniam iu ajn provis subfosi la federacian sendependecon.

Krome reelektiĝis la tuta estraro. Kaj la kongreso sendis telegramojn al la 90jara E.M. Rosher, kiu tre meritplene laboris por la fervojista movado inter la militoj kaj post la dua milito, kaj al la eksiginta prezidanto de FISAIC, d-ro Mollion, fidela amiko de IFEF. Kiel rezulton de la terminara laboro la germana asocio prezentis bonkvalite presitan terminareton germana-Esperanto-germana kun 2000 terminoj. Estis prilaborinta ĝin k-go Ritterspach (D). Grava novaĵo en IFEF-kongreso estis, ke la unuan fojon okazis ekumena diservo, kaj ke ĉiuj gastoj en la malferma solenaĵo salutis en Esperanto.

Vere mirindajn aranĝojn povis travivi la multnombraj fervojistoj, kiuj ĉeestis la 51 an UK en Budapeŝto. La hungaraj k-goj organizis kontakt-kunvenon kun fakprelego en ĉeesto de la ĝenerala direktoro de MÁV, K. Rödönyi, belajn ekskursojn, unu eĉ per speciala trajno. La prezidanto de la hungara IFEF-asocio, d-ro Bácskai, inaŭguris Esperanto-parkon. Kaj lasta gravajaĵo el tiu jaro notindas: FISAIC principe traktos estontajn IFEF-kongresojn (en FISAIC-landoj) FISAIC-aranĝoj kaj konsentas medalojn al IFEF-anoj pro meritoj.

1967

La tiujara 19a kongreso en Fulda fariĝis la unua sub aŭspicioj de FISAIC. Ties ĝeneralprezidanto d-ro Emile Schlessler (L) ĉeestis la tutan kongreson. Li salutparolis en Esperanto kaj mem distingiĝis tri IFEF-anojn per medaloj, nome J. Geroldinger (A), Th. Blaauw (NL) kaj H. Hunkeler (CH). Aliaj "unuajaĵoj" en tiu

*La IFEF-insigno por Honoraj Membroj (la krono aspektas orsimile) 2.23(f)*

*Medalo de FISAIC (oro-, arĝento- aŭ bronzo-simila), la flamo sur la flugilrado estas ruĝa, la literoj FISAIC nigraj. 2.23(f)*



kongreso estis teatra vespero, 2 fakprelegoj (el kiuj unu estis verkita kiel kompara kaj konkluda resumo internacia el la kontribuajtoj de 11 landoj), inaŭguro de du Esperanto-stratoj (Fulda, Hilders), futbalmaĉo inter IFEF-teamo kaj loka, parado de uniformportantaj kolegoj el 14 landoj, lingvaj ekzamenoj. Okaze de la kongreso aperis Esperanto-eldonaĵo de la "Internacia Konvencio pri la Fervoja Pasaĝer- kaj Pakajtransporto" (CIV), tradukita de W. Barnickel (D), reviziita de G. Ritterspach (D).

La kongreso diskutis i.a. la rilatojn al la radio-amatoroj. Kaj jam antaŭjetis sian ombbron la fakto, ke en la venonta jaro la tuta estraro intencos retiriĝi. Kiel aliĝinta faka asocio de UEA IFEF nun havis rajton je unu komitatano A por la UEA-komitato. Kiel tiu estis elektita d-ro Bácskai (H). La ĉefkomitatano de IFEF, Labordus (NL), demisiis. Anstataŭe la komitato elektis Kurt Greutert (CH).

En 1967 la 9an fojon okazis Eŭropa Feria Semajno en CH, same kiel ĉiujare de post 1963 okazis IFEF-skisemajno en A kaj jam 14 foje feriosemajno en Zwolle (NL).

Jam denove batis la morto. Li forprenis la longjaran (1948 -1963) estraranon Harmen Hoen, 68 jarojn aĝa. Li estis kunfondinto kaj Honora Membro de IFEF, trankvila, ideoriĉa, tre laboborema homo.

1968

En LIF n-ro 1 aperis alvoko por pliintensigi la kunlaboron kun la radio-amatoraj.

6 IFEF-landaj asocioj deklaris sin pretaj helpi. Tamen, la alia flanko ne montris intereson.

1968 denove fariĝis decida jaro en la historio de IFEF. En la 20a kongreso (Varna) la ĝistiam estraro demisiis. Necesis elekti novan. La unuan fojon la federacio ricevis vere internacian estraron, nome Joachim Giessner (D, prez.), Gvozden Sredić (YU, vicprez.), Elfriede Kruse (D, sekr.), Otto Walder (CH, kas.) kaj Per Johan Krogstie (N, red.). La nova prezidanto trovis varmajn agnoskajn vortojn por la ekŝiĝintaj estraranoj, pri la "nederlanda epoko". Li akcentis, ke ilia 20jara agado kondukis post detrua milito el nenio al internacie estimata federacio. Kiel lastan agon la ekŝiĝanta estraro transdonis al la federacia membraro la kajeron "Historio de la Fervojista Esperanto-Movado 1908-1968".

En la kongresa junulara kunveno ĉeestis 32 gejunuloj el 8 landoj. Oni i.a. pritraktis laborplanon kaj celis pliintensiviĝi la kunlaboron kun TEJO. Precipe altnivela estis la kultura programo, denove LKK ofertis du fakprelegojn. Kaj post la kongreso ĉiu IFEF-ano povis legi en LIF oficialajn raportojn kaj protokolojn pri la laborkunsidoj. Ŝanĝiĝis ankaŭ la gvidado de la Fakprelega Komisiono.

J. Giessner transdonis ĝin al inĝ. Willi Brandenburg (D). Krome nova, valora tradukaĵo aperis, nome la "Internacia Konvencio pri la Fervoja Vartrafiko" (CIM). Prizorgis ĝin J. Zupanić kaj inĝ. L. Sekereš, reviziis G. Sredić (ĉiuj YU). Interesan kongresproponon prezentis NL. Ĝi koncernis la tiaman artikolon 22 de la statuto, laŭ kiu membroj sen funkcio ne rajtis partopreni en komitatokunsidoj. La komitato decidis, ke - provizore kiel eksperimento - estonte estu unu nepublika kunsido, dum la aliaj estu publikaj. Tiel fakte la intereso de multaj membroj por la federaciaj problemoj vekigis. Kaj denove la kongresanoj ĝuis liberan bileton de 1a klaso por ĉiuj bulgaraj trajnoj, kiel jam 1962 en Hungario, vere afabla gesto.

En la UK Madrid okazis fervojista kontaktkunveno kun 28 personoj el 10 landoj. La norvega asocio starigis apartan fonduson de 1000 kronoj, el kiu estonte povos esti subvenciataj unuopuloj kaze de devizaj malfacilaĵoj.

*La unua komplete internacia estraro en 1968, de mald. Walder (CH), Giessner (D), Kruse (D), Sredić (YU), Krogstie (N) 2.24(f)*

1969

En LIF n-ro 1 la prezidanto klare kaj detale prezentis la signifon de la nova stato "Aliĝinta faka asocio de UEA". Li demandis: "ĉu vere iu povas suspekti, ke serioza estrarano aŭ komitatano de IFEF endanĝerigus ties memstarecon kaj sendependecon?" Ne nur al UEA, sed ankaŭ al FISAIC la rilatoj pliintensigis. De post la kongreso de Varna IFEF ekklopodis plekti kontaktojn inter FISAIC kaj kulturaj organizoj fervojistaj en socialismaj landoj. En la 21a kongreso (Avignon) denove FISAIC estis reprezentata kaj honorigis du IFEF-anojn per medaloj, nome K.G.J. de Jong (NL) kaj G. Lemonnier (F).

Gravaj rezultoj en Avignon: Reelekto de K. Greutert kiel ĉefkomitatanon kaj de d-ro I. Bácskai kiel komitatanon A de UEA. Greutert krome estis proponita kiel k-ano B de UEA kaj poste elektita.

De kelka tempo estis senditaj ĉiam komence de la jaro demandiloj al la landaj asocioj, en kiuj estis starigitaj demandoj pri organizado, informado, junulara agado, terminara laboro ktp.

El la respondoj la vicprezidanto verkis resumon, kiun li en la kongreso laŭtlegis. Ĝi ne nur donis bonan superrigardon pri la agado de la landaj asocioj, sed ankaŭ impulsojn por propraj ideoj. De tiam ĉiujare estas prezentita tia resumo, kaj en kongreso kaj en la internacia organo.

Ĉar dum la pasintaj jaroj evidentiĝis la neceso, ŝanĝi kaj kompletigi gravajn paragrafojn de la statuto, en Avignon oni starigis novan statut-komisionon sub gvidado de W. Barnickel (D). La kongreso akceptis - laŭ petskribo de Fervojista-Esperanto-Rondo Rumanio - tiun landon kiel 19an landan asocion de IFEF kun 40 membroj. Bedaŭrinde la anoncitaj rumanaĵ k-joj povis alveni nur post fino de la kongreso.

La komitato konsentis kontrakton inter la Junulara Sekcio de IFEF kaj TEJO.

La vicprezidanto urĝe petis liveri materialon por la junulara paĝo de LIF.

Grandan oferemon montris la IFEF-anoj pagante kotizojn por la nepagipovaj kolegoj. En somero 1969 tio estis sumo por 171 kotizoj. Per speciala artikolo en LIF 4 la prezidanto atentigis pri la 60a naskiĝtago de IFEF. La sama numero anoncis, ke aperis du novaj terminaretoj en H kaj N, krome ĝenerala vortaro rumana. En la UK Helsinki (nia membro mag. G. Narvala prez. de LKK) kunvenis 50 k-joj el 14 landoj. Prezidanto Giessner referis pri Esperanto antaŭ la ĝenerala asembleo de FISAIC en Madrid kaj disdonis la tekston en franca kaj germana lingvoj (laborlingvoj de FISAIC) al la delegitoj. Li povis forigi kelkajn miskomprenojn kaj doni klarigojn pri IFEF en la diskutoj.

Mortis du eminentaj membroj de IFEF en 1969, nome Edward Marshall Rosher (GB, 93jara) kaj Hugo Steiner (91jara) en Wien, fondinto kaj direktoro de la tiea Internacia Esperanto-Muzeo.

1970

La internacia organo aperis en nova vestaĵo, pli moderna, ne plu "funebra", sed pli hela, kun la IFEF-emblemo.

En formato A5. Ĝi nun nomiĝis "Internacia Fervojisto" (IF). La lasta jareldonaĵo de LIF havis 108 paĝojn.

Alia ĝojiga fakto estis, ke komence de la jaro IFEF atingis la rekordan membrostaton de 3001, fine de 1970 eĉ 3050.

Ankaŭ la tiujara 22a kongreso en Rimini estis certagrade rekorda, nome pro la preskaŭ ĉiutagaj strikoj de iu, ĉu de ŝoforoj, poŝto, fervojo, ĉu de turismaj agentejoj, ĵurnalistoj. Grandegan laŭdon meritis LKK kaj la prezidanto (tiam neesperantisto!) de la fervojista libertempa organizo en Bologna, s-ro Ceci, kiuj tamen ĉiutage improvizis kaj savis la kongreson. Denove FISAIC estis reprezentita en la persono de mag. Bieckmann (NL), kiu distingis du IFEF-anojn per medaloj (Lok, NL kaj Giessner, D). D-ro Ferenczy (H) transdonis la gvidadon de la Junulara Sekcio al J. Mevel (F), kiu deklaris necesaj pli da aktivecoj. La IFEF-estraro estis reelektita. Estis formita Honora Patrona Komitato (stat. § 7d), kies unuaj membroj fariĝis d-ro E. Schlessler (L), ĝen. prez. de FISAIC, inĝ. J.A. Pahin (F), prez. de la franca FISAIC-sekcio kaj s-ro P. Ceci, direktoro de regiono Bologna de la itala fervojista kulturorganizo. Stratnomigo okazis en Castel San Pietro Terme.

La unuan fojon ĉi-jare la Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno ne okazis en Aŭstrio, sed en Ĉeĥoslovakio.

En la UK Wien denove okazis kontaktkunveno kun 47 gek-joj el 8 landoj.

En Eŭropa Kongreso de la Amikaro de staciestroj en Luxembourg la IFEF-prezidanto prelegis pri Esperanto. La teksto estis liverita al la 200 ĉeestantoj en 5 lingvoj, krome plurlingvaj informoj de UEA. La kongreso en Avignon estis decidinta krei internacie uzeblan afiŝon. Ĝin grafike evoluis la germana asocio, kaj en 1970 ĝi estis presita en Hungario. Ĝi portis nur la vorton "Esperanto".

1971

La jaro komenciĝis per Skisemajno en la francaj Alpoj. Jam en printempo estis ekkoneble, ke la invito por 1972 al kongreso en Praha devos esti nuligata pro internaj kaŭzoj en CS. Estis la svisaj kolegoj, ĉefe Greutert kaj Walder, kiuj spite al malfavoraj cirkonstancoj savis la kongreson, Invitante ĝin al Lugano.

En la 23a kongreso (Maribor) alektiĝis kvara membro al la Honora Patrona Komitato, nome inĝ. K. Rödönyi, unua anstataŭanto de la hungara ministro por poŝto kaj trafiko. Ricevis medalojn el la mano de la FISAIC-reprezentanto G. Gilles (B) la k-joj Blondeaux (F), Ritterspach (D) Zupanić (YU). La jugoslava k-go L. Prebil, kiu jam 1929 aktivis en la tiama internacia estraro, estis honorigita per donacaĵo. La ĉefkomitatano Greutert estis reelektita, same d-ro Bácskai kiel komitatano A de UEA. Aperis nova terminareto, la kvara, en serbokroata lingvo. Grandanime la Jugoslavijaj Fervojoj donis al ĉiu kongresano senpagan bileton de 1a klaso por la tuta reto.

La ĉefkomitatano prave plendis pri nekontentiga kunlaboro de la k-anoj. En la 3 laborkunsidoj estis pri-traktitaj - kiel kutime - multaj raportoĵoj, demandoj, proponoj. La tagordoj de tiuj kunsidoj ampleksas proksimume 30 punktojn. Aldoniĝis la komisionaj kunvenoj. La ĉiama malsano tamen estis - konata jam de jardekoj - ke faritaj decidoj ofte restis neplenumitaj. Aŭ male, ke malakceptitaj, ne fareblaj proponoj post kelkaj jaroj reaparis, tiel ke ĝia traktado forrabis valoran tempon. Ofte la proponantoj ne ekkonis la kapablojn kaj limojn de la federacio. Interesan enketon faris la ĉefkomitatano pri la nombro kaj personaj indikoj de fervojistaj UEA-delegitoj. Krom la petitaj scioj (respondis 46 el 100 alskribitaj), pere de tiu enketo ni gajnis 21 novajn fakdelegitojn "fervojo" ĉe UEA. La kontaktkunveno en la UK London vizitis 25 k-joj el 9 landoj, kiel kutime lasttempe kun faka prelego (vidu tabelon pri fakprelegoj).

Tre instrua artikolo kun kompara tabelo pri 15 landoj kun la titolo "Klerigado ĉe fervojaj administracioj" aperis en IF 5/71. Verkis ĝin F. Lautenbach (D). Okaze de la 25jara jubileo de la nederlanda asocio aperis terminareto nederlanda-Esperanto-nederlanda kiel kvina en la vico.

La membronombro fine de 1971 estis 2836. La malkresko ĉefe estis kaŭzita de devizaj komplikajtoj.

1972

Ĉi-jare en la 24a kongreso (Lugano) IFEF ricevis novan statuton post trijara laboro de la koncerna komisiono. Novaj statuto, regularo kaj aldonoj komune anstataŭis kaj kompletigis la ĝistiaman statuton. Ke ili saĝe estis verkitaj pruvas la fakto, ke de post tiam ili validas, kaj nur malmultaj modifoj necesis.

El la estraro du k-joj estis anoncintaj sian demision, nome vicprezidanto Sredić kaj kasisto Walder. Laŭ peto de la komitato, Walder tamen deklaris sin preta, kandidatiĝi denove por 2 jaroj. Estis elektitaj: Giessner (D, prez.), v. Leeuwen (NL, vicprez.), Kruse (D, sekr.), Walder (CH, kas), Krogstie (N, red.). Nova membro de la Honora Patrona Komitato farigis d-ro inĝ. G. Azzi (I). LKK aranĝis tre efikan gazetar-servon, kiel entute la publika informado estis bonega.

El la raporto, verkita de la junulara gvidanto, bedaŭrinde ekkoneblis, ke la klopodoj, okazigi junularajn aranĝojn, pro kulpo de la neinteresitaj gejunuloj komplete fiaskis. Estis rezulto de evoluo, kiu jam de kelka tempo kiel minaca nubo pendis je la federacia ĉielo. Laborplanoj ĉiujaraj sen vivo ne sufiĉis.

Ni fine raportu pri bone sukcesinta provo, komune organizi jarkunvenojn de kelkaj asocioj samloke. Tio okazis en Oktobro en Clervaux (L), kie kunvenis la k-joj el B, D kaj F. Fariĝis minikongreso kun elstara programo kaj ĉeesto de eminentaj personoj. La apuda intenco, fondi IFEF-asocion en L, bedaŭrinde fiaskis.

## 1973

La jarraporto de la sekretarioj denove enhavis plendojn, ke kongresdecidoj ne estas plenumataj de multaj k-anoj kaj landaj asocioj. Krome ĝi klare tuŝis timigan problemon, nome la daŭre kreskantan nombron de emeritoj (tiam 23 % de la membraro).

Duan fojon la danoj estis invitintaj jubilean kongreson, nome la 25an, al Aarhus. Kelkmaniere ĝi estis elstara. Funkciis modela gazetara kaj informa servo kun 5 prikongresaj "Bultenoj". Aŭtoritatuloj persone salutis. Ankaŭ d-ro Schlessner, prezidanto de FISAIC, esperantlingve salutis kaj honorigis la meritplenan k-gon J. Christoffersen (DK) per medalo, dum la prezidanto de LKK, I. Kensing, estis nomumita Honora Membro de IFEF. Ricevis honoran donacaĵon la dana k-go N.C. Thorsted. Veterana kunveno, kie alparolis eks prezidanto de Jong, donis specialan akcenton. Jam de kelkaj jaroj kaj denove en tiu kongreso montriĝis, ke estis saĝa decido, allasi la publikon al la laborkunsidoj. Ĝojige granda estis la intereso. La kasisto povis akcepti 1750 sv.fr. kiel jubilean donacon de kelkaj landaj asocioj. GEFA donacis novan flagon al IFEF kaj pagis la elspezojn por la nova statuto. Elektiĝis denove K. Greutert kiel ĉefkomitatano. Inĝ. L. Sekereš (YU) transprenis la gvidadon de TK. En la plenkunsido 17.5. estis akceptita Japanio kiel 20a landa asocio, kiun la sekretario E. Kruse poste vizitis la saman someron. Novaĵo estis, ke la kongreso decidis pri rezolucio, ĉar en Lugano ĵurnalistoj instigis fari tion.

En UK Beograd okazis apud fakprelego en la kontaktkunveno (35 k-joj el 12 landoj) dua prelego de mag. G. Sredić en la Internacia Somera Universitato. Estis unikaĵo, ke fervojisto prelegis en tiu universitato pri fervojfaka temo.

## 1974

La unua numero de IF entenis instruan rezulton de internacia enketo pri kelkaj laborkondiĉoj de fervojistoj, kiun lanĉis la japana asocio en 1972. La sama numero anoncis vortaron Esperanto-slovaka-Esperanto verkitan de S.R. Seemann (CS). En la dua n-ro sekvis artikolo pri "memdisciplino", el kiu ni jen citas vortojn de Zamenhof el lia adiaŭna parolado en la 8a UK 1912: "Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajtaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto" (fino de la ĉitaĵo). Vere gravega maksimumo por la funkcio de internacia organizo kiel la nia nepre priatendenda.

Krome aperis listo de fervojistoj estantaj UEA-fakdelegitoj (77) kaj aliaj delegitoj (2) de UEA.

Venis la 26a kongreso en Tarragona. Pro demisioj de la kasisto kaj redaktoro devis esti elektataj novaj estraranoj. Ekde nun funkciis J. Giessner (D, prez.), W. van Leeuwen (NL, vicprez.). E. Kruse (D, sekr.), H. Hauge (DK, kas.) G. Delaquaize (F, red.). La adiaŭanta kasisto (kaj iama vicprezidanto) Otto Walder (CH) ricevis FISAIC-medalon pro sia jardekojn longa agado. Lastmomente

*Babilado en la 25a kongreso. de mald. d-ro Schlessner (L), ĝenerala prez. de FISAIC, Kensing (DK), prez. de LKK, Kruse (D), sekr. de IFEF. 2.27(f)*

*La estraro en 1974. de mald. Delaquaize (F) Giessner (D). van Leeuwen (NL) Kruse (D), Hauge (DK). 2.27(f)*

troviĝis posteulino por la gvidado de la Junulara Sekcio: Mirella Merlani (I), D-ro Bácskai (H) denove elektigis k-ano A de UEA, K. Greutert (CH) poste ankaŭ reelektigis k-ano B, Krome oni decidis, starigi "Japanan Fonduson", por iam plifaciligi al japana k-go la vojaĝon al IFEF-kongreso. Unuan fojon okazis forumo, kiu allogis kelkajn dekojn da kongresanoj, kiuj starigis multajn demandojn pri la hispanaj fervojo, lando, kutimoj kaj ricevis respondojn. Kaj denove la kongreso starigis rezolucion.

En la UK Hamburg la Germana Federacia Fervojo DB deĵorigis 6 k-ojn dum la tuta semajno en speciala DB-giĉeto en la kongresejo. Kunvenis en Fervojista Tago 80 k-joj el 17 landoj. Akceptis ilin la prezidanto de la direkcio. Sekvis tuttaga programo. Sed ankaŭ falis ombroj el tiu UK, kie prezidanto prof. d-ro Lapenna forlasis UEA, kiun li ne plu opiniis esti neŭtrala. La IFEF-prezidanto pro tio en IF 5/74 emfazis la nepran neŭtralecon de la federacio.

1975

La sekretaria raporto plendis, ke en skriba voĉdonado pri grava temo el 29 komitatanoj nur reagis 13, pro kio ne validis la voĉdonado. Hontiga sinteno. Pro transiro de la presado de IF el N al F la preskostoj tiel abrupte plialtiĝis, ke en 1974 "Internacia Fervojisto" nur povis aperi kvinfoje. Ekde n-ro 3/75 IF estis presita en NL. Malaperis la verda koloro en la emblemo. Pro tio kaj kelkaj aliaj ŝanĝoj la prezo fine fariĝis tolerebla.

La 27a kongreso en Villach montris la timon de kelkaj membroj, ĉefe francaj, kiuj spite al la klara deklaro de la prezidanto en IF 5/74 deziris starigon de speciala komisiono, por kontroli la neŭtralan vojon de UEA. Post kelkfoja diskutado kaj malsaĝa agado de unuopuloj la komitato malakceptis tiun proponon.

Same nur post hezito ĉk Greutert konsentis reelekton, kio okazis unuanime. Kaj nur malfacile eblis trovi du junularajn kromkomitatanojn.

Flanke de FISAIC estis honorigita per medalo la sekretariino E. Kruse (D), dum eksprezidanto de Jong (NL) kaj eksvicprezidanto O. Walder (CH) estis nomumitaj Honoraj Membroj de IFEF, Okazis stratnomigo en Arnoldstein kun plantado de arbo. Denove forumo, futbalmaĉo, eĉ oratora konkurso, kaj ankaŭ rezolucio. Estis starigita komisiono por varbado informado sub gvidado de P. Robiulle (F). Krome en 1975 fondiĝis komisiono por verki novan historio-broŝuron pri IFEF, eldonotan en la jubilea jaro 1984, Gvidis ĝin J. Giessner (D).

En la kontaktkunveno, pli ekzakte "Fervojista Tago", en la UK Kobenhavn kunvenis 45 k-joj el 11 landoj. La danoj organizis tre instruan programon. En Aŭgusto mortis la eksprezidanto de FISAIC, d-ro Marcel Mollion (F), sincera amiko de Esperanto.

La ĝenerala situaco ĉe la plej multaj fervojoj, ties konkurencebatalo kontraŭ la ŝosetraffiko, la aŭtomatigado kaj raciigado kun la konsekvenco, ke daŭre plimalaltiĝis la nombro de fervojistoj, krome la materialisma vivkoncepto, la deziro je vivĝuado kaŭzis, ke pli kaj pli komplikiĝis trovi novajn membrojn, tutspeciala junajn. Pro tio la ideoj de la nova junulara gvidantino nenie trovis eĥon. Tio estis ankaŭ unu el la kaŭzoj, kial en 1975 lastfoje ni "svebis" ĉirkaŭ la membronombro 3000, Ni atingis 2986, La postaj jaroj alportis regreson. En Oktobro ekfunkciis Fervojista Koresponda Servo (FKS), prizorgita de A. Giovenal (F).

1976

En la unua numero de IF ni trovis plendon de la gvidanto de FK.

Li tre bedaŭris, ke aperis tekstoj resp. prelegoj lingve ne aprobitaj de kompetentuloj. Pro tio FK nun verkis gvidliniojn (krom la regularo), kiujn oni nepre priatentu.

Okaze de la 28a kongreso en Skellefteå denove tri meritplenaj membroj de la federacio estis nomumitaj Honoraj Membroj, nome d-ro I. Bácskai (H), mag. N.G. Narvala (SF) kaj N.C. Thorsted (DK). Harry Bengtsson (S) estis distingita per FISAIC-medalo. Ĉefe dank' al la aktiveco eblis eldoni terminareton sveda-Esperanto-sveda. Kiel nova komitatano A de UEA elektigis post demisio de d-ro Bácskai d-ro Phersy (H).

Du tre bedaŭrindajn decidojn la komitato devis fari. La unua estis la eksigo de la pola landa asocio, de jaroj apenaŭ ekzistanta. Spite al kelkjaraj klopodoj de estraro kaj ĉk nek venis respondo de Pola Esperanto-Asocio, kiu devis decidi,

nek venis kotizoj. Krome evidentiĝis, ke la gvidantino de la Junulara Sekcio pro malsano devis rezigni. Pro tio necesis la dua decido, laŭ kiu nur sub provizora gvidado de la kromkomitato E. Quietensky (A) la Junulara Sekcio povis pluekzisti. Por helpi al la junularo, estis kreita moderna aŭso sen teksto, kiu estis je dispono de ĉiuj landoj.

Por la komisiono varbado informado la kongreso aranĝis specialan "kolektadon" de ideoj. Ĝi fakte liveris multajn ideojn, kiuj poste estis al klopodoj da la komisiono tamen apenaŭ estis efektiviĝitaj. La kongresrezolucio ĉi-foje estis distribuita en lingvoj Esperanto, sveda, franca kaj germana.

FISAIC preparis sian 25jaran ekzistadon. Por tial planita festbroŝuro ankaŭ IFEF liveris kontribuojn, Ni, krome, sed sen rezulto, klopodis, plisimpligi la burokratan proceduron por akiro de medaloj.

La daŭra granda amplekso de la administra laboro en la estraro ekkoneblis el du ciferoj: 464 korespondajoj alvenintaj ĉe la sekretario en unu jaro, 501 forsenditaj. Aldoniĝis dekoj da korespondajoj de aliaj estraranoj kaj centoj da legendaj revuoj. Krome la estraranoj ĉiujare vizitis multajn aranĝojn de landaj asocioj. Fine ni menciuj, ke la germana asocio GEFA eldonis internacie uzeblan kajeron "Konversacia Kurso", al kiu baldaŭ sekvis dua kajero por progresintoj.

"Aktivu - progresu, vojo al sukceso". Ambaŭ prilaboris la germana k-go H.D. Hartig. La sama k-go fine de 1976 ekrealigis la aperadon de "Terminara Kuriero" kiel interligilo de la TK-anoj. Tiu modesta, sed efika nova organo baldaŭ montriĝis forta helpilo kaj progresilo por la terminara laboro.

1977

Jam en 1976 montriĝis, ke la ĉk ne plu kontentiĝis pri la agado de la estraro. Post parte akraj deklaroj kontraŭ unuopaj estraranoj kaj klariga cirkulero flanke de la estraro venis la 29a kongreso en Swanwick. LKK-prezidanto Barks spite al sia aĝo (81) kuraĝis organizi la kongreson kaj tiel zorgis, ke la ĉiujara ĉeno ne rompiĝis. Decas menciuj, ke la IFEF-sekretariino 2 semajnojn helpis en la preparado kaj ke la bonega Gazetara Servo funkciis helpe de la danaj k-goj Hauge kaj Olsen.

Ĉk Greutert deklaris sin ne plu reelektebla. Kiel nova ĉk elektiĝis k-go Lucien de Sutter (B). En la kongreso d-ino Marjorie Boulton prezentis du altnivelajn prelegojn, krome kiel novaĵon en IFEF-kongreso ŝi instruis la lingvon al multaj interesuloj. Surloke ŝi fariĝis nova membro de la HPK. Pli poste ŝi transdonis ĉiujn ĝistiamajn fakprelegojn al la universitato Oxford.

Same en Swanwick fariĝis Honoraj Membroj G. Gimelli (I), J.J. Labordus (NL) kaj J. Řebiček (CS), FISAIC-medalon ricevis H. Barks (GB). Pro kompleta manko de gejunuloj kaj ties gvidantoj la komitato ne povis agi alie ol "ripozigi" la Junularan Sekcion. Tio estis la provizora fino de bedaŭrinda evoluo en la pasintaj jaroj.

Alia malagrabra novaĵo venis el Bulgario. Pro ŝtata dekreto la tiea i.a., ne plu rajtis resti membro de IFEF. Kaŭzo estis valutaj malfacilaĵoj. El Rumanio leteroj ne estis responditaj, same kiel la situacio en PL ne sanĝiĝis. La membronombro malkreskis al 2731. Pro klopodoj de G. Sređić la internacia kompanio "Intercontainer" eldonis sian multkoloran ilustritan propagandilon ankaŭ en Esperanto. Kelkaj kompletigoj de la statuto estis publikigitaj en IF 6/77.

1978

Denove montriĝis, kiel forte dependas la vivo de la Internacia Lingvo de la paco, ne nur ne-milito, sed ankaŭ enlanda paco. Venis la 30a en Roma. Sed gravaj nuboj ĝis lasta momento svebis super ĝi pro murdo je altranga itala politikisto. Preparado kaj programo estis forte ĝenataj. Ĝi tamen sukcesis. La emeritaj k-goj J. Bürger (A) kaj P. Poly (F) estis nomumitaj Honoraj Membroj. La estraro estis reelektita. La ĝenerala sekretario de FISAIC, F. Knop (D), ĉeestis la tutan kongreson. La unuan fojon du japanaj k-goj oficiale reprezentis sian i.a. en IFEF-kongreso, K-go Giovenal (F), gvidanto de la kontentige funkcianta Koresponda Servo, transdonis la gvidadon al k-go Demissy (F).

Esperante, ke la bulgara mizero restos provizora epoko, la komitato "ripozis" la membrecon de Bulgario. Kaj kvankam la financa situacio de IFEF post 6 jaroj finfine postulis kotizaltigon, la komitato malakceptis la koncernan kongresproponon.. Tio kaŭzis torenton da korespondado kaj cirkuleroj dum la sekvonta tempo kaj unu jaron poste eĉ ŝanĝojn en la statuto.

En la 63a UK Varna (BG) denove okazis

fervojojista kontaktkunveno. Cetere jam de jaroj aperis koncizaj indikoj pri IFEF en la jarlibro de UEA. Mag. Narvala (SF) prezentis tradukon de la "Ĝeneralaj Transport-kondicoj el la Internacia Tarifo por Transporto de Pasaĝeroj kaj Pakajoj" (TCV). Krome aperis nova terminaro franca-Esperanto-franca kun 4700 terminoj, prilaborita de A. Blondeaux (F) kaj J. Bipp (CH). Ĝi estis la sepa en la vico.

La internacia organo IF povis festi sian 30an naskiĝtagon. sed samtempe suferis pro subita translokiĝo de la nederlanda presejo alilanden. Rapidege la estraro devis trovi solvon. Ekde n-ro 3/78 IF estis presita en Aarhus (DK). kie danaj k-joj povis helpi. La jaro finiĝis per funebra okazintaĵo: nur du monatojn post sia 80a naskiĝtago mortis la 28an de Novembro Jan Lok, unu el la plej meritplenaj IFEF-anoj, klarvida, bonkora, fidinda. pli ol laborema kolego.

1979

La jaro komenciĝis per jubileo: okazis la 20a IFEF-skisemajno, ĉi-foje en Maria Alm (A). Kaj dum la plej longaj tagoj de la somero renkontiĝis la fervojistoj en la 31a kongreso en Turku. Samtempe tie FISAIC aranĝis sian prezidantaran kunvenon. La vicprezidanto de IFEF, W.L. van Leeuwen, estis dekoraciita per FISAIC-medalo. La ĉk estis reelektita.

Demisiis la gvidanto de FK, kiun nun ekgvidis G. Thuesen (DK). La kongreso akceptis gravan statutŝanĝon, laŭ kiu je voĉdonadoj nur ankoraŭ estos kalkolataj la jes- resp. ne-voĉoj. Oni esperis, ke tiamaniere la komitatoj kaj l.a. pli zorgeme esprimos sian opinion kaj ne plu tiom abundos sindetenaj voĉoj. Krome akceptiĝis ĉi-foje la proponita kotizplialtiĝo de 12 al 17 danaj kronoj. Kompletigo por la laborplano estis diskutataj. Fine la komitato petis la l.a., kiuj ankoraŭ posedis tabloinsignojn iam donacitajn por la laborkunsidoj, donaci ilin nun al la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

Baldaŭ post la kongreso venis el PL la promesita aliĝpeto, tiel ke kun efiko de 16.7.1979 laŭ antaŭa kongresdecido denove ekzistis pola l.a. kun 20 membroj. En Septembro sekvis la ĝojiga anonco de la kasisto, ke nun ankaŭ el BG alvenis la kotizoj por 1979 kaj 1980. Sekve la ripozigita membrostato de la bulgara asocio "revivis", same kun 20 membroj. El R bedaŭrinde daŭre mankis reagoj.

En UK Luzern (CH) la kontaktkunveno estis vizitita de pli ol 50 personoj. Mag. G. Sredić instrue prelegis pri la nova svisa trafikkoncepto. En tiu jaro ekaperis en la horaro de la Ĉeĥoslovakaj Ŝtatafervojoj (ĈSD) la klarigoj por la pasaĝeroj ankaŭ en Esperanto (jam la 7a lando).

1980

La pliaĵigo de la kotizo havis malagrablajn sekvojn. Precipe en F pro enkonduko de nova abonsistemo IFEF perdis tie 70% de la membroj. La avertaj prognozoj, faritaj de la estraro en Roma kaj Turku, ekzakte veriĝis. Kelkaj aliaj landoj pro diversaj kaŭzoj reduktis la nombrojn de siaj IFEF-membroj. Entute restis 2297. Inter FISAIC kaj IFEF daŭris kvereloj pro la burokratismo koncerne la medalojn. Klariga artikolo de la prezidanto aperis en IF 1/80. Finfine FISAIC iomete limigis siajn postulojn. Tamen IFEF devas

*La Honoraj Membroj Walder (CH) kaj Lok (NL) 2.30(f)*

anonci intencon de medaldistingo al FISAIC plej malfrue 13 monatojn antaŭ la antaŭvidita dato!

En la 32a kongreso en America (NL) okazis gravaj ŝanĝoj en la estraro. Demisiis la vicprezidanto post 8 kaj la sekretariino post 12 oficaj jaroj. Ambaŭ estis nomumitaj Honoraj Membroj de IFEF. Unu nombro jen estu citata: dum tiuj 12 jaroj 4743 leteroj estis senditaj el la sekretariejo. Tiu nombro bone taŭgas por prilumigi la ekzaktan labormanieron kaj la neimageblan kvanton de tiu laboro. Sed ĝi ankaŭ donas impreson pri la estrara laboro entute, kiu ja krom la agado dum la kongresoj kaj krom la du ĉiujaraj interkongresaj kunvenoj ampleksas tutjarajn kontaktojn ĉefe korespondajn inter si kaj eksteren de la estraro. La novelektita estraro konsistis el J. Giessner (D, prez.), P. Engen (N, vicprez.), E.H. Olsen (DK, sek.), H. Hauge (DK, kas.) kaj G. Delaquaize (F, red.). Nova komitatano A de UEA elektigis dipl. ing. István Gulyás (H) anstataŭ d-ro Phersy, kiu pro malsano demisiis.

Denove la komitato devis ekŝigi landan asocion, nome Rumanion. Kaŭzoj: dum la tuta tempo de sia "ekzistado" tiu i.a. nur vivis helpe de adoptaj kotizoj kaj eĉ ne provis reguli la pagadon. Leteroj kaj aliaj klopodoj grandparte restis sen reago. La elane komencita komisiono pri varbado informado bedaŭrinde cesis sian ekzistadon pro tro magra kunlaborado. La interligilo "Terminara Kuriero" sub redaktado de D. Hartig (D) estis oficialigita: estis akceptita la kompletigita laborplano. Menciindas, ke la Ministro de Transporto kaj aliaj gravaj personoj alparolis la kongreson en Esperanto. En la horarlibro de la Norvegaj Ŝtataj Fervojoj (NSB) kiel oka nun ankaŭ aperis klarigoj en Esperanto.

La kontaktkunveno en UK Stockholm vizitis 16 personoj el 8 landoj, i.a. Japanio. La sekretario prelegis pri lingva diskriminacio.

1981

La 33a kongreso en Regensburg donis novajn impulsojn al la federacio. Post America ankaŭ la alparoloj en la inaŭguro Regensburg estis faritaj en Esperanto. La UEA-prezidanto Grégoire Maertens mem ĉeestis. La estraro konferencis kun li. Post 14 jaroj paradis gek-goj el 13 landoj en siaj uniformoj, belega bildo.

J.J. Labordus (NL) ricevis medalon de FISAIC el la mano de ties prezidanto d-ro Emile Schlessler (L), kiu lastfoje povis partopreni en IFEF-kongreso. Li subite mortis kelkajn monatojn poste en Novembro. La unuan fojon en IFEF-kongreso dum la tuta kongresdaŭro funkciis sendstacio de fervojistaj radioamatoroj. Servis en ĝi k-goj, kiuj estis membroj kaj de IFEF kaj de FIRAC, tiel ke multaj sendaĵoj okazis en Esperanto. Tio estis fine konkreta rezulto de 17jaraj klopodoj. De LKK estis aranĝita, kiel novaĵo, "Literatura Konkurso" pri la temo "fervojoj". El la pli ol 60 kontribuajoj estis kolektitaj la plej trafaj en broŝuro "La Verda Relo", kiu aperis en 1982. Novan ideon enkondukis la gvidanto de FK en ties kunveno. Krom la kutiman fakprelegon oni povis aŭskulti kelkminutajn referaĵetojn pri aktualaĵoj ĉe diversaj fervojoj. Promesplena novaĵo. Krome fondiĝis "Informa Fako", kies gvidadon transprenis W.L. van Leeuwen (NL). Ĝi ĉefe celis koncentri kaj plibonigi la kolekton kaj diskonigon de informoj pri la faka movado. Bonege kiel jam en multaj kongresoj funkciis la gazetara servo. Tia servo ĉiam plifaciligas la laboron de ĉiuspecaj redaktoroj kaj prelegantoj, samtempe garantiante korektan raportadon.

Jam de kelka tempo estis aŭdeblaj plendoj pri la ekstera aspekto de IF. Tio kondukis al ŝanĝo de la pre-sejo. Ekde n-ro 6/81 la IFEF-organo estis presita ĉe "Esperanto-Press" Augsburg (D), denove en ofseta presmaniero. En la sama numero aperis nova, kompletigita regularo por la konkursoj de la Internaciaj Skisemajnoj.

En la UK Brasilia partoprenis spite al la granda distanco 14 personoj el 8 landoj en la fervojista kontaktkunveno. Lasta ĝojiga novaĵo en tiu jaro estis, ke FISAIC en Septembro akceptis novan hungaran sekcion, kiu provizore konsistis el la i.a. de IFEF.

1982

La 27an de Januaro la federacio havis okazon elkore gratuli al la longjara iama prezidanto de Jong pro ties 80a naskiĝtago.

La IFES estis aranĝita en Morzine (francaj Alpoj). Kaj denove - pro teknikaj kaj financaj kaŭzoj - devis esti ŝanĝata la pre-sejo de la internacia organo. Ekde



numero 3/83 ĝin presas "Grefion Tryk" en Naestved (DK) multe pli malmultekoste.

Post 20 jaroj la 34a IFEF-kongreso denove estis invitita al Hungario kaj fariĝis la unua en socialisma lando (krom YU) sub auspicioj de FISAIC. Ĝi okazis en Balatonfüred. Kiel reprezentanto de FISAIC la prezidanto de la ÖBB-direkcio Wien, d-ro Semmelrath, distingis la prezidanton de nia hungara l.a., d-ro István Bácskai, per FISAIC-medalo.

Denove grava ŝanĝo en la estraro necesis pro demisio de la redaktoro. Estis elektita jena estraro: J. Giessner (D, prez.), P. Engen (N, vicprez.), O. Rösemann (D, sekr.), H. Hauge (DK, kas.), E.H. Olsen (DK, red.). Bedaŭrinde denove esperplena ĝermo sekigis pro mankanta kunlaboro, nome la "Informa Fako", kiu fakte unu jaron poste devis esti likvidata.

La 30an de Majo oni fondis en Münster (D) Internacian Kunordigan Komitaton por la preparado de la Jubilea Jaro de Esperanto (1987). En tiu IKK IFEF estas reprezentata de siaj prezidanto kaj sekretario. En UK Amsterdam renkontiĝis 43 fervojistoj el 8 landoj. Ĉeestis la UEA-estrarano P. Todorov. La IFEF-redaktoro legis fakan prelegon verkitan de vicprezidanto Engen.

En Decembro la jaro funebre finiĝis. Ĝuste antaŭ kristnasko mortis pro akcidento la meritplena franca kunlaboranto de TK, André Blondeaux. La federacio nomumis lin postmorte Honora Membro.

1983

La Internacia Skisemajno fine de Januaro okazis en Bayerisch-Eisenstein (D) kun 83 papoprenantoj el 8 landoj.

En la 35a kongreso (Oostende) la estraro prezentis proponon, laŭ kiu pro valuta stabileco la federacia kotizo estu pagata en svisaj frankoj anstataŭ danaj kronoj kaj nome 5 sfr. jare (ĝis tiam 17 dkr). Tio signifis absolutan kotizplialtiĝon je ĉirkaŭ 20 %, kiun la IFEF-kaso nepre bezonis pro seninterrompa inflacio. En la kongreso FISAIC estis reprezentita de sia nova prezidanto Gilbert Schmit (L), kiu alparolis en Esperanto kaj dum dutaga restado havis tre pozitivan impreson laŭ sia raporto en la posta aŭtuna ĝenerala asembleo de FISAIC. Dipl. inĝ. I. Gulyás (H) denove estis elektita k-ano A de UEA por 3 jaroj. Same reelektita estis L. de Sutter kiel ĉefk-ano.

Modele funkciis kongresa gazetara servo. La tre forta faka karaktero de tiu kongreso estis akcentita ne nur per instrua vizito en la haveno de Zeebrugge kaj fakprelego pri ĝi, sed ankaŭ per interesaj prelegetoj el 8 landoj sub temo "Aktualaĵoj el via lando". Krome estis ripetita la valora (antwerpena) prelego de P. Engen. En la debatoj la estraro menciis unuajn oficialajn kontaktojn kun ĉinaj kolegoj.

En la 68a UK en Budapeŝt oni denove povis konstati, ke la fervojistoj estas forta apogilo de la movado. D-ro Pethes estis vicprezidanto de LKK, kaj amaso da helpantoj fervojistaj kunlaboris. En la trafikmuzeo kaj en la kongresejo kolektiĝis 90 gekolegoj el dekduo da landoj por aŭdi fakajn prelegojn kaj raportojn. Aro da fervojistoj krome partoprenis en ekskurso omaĝe al d-ro Kalocsay en ties naskiĝloko.

Post Hungario en 1981 kaj laŭ nova iniciato de IFEF la ĝenerala asembleo de FISAIC akceptis fine de Aŭgusto 1983 novan bulgaran sekcion, provizore konsistantan el nia l.a.

Antaŭ ol fini tiun ĉapitron kun ĝia superrigardo pri IFEF, ni komparu kelkajn nombrojn (en guldenoj), kiuj sobre esprimas la daŭran kreskadon de la federaciaj financrimedoj, sekve ankaŭ la pli grandan respondecon de la kasisto kaj de la estraro:

Bilanco 1950 = 333 gld, 1960 = 3640 gld, 1962 = 39140 dkn (= proks. 10150 gld.).

Budgeto 1960 = 5568 gld, 1984 = 11725 sfr. (= proks. 15850 gld.)

Fine de 1983 IFEF havis 2447 membrojn en 19 l.a. kaj 3 izolajn membrojn.

*La estraro en 1983, de mald. Rösemann (D), Olsen (DK), Giessner (D), Engen (N), Hauge (DK) 2.32(f)*

## Perspektivoj

Kion diri? Kiam tiu ĉi "Historio" estas finskribata. la monda situacio estas ĉio alia ol rozkolora. Mondvastaj vetarmado kaj malpaco. eĉ militoj, senlaboreco, inflacio. malsparemo en multaj landoj, en aliaj malsato kaj "eksplozo" de la enloĝantaro zorgas, ke la homaro ne trovas trankvilon kaj pacon. Tamen ĉie sur la tero la homoj sopiras kaj serĉas bazon, sur kiu ili en paco komune povos vivi. El nia vidpunkto, la vidpunkto de la esperantistoj, al tiu bazo apartenas lingvo neŭtrala ĉiujn liganta, do la internacia lingvo Esperanto. Ni havas la taskon, trans-porti tiun lingvon al venonta generacio same kiel ni transprenis ĝin de antaŭaj generacioj. Kiel fervojistoj ni krome plenumu tiun taskon en nia speciala medio.

Tiu ĉi "Historio" klare montras, ke la ideo de la Internacia Lingvo, ideo, kiu de neniu postulas ion, sed kiu al ĉiuj donas multon, vaste dependas de la monda situacio, de ideologioj, politiko, hazardoj, ofte de la sintenado de unuopuloj. Prognozoj ne eblas. Sed generacioj de esperantistoj, idealisme kaj obstine disvastigis kaj konservis la same noblan kiel pragmatan ideon de d-ro Zamenhof. Ni imitu ilin, ĉar - se la homaro sukcesos konservi la vivon sur tiu-ĉi tero kaj sekve sin mem, tiam ĝi bezonos internacian lingvon, kiu estu ESPERANTO!

*D-ro L.L. Zamenhof kaj lia filo Adam dum UK Bern 1913 kaj poŝtkarto. sendita de Zamenhof al samideano en Bremen. 2.33(f)*

## 4-a kapitro

### Funkciuloj de la Fervojista Movado

(ni aperigis nur certigitajn indikojn)

### Ĉiuj estraranoj

#### A) Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj (IAEF) (1909-1930)

de jaro	ĝis jaro	elektita en	nomo	el lando	funkcio	rimarkoj
09	11	UK Barcelona	Berlande, Armand	F	prez.	
09	11	UK Barcelona	Wellons	US	vicprez.	
09	11	UK Barcelona	Schwarz, Jaromir	A-H	vicprez.	el Sarajevo, post la milito li nomiĝis Ivanović
09	12	UK Barcelona	Bontemps, G.	F	sekr. k. kas.	
11	12	UK Antwerpen	Schwarz, Jaromir	A-H	prez.	
11	12	UK Antwerpen	Engst, Johannes	D	vicprez.	
11	14	UK Antwerpen	Petzold, Alfred	D	sekr.	
11	12	UK Antwerpen	Bontemps, G.	F	gen. sekr	
12	14	UK Krakòw	Tarnow, Paul F.W.	D	prez.	
12	14	UK Krakòw	Szymanowski	D	vicprez..	mortis en la milito
12	14	UK Krakòw	Engst, Johannes	D	kas.	
13	14	UK Bern	Berlande, Armand	F	red.	mortis 1914, ekstere de la estraro
13	14	UK Bern	Chilot, George	F	red.	

#### Interrompo per la unua mondmilito

21	22	UK Praha	Habellok, Georg	D	prez.	
21	22	UK Praha	Kašpárek	CS	vicprez.	rezignis pro malsano
21	24	UK Praha	Kubásek, Emanuel	CS	kas.	
21	22	UK Praha	Blažek, Josef	CS	sekr.	
22	24	UK Helsinki	Bontemps, G.	F	prez.	krome 5 asessoroj en 5 landoj
22	24	UK Helsinki	Blažek, Josef	CS	vicpr.	
22	24	UK Helsinki	Barviř, I.	CS	sekr.	
22	23	UK Helsinki	Ivanović, Jaromir	CS	red.	
24	30	UK Wien	Stojnić, Stevan V.	YU	prez.	mortis 1963
24	30	UK Wien	Puhalo, Ilija F.	YU	vicprez. k. red.	mortis 1937
24	25	UK Wien	Butković, Pavao	YU	sekr.	
24	26	UK Wien	Slaviček	YU	kas.	
26	27	skribe prop.	Pethö, Franjo M.	YU	sekr.	
26	28	skribe prop.	Muzinić, Stjepan S.	YU	kas.	
28	30	skribe prop.	Prebil, Ludoviko	YU	sekr.	
28	30	skribe prop.	Volk, Alojz	YU	kas.	

En 1930 IAEF disfalis, sed la faka movado plue ekzistis en la kadro de ITF.

## B) Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEFF) (1948 - 1984)

de jaro	ĝis jaro	elektita en	nomo	el lando	funkcio	rimarkoj
48	58	SAT-kongr. Amsterdam	Stapel, Walig	NL	prez.	mortis 1963
48	64	SAT-kongr. Amsterdam	Lok, Jan	NL	sekr.	mortis 1978
48	58	SAT-kongr. Amsterdam	Biesheuvel, Willem	NL	kas.	mortis 1975
48	50	SAT-kongr. Amsterdam	Muller, Dirk	NL	red.	mortis 1951
48	58	SAT-kongr. Amsterdam	Hoen, Harmen	NL	asesoro	mortis 1967
48	58	SAT-kongr. Amsterdam	Drijfhout, Egbert J.	NL	asesoro	mortis 1981
48	51	SAT-kongr. Amsterdam	Wissink, Antonius Niclaas	NL	asesoro	mortis 1951 fine de la 3a IFEFF-kongr.

(Ili ĉiuj estis membroj de la amsterdama fervoja Esperanto-grupo UNFEG)

### Ekde 1950 ĉiuj estraranoj estas elektitaj en IFEFF-kongresoj

de jaro	ĝis jaro	elektita en la IFEFF-Kongresoj	nomo	el lando	funkcio	rimarkoj
50	58	Salzburg	de Jong, K.G.J.	NL	red.	entute ĝis 1968
58	68	Aarhus	de Jong, K.G.J.	NL	prez.	
58	63	Aarhus	Hoen, Harmen	NL	vicprez. k red.	mortis 1967
58	68	Aarhus	Oosterwijk, Eilert R.	NL	kas.	
58	68	Aarhus	Poptie, Jan	NL	dua sekr.	ekde 1964 sekr.
63	65	Stoke-on-Trent	Burgler, Daniel	NL	red.	mortis 1965
64	68	Bruselo	Walder, Otto	CH	vicpr.	entute 9 ĝis 1974
65	68	Hamar	s-ino Burgler, Elizab.	NL	red.	provizore daŭrigis ekster de la estraro
68	-	Varna	Giessner, Joachim	D	prez.	
68	72	Varna	Sredić, Gvozden	YU	vicprez.	
68	80	Varna	Kruse, Elfriede	D	sekr.	
68	74	Varna	Walder, Otto	CH	kas.	
68	74	Varna	Krogstie, Per Johan	N	red.	
72	80	Lugano	van Leeuwen, Willem	NL	vicprez.	
74	-	Tarragona	Hauge, Henning	DK	kas.	
74	82	Tarragona	Delaquize, Guy	F	red.	
80	-	America	Engen, Per	N	vicprez.	
80	82	America	Olsen, Henning E.	DK	sekr.	
82	-	Balatonfüred	Rösemann, Otto	D	sekr.	
82	-	Balatonfüred	Olsen, Henning E.	DK	red.	

## Honoritoj

Membroj de la Honora Patrona Komitato de IFEF

en jaro	nomo	el lando	rimarkoj
1970	d-ro Schlesser, Emile †	L	Ĝen. prez. de FISAIC
1970	I.A. Pahin †	F	Prez. de UAICF
1970	Ceci, Pasquale	I	Dir. de Dopolavoro Ferroviario, Bologna
1971	inĝ. Rödönyi, Karoly	H	Unua Anstataŭanto de la Ministro por Poŝto k Trafiko
1972	d-ro inĝ. Azzi, Giordano	I	Honora membro de UEA, prez. de Itala Esp.-Federacio
1977	d-ino Boulton, Marjorie	GB	Universitato de Oxford

### Honoraj Membroj de IFEF

en jaro	nomo	el lando
1958	Biesheuvel, Willem †	NL
1958	Dirijfhout, Egbert J. †	NL
1958	Stapel, Walig †	NL
1963	Hoen, Harmen †	NL
1965	Lok, Jan †	NL
1973	Kensing, Ingvard	DK
1975	de Jong, Kornelis G.J.	NL
1975	Walder, Otto	CH
1976	d-ro Bácskai, István	H
1976	Mag. Narvala, Nils Gösta	SF
1976	Thorsted, Niels Christian †	DK
1977	Gimelli, Germano	I
1977	Labordus, Jacob Johannes	NL
1977	inĝ. Řebíček, Jaromir	CS
1978	Bürger, Johann	A
1978	Poly, Pierre	F
1980	Kruse, Elfriede	D
1980	van Leeuwen, Willem	NL
1983	Blondeaux, André †	F

### Honoritoj per FISAIC-medalo

en jaro	nomo	el lando	medalspeco
1967	Geroldinger, Johann	A	ora
1967	Blaauw, M, Thies †	NL	arĝenta
1967	Hunkeler, Hans	CH	bronza
1969	de Jong, K.G.J.	NL	ora
1969	Lemonnier, Germaine	F	arĝenta
1970	Giessner, Joachim	D	ora
1970	Lok, Jan	NL	ora
1971	Blondeaux, André †	F	arĝenta
1971	Ritterspach, Gernot.	D	arĝenta
1971	Zupanić, Josip	YU	arĝenta
1973	Christoffersen, Johan †	DK	arĝenta
1974	Walder, Otto	CH	ora
1975	Kruse, Elfriede	D	ora
1976	Bengtsson, Harry	S	bronza
1977	Barks, Horace †	GB	arĝenta
1979	Van Leeuwen, Willem	NL	ora
1981	Labordus, Jacob Johannes	NL	arĝenta
1982	d-ro Bácskai, István	H	ora

## La ĝisnunaj tri IFEF-prezidantoj

### **K.G.J. de Jong (NL)**

teknika inspektoro  
nask. 1902  
esperantisto 1930,

aktiva en fervojista grupo en Amsterdam (UNFEG), ties prezidanto 1955-73. IFEF-redaktoro 1950-58, IFEF-prezidanto

1958-68. Ora FISAIC-medalo 1969. Honora IFEF-Membro 1975, gvidis kursojn, verkis artikolojn, prelegis, post 1968 denove aktivis en la nederlanda asocio.

### **Walig Stapel (NL)**

lokomotivestro  
nask. 1896. mortis 1963.  
esperantisto 1930.

Ekde 1932 ano de la fervojista grupo en Amsterdam (UNFEG) kaj ties prezidanto 1945-53. kunfondinto de FERN. IFEF-prezidanto 1948-58. franca meritmedalo 1957. Honora IFEF-membro 1958.

### **Joachim Giessner (D)**

supera ĉefinspektoro  
nask. 1913. esperantisto 1950,

fondis la fervojistajn grupojn en Bielefeld, Braunschweig, Elze kaj Herzberg kaj aktivis en ili. sekretario kaj redaktoro de GEFA 1953-56. ties prezidanto 1956-68 kaj de post 1972, gvidis FK 1959-68, LKK-membro Lindau, LKK-prezidanto Fulda kaj Regensburg, IFEF-prezidanto ekde 1968, Ora FISAIC-medalo 1970. gvidis kursojn, verkis artikolojn. prelegis. tradukis ĉiujn specajn kantojn kaj poemojn.

## 5-a ĉapitro

### La Internacia Organo

Jam tre baldaŭ post la fondiĝo de IAEF oni sentis la bezonon je internacia ligilo. Tio kondukis al kreo de "Fervoja Esperantisto", redaktita en Francio. Tiu modesta, sed riĉenhava kaj bone presita revuo aperis de Decembro 1910 ĝis Julio 1914. Ĉar la libervola abono ne estis ligita al la membreco en la asocio, ĉiam mankis abonantoj (komp. I-an Sekcion, 1-an ĉapitron).

Post la promilita interrompo oni rekreis la internacian organon en 1922 sub la tradicia nomo "Fervoja Esperantisto". Tamen aperis nur du numeroj, redaktitaj en Praha. Sekvis en 1923 nova organo kun la nomo "La Fervoĵisto", redaktita en Olomouc (CS). Sed eĉ nur unu fojon ĝi aperis.

Nur sub la estraro de la "jugoslava epoko" denove estis eldonita "La Fervoĵisto" pli malpli regule, redaktita de k-go Puhalo en Zagreb (YU). La unua numero datumis el Oktobro 1924, la lasta el Marto 1930.

En tiuj jaroj la asocio eldonis 30 foje la revuon en formato 237x316 mm, el kiuj 13 duoblaj, foje eĉ trioblaj n-roj. Ili ampleksis 308 paĝojn. 8 n-roj aperis kun po 4 kovrilpaĝoj, do entute 340 paĝoj kun tre varia, instrua kaj informa enhavo. Post 1930 mankis internacia komunikilo. Kelktempe oni utiligis al si aliajn eblecojn, ekz. sindikatajn revuojn (komp. I-an Sekcion, 2-an ĉapitron).

Venis Aŭgusto 1948, kiam IFEF naskiĝis. En la sepkapa nederlanda estraro troviĝis ankaŭ la redaktoro D. Muller. El nenio kaj per nenio li devis krei novan internacian organon nepre bezonatan. Li devis labori per ekstrema modesteco. Tion oni povas ekkoni, rigardante la eksterajn de tiu "Bulteno", kies unua numero aperis sen ekzakta datoindiko proksimume en Septembro 1948 en formato A4 en stencilita formo. Fakte temis nur pri informilo, sendita al landaj reprezentantoj aŭ asocioj. Manko de mono kaŭzis, ke oni nur povis revii pri vera membroorgano. Entute aperis 11 numeroj kun 58 paĝoj, la lasta en somero 1950 jam redaktita de la nova redaktoro KG.J. de Jong (NL). Li transprenis la taskon, ĉar Muller malsaniĝis kaj en 1951 mortis.

Ekde Septembro 1950 alternmonate aperis "Bulteno", nun laŭ rotaprinta metodo, en formato 168x212 mm. provizore kun 4 paĝoj. En la kapo de la titolpaĝo videblis du mondo-duonoj kaj maldekstre elektra motortrajno, dekstre trajno trakcита de vaporlokomotivo. Finfine ekzistis ligilo inter membraro kaj organo. Tiel la estraro sesfoje en la jaro povis doni la necesajn komunikojn al la membraro, same kiel interesitaj membroj havis okazon, kunlabori en "Bulteno". Kvankam la kreskanta federacio nun disponis pri pli da mono, la financa risko restis granda. Konsiderinda helpo fariĝis mondonacoj kaj profitoj el kongresaj tomboloj.

Sekvis nova kapo sur la titolpaĝo en 1954 kun forte vaporanta rapidtrajno. Fotoj tiam ne aperis, oni ĉefe uzis desegnaĵojn. Ekde Aŭgusto 1957 "Bulteno" aperis presita. Kaj jam jaron poste, en Oktobro 1958 ĝi venis en tute nova vestaĵo kaj sub titolo "La Internacia Fervoĵisto" en formato 170x240 mm. Pli kaj pli ĝi fariĝis reprezenta organo de daŭre pligraviĝanta federacio. Ĝi ne nur traktis organizajn temojn, sed trovis lokon en ĝi ankaŭ la tekstoj de fakprelegoj, fakaj raportoj, rakontoj, spritaĵoj ktp. Laŭregulare "LIF" aperis sesfoje jare, nur en 1959-60 venis 8 numeroj, por adapti la periodaĵon al la kalendara jaro. Tio funkciis ekde 1961. La paĝonombro plialtiĝis kun la jaroj. Regule nun ekaperis fotoj kiel bonvenaj akcesoraĵoj aldone al la enhavo.

Kiam 1958 en la deka kongreso la estraro nove formiĝis, ankaŭ nova redaktoro ekoficis en la persono de H. Hoen (NL), kiu konservis tiun postenon ĝis 1963. Tiam transprenis ĝin D. Burgler (NL) por du jaroj ĝis sia morto en Februaro 1965. Poste lia edzino E. Burgler-Jeszo savis la situacion por la sekvintaj jaroj. Kun la nova internacia estraro (Varna 1968) oficis nova redaktoro P.J. Krogstie (N). Dum lia epoko denove ŝanĝiĝis la ekstera aspekto de la organo. Jam de jaroj aŭdiĝis voĉoj dezirantaj modernigon kaj speciale forigon de la "funebra aspekto". Post konsultado de la komitato. kiu buŝe kaj skribe esprimis sian opinion, la numero 1/70 aperis sub la titolo "Internacia Fervoĵisto" en formato A5 kaj en modernigita formo. La estraro kreis "gvidliniojn" por la redaktado, tiel ke la redaktoro pli facile povis klasifiki la kontribuiaĵojn laŭ konstantaj rubrikoj kaj laŭ aktualeco. La presejo. kiu dum multaj jaroj estis en NL. nun troviĝis en N, kie ĝi restis 6 jarojn, ĝis kiam en la 26a kongreso en Tarragona k-go G. Delaquaize (F) transprenis la taskon. Sekve redaktado kaj presejo transiris al Paris. Tamen post

ne tro longa tempo ĉefe pro financaj kaŭzoj alia presejo en NL transprenis la presadon, kaj nederlandaj k-goj konsiderinde helpis malaltigi la sendkostojn.

La daŭra inflacio en la tuta mondo kompreneble ankaŭ grave influis la eldonon de la IFEF-organo. En 1974 okazis, ke pro manko de mono nur kvin numeroj povis aperi. Kaj kiam subite en Februaro 1978 la nederlanda presejo anoncis sian baldaŭan translokiĝon al Usono, la estraro devis rapide trovi solvon por povi daŭrigi la aperigon de IF. Ĉar samtempe la financa situacio de IFEF ne estis tro rozkolora, necesis trovi ne nur iun alian presejon, sed ankaŭ kiel eble plej malmultekostan. Post diverslandaj esploroj la estraro trovis tian presejon en DK.

Ekde n-ro 2/78 "Internacia Fervojisto" venis el tiu presejo en Aarhus. Tio kompreneble influis la eksteran aspekton, ĉar IF nun estis ofsete presata. Kaj ankaŭ la proceduro de la produktado ludis temporaban rolon, ĉar la redaktoro el Paris devis sendi la materialon al Tolne (DK), kie ĝi estis tajpita, kaj poste ĝi iris al Aarhus al la presejo. Tiu metodo funkciis kelkajn jarojn, ĝis kiam multaj plendoj pri la ekstera aspekto igis la estraron serĉi presejon, kiu promesis pli bonan preskvaliton. Ĝin oni trovis en Augsburg (D). Ekde n-ro 6/81 tie estis presita la internacia organo.

En la kongreso de Balatonfüred (H) 1982 k-go E.H. Olsen (DK) elektiĝis redaktoro. Tio mallongiĝis la "produktvojon".

La nova redaktoro baldaŭ komencis mediti pri novaj vojoj por ankoraŭ plifortigi la fakan karakteron de la internacia organo. Tio ne estis simpla, ĉar la disponebla faka materialo konsiderinde kreskis pro la enkonduko de novaj prelegetoj sub titolo "Aktualaĵoj el via lando" en la IFEF-kongresoj. Samtempe la prezoj "galopis", tiel ke denove la estraro devis serĉi pli prezfavoran presejon, kiun oni fine trovis en la loĝloko de la redaktoro, en Naestved (DK). Kaj kiel unua la n-ro 3/83 tie estis presita, denove ofsete en formato A5 kaj eĉ sur pli bonkvalita papero. Forte helpis jam de kelkaj jaroj la edzino de la IFEF-kasisto, Erna Hauge (DK), kiu regule tajpis la manuskriptojn.

Kompreneble la eldonkvanto de IF ĉiam estis adaptita al la fluktuado en la membraro. Ankaŭ la jaraj paĝonombroj estis konformaj al la cirkonstancoj kaj olte spegulis la financajn eblecojn. Tiuj nombroj estas ekzemple en 1979 = 84, 1980 = 100, 1981 = 80, 1982 = 88, 1983 = 96, paĝoj.

Tio estis bona rezulto konsidere al la daŭranta inflacio kaj la modesta jarkotizo de kvin sviasaj frankoj en 1983. Certe oni rajtas diri, ke la internacia organo ĉiam, kiam la fortoj de la fervojista movado kapablis aperigi ĝin, plenumis sian taskon: esti ligilo inter membraro kaj federacio kaj spegulo de la federacia agado.

*Titoloj de la internacia organo. 2.39(f)*



## 6-a ĉapitro

### IFEF-Junularo kaj Skisemajnoj

#### Pri la IFEF-Junularo

Oni rajtas aserti, ke la ĝermo de kelkjara junulara aktiveco en IFEF troveblis en Francio, precipe en Paris. Laŭ franca sugesto en la tagordo de la IFEF-kongreso Budapest 1962 la unuan fojon oni povis konstati apartan mencion de la junularo. Post pritrakto de la problemoj en la unua kongresa laborkunsido oni aranĝis junularan kunvenon (7.5.1962), vizititan de 47 gejunuloj el 7 landoj (A, BG, F, H, YU, PL, CH). Laŭ propono de la kunvenintoj la IFEF-estraro komisiis d-ron Imre Ferenczy (H) kiel gvidanton por estonta Junulara Sekcio de IFEF. Oni decidis, krei en la landaj asocioj junularajn komitatojn, por ĝenerale plialtigi la nombron de gejunuloj. Krome oni planis aperigi konstantan junularan rubrikon en la IFEF-organo, por kiu la redaktoro tamen nur tre neregule ricevis kontribuaĵojn.

Kiel okulfrapa aktiveco menciindas la unua internacia skisemajno, vizitita de 16 gejunuloj el A kaj F en Landeck (A) 1963. Tiaj IFES ekde tiam okazas ĉiuvintre.

La junularo ĉefe aktivis en A, F kaj H, en kelkaj aliaj landoj montriĝis komencaj aktivecoj. En la postaj IFEF-kongresoj okazis specialaj kunsidoj kaj ankaŭ aranĝoj por la junularo.

En la IFEF-statuto, akceptita en Hamar 1965, en artikolo 8 estis fiksita la aĝlimo por anoj de la "Junulara Sekcio" je 28 jaroj. Laŭ art. 13 ĝi havis rajton je 2 kromkomitatoj.

En la sekvinta statuto, aprobita en Lugano 1972, troviĝas aparta "Regularo por la Junulara Sekcio".

Dum la jaroj vigliĝis grupoj ankaŭ en CS, D kaj YU. La kongreso de Fulda (1967) aranĝis unufoje futbalmaĉon inter loka teamo kaj internacia IFEF-teamo. En la kongreso de Varna (1968) oni decidis, pli intensigi la rilatojn al TEJO. En Avignon (1969) estis akceptita laborplano por la junularo, el kiu parto estis realigita en la sekvontaj jaroj. Tamen jam tiam ekkoneblis la problemo de ĉiuj junularaj organizoj: la membroj pliaĝiĝas, mankas novaj.

En la kongreso de Rimini (1970) d-ro Ferenczy transdonis la gvidadon de la Junulara Sekcio al Jean Mevel (F) ĝis 1973, kiam en Aarhus Gérard Horn (F) transprenis la gvidadon kaj fine en Villach (1975) Mirella Merlani (I) por mallonga tempo.

Sed ŝi baldaŭ devis rezigni pro malsano. En Skellefteå (1976) Ernst Quietensky (A) provizore transprenis la gvidadon, ĝis kiam en Swanwick (1977) la IFEF-estraro kaj komitato ne plu vidis alian eblecon ol "ripozigi" la Junularan Sekcion. Ne nur la pliaĝiĝo, sed ankaŭ la jarojn daŭra raciigado ĉe ĉiuj fervojoj same kiel la neintereso de junaj homoj por streĉado ĝenerala kaj spirita ĉefe estis detruintaj la junularan sekcion de IFEF. Sincera deziro estas, revivigi ĝin.

#### Internaciaj Fervojistaj Esperanto-Skisemajnoj (IFES)

En trajno revenanta de la 14a IFEF-kongreso en Budapeŝto (1962) babilis aŭstraj kaj francaj gekolegoj pri la eblecoj de vintra renkontiĝo. Tiel naskiĝis la ideo pri internaciaj skisemajnoj, kies unua okazis jam en Februaro 1963 en Landeck (A). Organizis ĝin aŭstriaĵoj k-goj.

La eĥo estis tiel bona, ke necesis ripetado en la sekvantaj vintroj. Ekde la tria skisemajno Johann Geroldinger (A) aranĝis ĉiuvintre ĝis 1969 tian

*Johann Geroldinger. 2.40(f)*

IFES en Aŭstrio. Estis ĉefe gejunuloj el multaj eŭropaj landoj, kiujn allogis tiuj sportaj renkontiĝoj. kiuj tamen ofertis krome kaj ĉefe amikecon, gajecon kaj lingvan perfektigon al la partoprenantoj. Sport- kaj lingvo-konkursoj, kantado, migrado, dancado, prelegoj, prezenta- do de dia-oj kaj filmoj, karnavalaj vesperoj kaj muziko, ĉio kontribuis al la ŝatata etoso de tiuj IFES. K-go Geroldinger ĉiufoje sukcesis akiri - ofte de eminentuloj - belajn pokalojn kaj aliajn premiojn por la gajnantoj de la konkursoj.

Ekde la 11a IFES ankaŭ aliaj landoj transprenis la aranĝadon (vidu ĉi-apudan tabelon). Iom post iom la nombro de aliĝintoj kreskis ĝis pli ol 100, inter ili konsiderinda nombro da pli aĝaj k-joj kaj familianoj. Por la 13a IFES la unuan fojon IFEF disponigis specialan IFEF-premion, kiu estas destinita por la gajnanto de sporta kaj lingva konkursoj kune. Ni esperu, ke tiaj skisemajnoj daŭre okazu kiel agrabla akcesoraĵo de nia faka movado.

Kie okazis la IFEF-Skisemajnoj?

n-ro	loko	lando	jaro
1	Landeck	A	1963
2	Grossarl	A	1964
3	Grossarl	A	1965
4, 5	Krimml	A	1966
6, 7	Krimml	A	1967
8	Innsbruck	A	1968
9, 10	Werfenweng	A	1969
11	Vratna Dolina	CS	1970
12	Chatel	F	1971
13	Spitzingsee	D	1972
14	Werfenweng	A	1973
15	Pohorje	YU	1974
16	Plan Val Gardena	I	1975
17	La Molina	E	1976
18	Les Gets	F	1977
19	Grainau	D	1978
20	Maria Alm	A	1979
21	Plan Val Gardena	I	1980
22	Bohinj	YU	1981
23	Morzine	F	1982
24	Bayerisch Eisenstein	D	1983
25	Maria Alm	A	1984

## 7-a ĉapitro

### Fakaj Komisionoj kaj prelegoj

#### Terminara Komisiono (TK)

##### Ĝis 1914

Terminara laboro neniel estas io nova. Inter la deklaritaj celoj en la fondkunveno de IAEF la 7an de Septembro 1909 troviĝas la frazo: "Starigi specialan vortareton, kiu post ĝia ellaboro estos eldonata de la Asocio". Kaj en la unua "Ĝenerala Kunveno" de IAEF, la 30an de Aŭgusto 1910 oni klare ekkonis la gravecon de tiu problemoj kaj decidis, "publikigi la tradukon de teknikaj vortoj fervojaj" en la internacia organo "Fervoja Esperantisto". Sekve jam en n-ro 3 aperis la unuaj terminoj (i.a. pri la diferenco vagonaro kaj trajno), en n-ro 4 kaj 5 eĉ tutpaĝaj listoj kun difinoj. 2 jarojn poste k-go J. Bal (NL) alvokis, ke "pro unueco" oni prefere uzu la de li aperigitajn terminojn. La redakcio aldonis la konsilon "enskribi alfabeto la fervojajn terminojn de nia gazeto en kajeron". Kaj tiaj terminoj ja abundis en fakaj artikoloj, raportoj pri novaĵoj, komunikoj oficialaj, eĉ en spritaĵoj. Ankaŭ 8 ĉapitroj de la tiam "Konvencio de Bern" aperis en Esperanto, tradukitaj de Hans Reuss (D).

##### Inter la militoj

Ankaŭ la statuto de IAEF el la jaro 1922 denove citas la celon: "eldoni fakan terminaron kaj fakrevuon". Por plenumi tiun punkton IAEF petis inĝ. Edward M. Rosher (tiam US, post la 2a milito GB) kunlabori en tiu fakrevuo, kio fakte okazis per multaj interesaj artikoloj kaj tradukoj. Krome Rosher ofte liveris por la internacia organo "La Fervojisto" kolektaĵojn de terminoj, parte kun ampleksaj difinoj. Ankaŭ la "Konvencio de Bern" denove estis tradukita en 1925-26, ĉi-foje de k-go Ernst Muthschall (D). Cetere el "La Fervojisto" 1/1924 ekkoneblas, ke Rosher estis elektita estro de fervoja terminara komisiono, stariĝita jam pli frue. Sed supozeble tiu komisiono ne taŭge laboris aŭ eĉ ne vere ekzistis. Fervora laboranto ankaŭ estis Georg Habellok (D), kiu en 1923 eldonis mane skribitan, multobligitan terminareton (germana-Esperanto), formato proksimume A5, 200 ekzempleroj kun 1300 terminoj. Aliaj verkintoj aŭ tradukintoj de fakaj artikoloj ĉefe estis Ernst Eriksson (S) kaj Josef Řebíček (CS).

Komence de 1929 la estraro publike petis la helpon de bonvolemluloj por inĝ. Rosher, kiu "sola ne kapablas plenumi" la nepre necesan tradukon de la "Schlommann-vortaro". Krome necesis kompili "komercfakajn" terminojn. Sed verŝajne la efiko ne plu estis tro granda, ĉar la lasta al ni konata numero "La Fervojisto" aperis unu jaron poste (Marto 1930). En ĝi ni ankoraŭfoje trovas ampleksan kompilaĵon de terminoj.

Pri la terminara laboro de la postaj jaroj nenio estas konata.

##### Post la dua milito

Jam en la Tuteŭropa Fervojista Konferenco (Aprilo 1949) kaj en la unua IFEF-kongreso (Majo 1949) oni ekdiskutis pri kompilado de fervoja fakvortaro.

La unuaj IFEF-Regularoj ne menciis terminaran laboron inter la celoj de la Federacio. La Regularo de 1953 riparas la mankon. En la dua kongreso (1950) elektiĝis Terminara Komitato sub gvidado de Heinrich Pape (D), sed la irota vojo estis iom nebula. En Majo 1951 "Bulteno" skribis: "Estas klare, ke la kompilo de definitiva kaj ampleksa terminaro postulas tempon ... Pro tio unue estas starigitaj provizora projekto de vortareto kaj provizora kolekto de ĉiutagaĵaj frazoj ..." Oni eklaboris. Josef Řebíček (CS) tradukis la Internaciajn Konvenciojn pri pasaĝerkaj pakajtrafiko (CIV) kaj pri frajtajtrafiko (CIM). Edward M. Rosher (GB) laboris pri surstrukturo, Albert Lienhardt (F), André Blin (F) kaj Adolf Simon (D) pri maŝintekniko. Ankaŭ la fervoja vortaro germana-

*Josip Zupanić (YU), membro de la internacia estraro de IAEF 1927: post la dua mondmilito elstara tradukanto de terminoj kaj de internaciaj fervojaj reglamentoj. 2.42(f)*

esperanta de Georg Habellok (D) servis kiel fonto por la provizora terminaro de la komitato, kompilita de la gvidanto Pape en 1950.

En Septembro 1951 "Bulteno" skribis: "Estus plej bone enpresigi la terminojn en Plenan Vortaron, sed tio postulus tro multe da tempo. Do ni mem eldonu malgrandan terminaron en ĉiuj naciaj lingvoj." Unu jaron poste en Lindau oni klopodis trovi firman bazon por la laboroj per elekto de 2000 terminoj el "Lexique Technique Ferroviaire" (LTF), eldonita de la Francaj Fervojoj SNCF (1923). En la dua parto de la UEA-jarlibro aperis 1952 kaj 1953 fervoja terminaro de Rosher, tekstoj en ses fakaj sekcioj kun apartaj vortolistoj.

Ekde 1953 Pape ne plu povis partopreni en la terminara laboro. Lia posteno restis vaka dum 3 jaroj. En la kongreso en 1954 (Verona) la francaj kolegoj povis komuniki, ke "Laŭ la decido de Lindau" 5000 terminoj el LTF estis tradukitaj, la materialo estos havebla ĝis jarfino. Tradukinto estis André Blondeaux (F). En Zürich 1955 la unua grava paŝo estis realaĵo: kajero kun 4700 terminoj el LTF franca-germana plus 600 el LTF franca-angla, tradukitaj en Esperanton en sinsekvo de la kodnumeroj baziĝantaj sur la franca alfabeto. Tute klaraj ŝajnis la estontaj paŝoj: alfabeto viciĝo de la terminoj en Esperanto, kun novaj kodnumeroj laŭ la modelo de Wüster "Maŝinfaka Terminaro". Tiun taskon promesis plenumi Simon. Poste dissendo de tiu materialo al la landaj asocioj, kie oni verkos la kajerojn kun la naciaj lingvoj kaj Esperanto. Paralele oni finfaros la nacilingvajn tradukojn de la Rosher-terminaro. Jam la Francaj Fervojoj SNCF anoncis la eldonon de kvinlingva vortaro kaj la prezidanto de la franca IFEF-sekcio, f-ino Germaine Lemonnier, fiere povis komuniki, ke SNCF projektas aldoni poste aliajn lingvojn, kaj "ke ne estas neverŝajne, ke inter tiuj lingvoj troviĝos Esperanto". Sed la laboroj ne progresis tiel glate. Profesia okupiteco malhelpis Simon plenumi siajn intencojn. La eldono de kvinlingva ĝenerala fervoja terminaro (LG) ne realiĝis flanke de SNCF. La ideon tamen transprenis la Unuiĝo Internacia de Fervojoj (UIC) kun sidejo en Paris, sed la eldono prokrastiĝis ĝis 1957 (LG I).

En la kongreso de 1956 (Stockholm) la TK trovis novan junan gvidanton, Gernot Ritterspach (D). En la komitato kaj el kelkaj landoj audiĝis duboj pri faritaj tradukoj, pri neologismoj, pri francismoj kaj germanismoj, pri terminoj ne en ĉiuj landoj kompreneblaj. Ne ekzistis fakuloj pri ĉiuj fakoj en ĉiuj landoj, kiel dezirinde. Novajn impulsojn alportis kontaktoj kun la Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), kies gvidanto, ing. Rudolf Haferkorn (D), prizorgis la eldonon de "Scienca kaj Teknika Terminaro" (1956, korektita 1961). Sed evidentiĝis ankaŭ mankoj en la jam farita laboro. 1958 "Bulteno" skribis, ke la Esperanto-lingva alfabetigo de la LTF-tradukoj montriĝis malfacila, ĉar multloke por unu franca termino estis faritaj du, eĉ tri Esperanto-tradukoj. Inverse unu Esperanto-traduko staris por pluraj francaj terminoj, sekve havis plurajn kodnumerojn. Iuj terminoj evidente

*Johan Christoffersen (DK) longjara fervora kunlaboranto en terminaraj kaj fakprelegaj afe-roj. 2.43(f)*

*Gernot Ritterspach (D) gvidis la Terminaran Komisionon de 1956 ĝis 1973: ekde 1977 li estas sekretario de TK kaj FK. Verkis, prelegis, tradukis, sinkronizis, reviziis. 2.43(f)*

estis malaktualaj, aliaj aktualaj mankis. Ĉu rezigni pri la elektita bazo LTF kaj transiri al la multe pli ampleksa LG I (ĉ. 8000 terminoj)? En 1959 oni jesis tion kaj jam en 1960 Blondeaux dissendis la duonon de la Esperanto-traduko de LG I; post konsidero de ricevitaj kritikoj sekvis la resto kaj listo de korektaĵoj en la unua parto.

En Nederlando oni estis daŭriginta la tradukon laŭ LTF, entute 5290 terminojn. En 1959 aperis 3000 el ili per aldonaj folioj al la nederlanda "Fervojisto", kiuj tamen pro la priskribita evoluo grandparte senvaloriĝis. Sed jam UIC laboradis pri nova, nun seslingva eldono: LG II. Ĝi aperis en 1965 kun ĉ. 11000 terminoj. Ĉu denove ŝanĝi la laborbazon?

Inter la TK-anoj revekiĝis la ideo de baza terminareto, al kiu la landoj povus aldoni siajn naciajn tradukojn, por ke la membroj de IFEF finfine havu ion konkretan en la manoj. Poste oni povus pli trankvile ellabori tradukon de LG II kun vere internacia reviziado. Ĝuste tio ja necesegis, por ke neniuj nacilingvistoj enpenetru. Germanio plej fervore antaŭenigis tian projekton surbaze de la ampleksa materialo kolektiĝinta, instigite ankaŭ per la laboroj por esperantlingva DUDEN-bildvortaro, kies fervojfakaj paĝoj estis esperantigitaj en 1964-65. En 1966 (Utrecht) la poŝformate presita "Fervoja Terminareto" germana-esperanta-germana, kompilita de G. Ritterspach, estis preta.

Jam du jarojn poste, en aŭtuno 1968, du landoj sekvis la ekzemplon germanan: Hungario kun poŝformata Fervoja Terminareto hungara-esperanta-hungara, redaktita de d-ro István Bácskai, kaj Norvegio kun Fervoja Terminaro, redaktita de Per Engen kaj Per Johann Krogstie, sur A5-folioj unuope elpreneblaj el kartonkajero. Jugoslavio sekvis en 1971 okaze de la kongreso en Maribor, kun poŝformata Fervoja Terminareto serbokroata-esperanta-serbokroata, redaktita de Josip Zupanić kaj ing. Ludoviko Sekereš. En aŭtuno de la sama jaro aperis la Fervoja Terminaro nederlanda-esperanta-nederlanda, en formato A4, redaktita de Jan A. Hardeveld. En la kongreso 1976 en Skellefteå la svedaj kolegoj povis prezenti bele binditan poŝformatan libron "Vortareto pri fervojaj terminoj" sveda-esperanta-sveda, de Harry Bengtsson redaktita, kaj en aŭtuno 1978 aperis bindita en A5-formato, la "Fervoja Leksikono" franca-esperanta, kun indekso en Esperanto, kompilita de André Blondeaux. Jen rimarkindaj atingoj. En sep naciaj lingvoj la IFEF-anaro nun disponis pri fervojfaka tradukhelpilo.

Paralele kun la aktiveco pri terminaretoj daŭris la traduklaboro koncerne la seslingvan UIC-vortaron, kies tria eldono (LG III) aperis en 1975 kun pli ol 11000 terminoj. Estis starigitaj laborplanoj por certigi diverslingvan reviziadon kaj fidindan finelekton de la plej trafa tradukpropono. Sed ankaŭ la plej rafinita plano ne pli multnombrigas la vere aktivajn kunlaborantojn aŭ iliajn liberhorojn, kaj nura korespondado ne ebligas kontentigan solvon. La dumkongresaj TK-kunsidoj - post la neeviteblaj raportoj - neniam sufiĉis por findiskuti dubajn terminojn; la afero ekstagnis.

Rekonsidero de ĉio farita necesis post la apero de la Plena Ilustrita Vortaro en 1970. El ĝi Ritterspach listigis tiucele por TK en 1972 ĉiujn terminojn markitajn per la vinjeto "fervojo" (134 kapvortoj), kaj en 1973 sekvis listo kun 25 proponoj por plibonigi aŭ kompletigi PIV-difinojn koncernantajn la fervojan fakon.

En Majo 1973 (Aarhus) ing. Sekereš transprenis la gvidadon de la Terminara Komisiono (kiel ĝi nomigas laŭ la Statuto valida de 1966): la taskon de TK-sekretario, kreitan per la nova Regularo ekde 1973, transprenis Jovan Ladjević (YU). En 1977 (Swanwick) Ritterspach fariĝis sekretario de TK. Freŝa vento venis en la komisionon kun Dieter Hartig (D), kiu en Oktobro 1976

*Inĝ. Ljudevit Sekereš (YU), gvidanto de la Terminara Komisiono ekde 1973. 2.44(f)*

(post la kongreso de Skellefteå) kreis per la memeldonita, eĉ ilustrita "Terminara Kuriero" propran organon por TK, kiu estis oficialigita en la 32a kongreso 1980 (America) sub daŭra redaktado de Hartig. Per ĝi estiĝis la necesaj kontaktoj tutjaraj inter la kunlaborantoj, venis instigoj, diskonatiĝis ideoj kaj kritikoj. Samtempe komenciĝis la aranĝado de interkongresaj laborkunvenoj, organizitaj de iuj aktivuloj por la kunlaborantoj de TK. Okazis ĝis nun tiaj renkontiĝoj en Budapeŝto (Nov. 1976 kun 13 partoprenintoj), en Amsterdam (Marto 1977, 9 p.), en Bennekom, NL (Novembro 1977, 11 p.), en Bruselo (Aprilo 1978, 8 p.), en Bremen (Aprilo 1979, 14 p.), en Győr (Aprilo 1980, 15 p.), en Linz (Marto 1981, 9 p.) en de Haan (Aprilo 1982, 9 p.), en Paris (Marto 1984, 10 p.). Ili multe progresigis la diskutadon de dubaj terminoj. Granda bato por TK estis la morto de k-go Blondeaux en Decembro 1982. Oni povas esti optimisma pri la aktiveco de la Komisiono, kiu nun havas kontakton kun laborgrupo de UIC, por ricevi eĉ antaŭ la eldono de LG IV anticipajn informojn. Estas la plej proksima kaj tre konkreta celo de IFEF, realigi la revon de la fondintoj de la fervojista movado kaj de miloj da interesitoj, nome la eldonadon de Fervoja Terminaro, valida en la tuta mondo.

Ĉi-sube ni publikigas liston de ĉiuj al ni konataj personoj, kiuj dum la ekzistado de la fervojista movado esence kontribuis al la terminara resp. fakprelega laboro aŭ elstaris kiel verkintoj aŭ tradukintoj de fakaj artikoloj:

#### **ĝis 1914**

J. Bal (NL)	J. Lundgren (S)
C. Bendel (D)	Hans Reuss (D)
Armand Berlande (F)	H. Salokannel (SF)
W.F. Lawrence (GB)	

#### **inter la militoj**

Gustaav Beirens (B)	Emmanuel Kubásek (CS)
Josef Blažek (CS)	Ernst Muthschall (D)
P. Butković (YU)	Jules Perlet (CH)
Sidonie Dlouka (CS)	Alfred Petzold (D)
Ernst Eriksson (S)	Jlija F. Puhalo (YU)
C.C. Fears (US)	A. Pung (Estonio)
Georg Habellok (D)	Josef Rebiček (CS)
R. Horrisland (N)	inĝ. Edward M. Rosher (US)
Teodor Kovacs (H)	

#### **post 1948**

Bror Simon Agren (S)	inĝ Willi Brandenburg (D)
d-ro István Bácskai (H)	Cornelis A. Broekman (NL)
Wilhelm Barnickel (D)	Klaas Brouwer (NL)
Harry Bengtsson (S)	Léon de Bruyne (B)
Jean Bipp (CH)	Kare Bye (N)
André Blin (F)	Magnus Carlsen (N)
André Blondeaux (F)	Johan Christoffersen (DK)
inĝ. Erwin Böhm (D)	Frank Curtis (GB)
inĝ. László Boronkay (H)	Slava David (CS)
d-ro Serio Boschin (I)	Rafael Devis (E)
Gerrit Bouwkamp (NL)	Karoly Endre (H)

*Heinz Dieler Hartig (D) kreis en 1976 la internacian organon "Terminara Kuriero" kaj redaktas ĝin de tiam. Helpe de ĝi la agado de TK konsiderinde estis progresigita kaj plirapidigita. 2.45(f)*

Per Engen (N)	Heinrich Pape (D)
Rodriquez Escartin (E)	E. H. Olsen (OK)
Joachim Giessner (D)	Clifford S. Parry (GB)
Kurt Greutert (CH)	d-ro Ferenc Phersy (H)
dipl. inĝ. István Gulyás (H)	inĝ. Zdenek Polák (CS)
Jan Hardeveld (NL)	J. Ph. Punt (NL)
John Harrison (GB)	inĝ. Jaromir Rebíček (CS)
Heinz Dieter Hartig (D)	Josef Řebíček (CS)
Karl Hell (D)	Robert Retault (F)
Alois Hilkersberger (A)	Gernot Ritterspach (D)
Jaromir Hinčica (CS)	Edward M. Rosher (GB)
Willem F. Hoogendijk (NL)	Antti Ruhanainen (SF)
inĝ. Walter Huber (A)	d-ro Antonio de Salvo (I)
Hans Hunkeler (CH)	inĝ. Ljudevit Sekereš (YU)
Kornelis G.J. de Jong (NL)	Josef Sighartner (A)
inĝ. Lajos Kapitány (H)	inĝ. Simeon Simeonov (BG)
Emil Keiser (CH)	inĝ. Adolf Simon (D)
Per Johan Krogstie (N)	d-ro Spadafora (I)
Elfriede Kruse (D)	mag. Gvozden Sredić (YU)
Jaap J. Labordus (NL)	František Suchy (CS)
Jovan Ladjević (YU)	Lucien de Sutter (B)
prof. B. Lattanzi (I)	d-ro Mihály Szegedi (H)
Fritz Lautenbach (D)	Niels Christian Thorsted (OK)
Wim van Leeuwen (NL)	Gunnar Thuesen (OK)
Germaine Lemonnier (F)	dipl. inĝ. Friedrich Tschom (A)
Albert Lienhardt (F)	Norbert Vanspeybrouck (B)
Georges Mazaud (F)	Otto Walder (CH)
Ferenc Nagy (H)	Josef Zink (A)
Mag. Nils Gösta Narvala (SF)	Josip Zupanić (YU)

### Fakprelega Komisiono (FK)

La starigon de la Fakprelega Komisiono oni povas datumi je la kongreso de Linz (1959). Tamen tiu ĉi raporto komen-ciĝu pli frue. Jam por la 3a IFEF-kongreso Paris (1951) LKK enprogramigis viziton en vartejo por lokomotivoj, kaj en la 4a kongreso Lindau (1952) okazis konekse al vizito de la riparejo Friedrichshafen eĉ 3 fakaj prelegoj. Tiel oni povis utiligi rezulton el la laboro de la tiama Terminara Komitato.

Sed ekde la 6a kongreso oni aplikis jenan alian sistemon: La delegitoj decidis en ĉiu kongreso pri unu temo, kiun ĉiuj landaj asocioj prilaboris dum la sekvonta jaro kaj prezentis ĝin per ne tro longa) prelegoj dum la venonta kongreso. Kvankam kutime ne ĉiuj landoj partoprenis, la kongresanoj tamen devis atskulti dekon da prelegoj pri la sama temo, iom teda afero. Sed aliaj malavantaĝoj estis, ke ne ĉiuj landaj asocioj disponis pri fakuloj majstrantaj Esperanton. Sekve ofte necesis tradukoj, kiuj manke de terminaroj ne povis esti senriproĉaj. Krome vera komparo de la cirkonstancoj en la unuopaj landoj apenaŭ eblis, ĉar la prelegoj ne estis prilaboritaj laŭ samaj principoj. Sekve la utilo de tiaj prelegoj estis nekontentiga.

Tiamaniere oni eksperimentis de 1954 ĝis 1958. Por la kongreso en Linz (1959) oni planis internacie kompareblan prelegon pri la porklientaj horaroj, kiu tamen ne okazis pro diversaj malfacilaĵoj. Anstataŭ tio LKK prezentis tradukitan tekston de eminenta fakulo pri pordejoraj horaroj. Sed tiu kongreso fariĝis la ĝermo por nova sistemo. La delegitoj decidis la starigon de kvinkapa "Fakprelega Komitato", kies gvidadon transprenis Joachim Giessner (D). Ties tasko estis, en kunlaboro kun lo Terminara Komisiono estonte zorgi pri altnivelaj kongresaj fakprelegoj. La nova ideo estis, ke la kongreslando elektu laŭeble aktualan temon, pri kiu fakulo, se eble esperantisto, verku prelegon, kiu post reviziado flanke de TK estu prezentata en sen riproĉa formo laŭeble kun aldono de filmoj aŭ diapozitivoj.

La unua prelego laŭ tiu nova metodo okazis en la 12a kongreso en Helsinki

(1960). Ekde nun FK kaj la LKK-oj laboris nur laŭ ĝi. La nova sistemo baldaŭ kondukis al kreskanta nivelo de la fakprelegoj, kiuj principe estis verkitaj de fakuloj, foje eĉ prezentitaj de ili mem. Jam pri la unua tia prelego (1960) interesiĝis la Dokumenta Servo de DB kaj de tiam katalogis ĝin ĉiujare. Fervojaj eminentuloj, faklernejoj, bibliotekoj ekde tiam ricevas la ofte alloge aspektajn, de LKK eldonitajn tekstbrosurojn. Kaj helpe de kompleta publikigo en "Internacia Fervojisto" kaj resumoj, donitaj kaj al redaktoroj kaj interesuloj, ankaŭ nekongresanoj, eĉ ne-IFEF-anoj, povas informiĝi pri tiuj ofte ne nur por fervojistoj interesaj temoj. Ĝis nun unika eksperimento estas farita en la kongreso de Fulda (1967). Tie oni prezentis prelegon, en kiu estis kunlaborintaj 11 landoj surbaze de demandiloj. La temo: "Skrribaj ordonoj al trajnoj". Post trijara pena preparado prezentiĝis internacie kompareblaj prelego kaj bildoj. Kiam denove io tia? Oni deziras demandi.

Ankaŭ en kelkaj Universalaj Kongresoj estis prezentitaj altnivelaj prelegoj, kies unua jam 1958 en UK Mainz fariĝis plena sukceso kaj estis kvazaŭ la unua paŝo sur la nova vojo.

La "leĝan" bazon por la fakprelega laboro jam enhavas la "Reordigita Regularo" de IFEF el la jaro 1951 kaj denove tiu de 1953 en siaj paragrafoj tri. Al la plikompletigita regularo de 1961 estis aldonita aparta "Kongresa Regularo", kies § 16 detale fiksas celon kaj labormanieron de la fakprelegoj. La "komitato" estis anstataŭigita per "rektorato", konsistanta el kamisiito de la estraro (Giessner) kaj po unu membro de la aktuala kaj de la venonta LKK. La posta statuto de 1972 enhavas en "Aldono III" detalan tekston "Regularo por la Fakprelega Komisiono", laŭ kiu funkcias tiu grava branĉo de IFEF. K-go Brandenburg starigis kompletigon al la "Aldono III" sub titolo "Ĝeneralaj Gvidlinioj" en 1975.

Ĝis la kongreso de Varna (1968) k-go Giessner gvidis la fekprelegan laboron, poste transprenis ĝin inĝ. Willi Brandenburg (D), kaj de post la kongreso de Turku (1979) gvidas Gunnar Thuesen (DK). En 1977 G. Ritterspach (D) transprenis la sekretariajn taskojn de FK. Por plivigli la komisionon, al kiu la landoj delegu sian kunlaboranton, kaj por pligrandigi ĝian utilon, oni enkondukis en la kongreso de Regensburg (1981) novaĵon. Nome en la komisiona (publika) kunveno kelkaj diverslandaj kolegoj koncize prelegas pri aktualaĵoj el siaj landoj kun posta diskutado, valora kompletigo de la kutima fakprelego.

Finkonkludo: Per sia cellrafa agado la Fakprelega Komisiono de multaj jaroj esence kontribuas al la bona reputacio de IFEF.

*Ing. Willi Brandenburg (D), gvidanto de la Fakprelega Komisiono de 1968 ĝis 1979. 2.47(f)*

*Gwnnar Thuesen (DK), gvidanto de FK ekde 1979, iniciatinto de kongresprelegoj "Aktualaĵoj el via lando". 2.47(f)*



**Tabelo de la fakaj prelegoj kaj ekskursoj ekde 1951 kun kelkaj aldonaj indikoj**

jaro	loko	lando	kongreso	temo	aŭtoro	rimarkoj
1951	Paris	F	3a IFEF	Vizito al lokomotiv- esploroj Vitry	Ferv. kons. Schuchmann	
1952	Lindau	FRG	4a I FEF	1. Kanaliĝo de la Mosel 2. Evoluo de la francaj dizel-lokomotivoj 3. Nova ŝpalsistemo de SNCF 4. Vizito kun fakaj klari- goj en riparejo Fried- richshafen	Turbellier  Demolliens	Mallongaj re- feroj orig. en E-o sub gvida- do de ferv. kons. Simon
1953	Utrecht	NL	5a IFEF	1. Vagonkonstruado en Nederlando 2. Vizito kaj fakaj klari- goj en la Vagonfabriko "Werkspoor"	J. Ph. Punt  J. Ph. Punt - G.C. de Greef	Orig. en E-o
1954	Verona	I	6a IFEF	La faka eduko de junaj fervojistoj	pluraj l.a. *	
1955	Zürich	CH	7a IFEF	1. Dungado kaj instruado de la lokomotiv- personaro 2. Vizito sur ĉefregadejo Zürich HBF kun fakaj klarigoj	pluraj l.a.	
1956	Stock- holm	S	8a IFEF	Laborkondiĉoj de la fer- vojistoj	pluraj l.a.	
1957	Rijeka	YU	9a IFEF	Instruado kaj promociigo de fervojistoj	pluraj l.a.	Kompilita por la kongreso de Christoffersen (DK)
1958	Aarhus	DK	10a IFEF	Purigado de lokomotivoj kaj vagonoj	pluraj l.a.	

\* La prelegoj en la IFEF-kongresoj de 1954 ĝis 1958 okazis laŭ metodo, ke pluraj landaj asocioj prezentis ne tro longajn prelegojn pri sama temo, elektita flanke de la landaj delegitoj en la antaŭa kongreso.

jaro	loko	lando	kongreso	temo	aŭtoro	rimarkoj
1958	Mainz	FRG	43a UK	1. Raciigado, modernigado, aŭtomatigado ĉe la fervojo 2. Fakekskurso al ĉefregadejo Frankfurt Main Hbf kun prelego pri tiu regadejo	Fervoja Prezidanto Geimann Joachim Giessner	tr. ferv. kons. Otto-Heinrich Winkelhaus orig. en Esperanto
1959	Linz	AT	11a IFEF	1. Evoluo k esenco de la pordeĵoraj fervojaj horaroj 2. Signaliloj de la Aŭstrijaj Federaciaj Fervojoj	d-ro Kepnik Walter Ulrich	tr. Hans Bürger neplanita spon-tanea prelego
1960	Helsinki	SF	12a IFEF	Kiel la finnaj fervojoj luk-tadas kontraŭ la vintro	mag. Nils Gösta Narvala	orig. en E-o
1960	Kobenhavn	DK	33a SAT	Danio - la lando de la fervojaj pontoj (kun 2 filmoj)	Niels Christian Thorsted	orig. en E-o
1961	Barcelona	E	13a IFEF	La larĝa ŝpuro en Hispanio	Rodriguez Escartin	kun movebla modelo de ŝpurŝanĝa instalaĵo sinkronizita de Gernot Ritter-spach
1961	Heidelberg	FRG	5a GEFA-Jarkunveno	Sonfilmo de DB "De 0 ĝis la 24a horo"		
1962	Budapest	H	14a IFEF	1. Evoluo de longrelaj kaj senbreĉaj trakoj en Hungario 2. Veturado en mezurilvagono kun fakaj klarigoj		tr. inĝ. László Boronkaj
1962	Kobenhavn	DK	47a UK	1. La Birdfluglinio 2. Vizito kun fakaj klarigoj en la aŭtomata sidlokrezervad-centralo	N. Loumann	tr. Johannes Christoffersen
1963	Stoke-on-Trent	GB	15a IFEF	La rilatoj inter la Britaj Fervojoj kaj la Kontinento	S.J. Pickard	tr. Frank Curtis
1963	Sofia	BG	48a UK	La socialaj kaj vivmanieraj atingajoj de la fervojistoj en la P.R. BG	Stajko Pisarov	orig. en E-o

Ekde 1960 lau nova metodo. nome la gastiganta asocio prezentas prelegon pri aktuala temo de sia fervojo. Kutime la prelegaj malnetoj antaŭe estas reviziitaj lingve kaj stile, foje ankaŭ fake, de la terminara resp. fakprelega komisionoj.

jaro	loko	lando	kongreso	temo	aŭtoro	rimarkoj
1964	Bruselo	B	16a IFEF	La aplikado de la elektroniko ĉe la Nacia Societo de la Belgaj Fervojoj Wir Lokfuhrer unter uns (Ni lokomotivestroj inter ni)	s-ro Hendrickx  Kurt Greutert	tr. André Blondeaux  28 paĝa broŝuro en germana lingvo laŭ internacia enketo en 14 landoj
1965	Hamar	N	17a IFEF	La novaj vartarifoj de la Norvegaj Ŝtataj Fervojoj (NSB)	Per Engen	orig. en E-o
1966	Utrecht	NL	18a IFEF	1. La mekanikigo de la specajmanipulado. Fakaj ekskursoj kaj klarigoj: 2. Vizito al la Centra Stacidomo 3. Vizito al la disellokomotiva laborejo kaj studcentro por la signalado 4. Vizito en la ĉefadministraciejo kaj pecajhalo de Van Gend & Loos 5. Vizito en la vagonfabriko "Werkspoor"  6. Vespere vizito de la haloj por la nokta transporto de stratvoja pecajo kaj de pendanta (nepakita) konfekcio de Van Gend & Loos.	Jaap Labordus  L. Kasje  H. Hoekstra H. Becker  Jaap Labordus  J. Ph. Punt - G.C. de Greef  Jaap Labordus	Kompilita laŭ faktoj donitaj de la informservo de Van Gend & Loos orig. en E-o

jaro	loko	lando	kongreso	temo	aŭtoro	rimarkoj
1966	Budapest	H	51a UK	La kultura kaj ekonomia integriĝo de la homaro en la historio de la trafiko kaj fervoja teknika evoluo	d-ro Vince Mészáros	Tr. Lajos Kökény
1967	Fulda	FRG	19a IFEF	1. Skribaj ordonoj al trajnoj kaj substituaj metodoj (kun bildbroŝuro enhavanta 48 klarigajn fotografarojn) 2. Metodo de aŭtomata influo je trajnveturado, precipe ĉe la Germana Federacia Fervojo (kun klarigaj fotografaroj) 3. Vizito kaj fakaj klarigoj en loka riparejo 4. Sonfilmo de DB "Trajno 204 ek 20"	Joachim Giessner  ing. Erwin Böhm	Orig. en E-o laŭ internacia enketo en 12 landoj  sinkronizita esp. de Gernot Ritterspach
1968	Varna	BG	20a IFEF	1. Enkonduko de la elektra kaj dizelaj traktioj ĉe la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj (BDŽ) 2. La vagonkonstruado en P.R. BG, kelkaj novaj ŝarĝvagonoj kaj ilia elprovo	d-ro inĝ. E. Petrov, inĝ. S. Simeonov, inĝ. V. Velickov, inĝ. K. Ermenkov, inĝ. J. Dimitrov	ĉion tr. S. Simeonov kaj S. M. Simeonov
1969	Avignon	F	21a IFEF	1. La francaj fervojoj kaj la grandaj rapidoj 2. Vizito en loka riparejo kun fakaj klarigoj	aranĝ. de André Blondeaux	Laŭ SNCF-dokumentoj kaj artikoloj el "la Vie du Rail"
1969	Helsinki	SF	54a UK	1. Evoluo kaj nuna stato de internacia persontrafiko ĉe la Finnaj Ŝtatafervojoj 2. Nuntempa scienca informado kaj dokumentado kun aparta konsidero de la lingvaj problemoj (ISU)	mag. Nils Gösta Narvala inĝ. Simon Simeonov (BG)	orig. en E-o  orig. en E-o

jaro	loko	lando	kongreso	temo	aŭtoro	rimarkoj
1970	Rimini	I	22a IFEF	1. La relnivelaj transtrakaj pasejoj de la italaj privatfervojoj 2. Eŭropa Fervojojplano	prof. inĝ. Bernardino Lattanzi d-ro ing. G. de Rosa	orig. en E-o  tr. d-ro Antonio de Salvo
1970	Wien	AT	55a UK	1. La aŭtomata kuplilo - grava kontribuo al la raciigo de la fervojoj 2. Sonfilmo esp. sinkronizita "La eŭropa aŭtomata kuplilo" (DB)	inĝ. Walter Huber	orig. en E-o  sinkr. Gernot Ritterspach
1971	Maribor	YU	23a IFEF	1. Modernigo de Jugoslaviaj Fervojoj 2. Klerigado ĉe fervojaj administracioj	inĝ. Ljudevit Sekereš Fritz Lautenbach (D)	orig. en E-o  orig. en E-o laŭ internacia enketo en 15 landoj
1971	London	GB	56a UK	Trafikaj problemoj en la venonta jardeko (ĉe la britaj fervojoj)	F.W. Young	tr. Horace Barks
1972	Lugano	CH	24a IFEF	1. La Gothardo-Ferovojo 2. Fakekskurso al riparejo Bellinzona kun klarigoj 3. Fakekskurso al limstacio Chiasso kun klarigoj	Anton Eggermann	tr. Gernot Ritterspach k inĝ. Willi Brandenburg (D)
1973	Aarhus	DK	25a IFEF	1. La Danaj Ŝtataj Fervojoj kiel Ŝipkompanio 2. Eŭropa fervoja politiko en la Komuna Merkato 3. Faka ekskurso al la vagonfabriko Scandia	Gunnar Thuesen d-ro Werner Bormann (D)	orig. en E-o  orig. en E-o
1973	Beograd	YU	58a UK	Ekonomieco de transporto de varoj en konteneroj	Mag. Gvozden Sredić	orig. en E-o
1973	Koblenz	FRG	17a GEFA-Jarkunveno	Aŭstralio kaj ĝiaj trafikvojoj	Ralph Harry (Aŭstralio)	orig. en E-o
1974	Tarragona	E	26a IFEF	Evoluado de RENFE dum la lasta jardeko	laŭ oficialaj dokumentoj	tr. Anglada Prior
1974	Ham-burg	FRG	59a UK	1. Kion vi ankoraŭ ne sciis pri la ferovojo (85 bildoj pri 19 tervojaj novaĵoj) 2. Fakekskurso al la kontenera kajo en la haveno	Gernot Ritterspach	orig. en E-o

jaro	loko	lando	kongreso	temo	aŭtoro	rimarkoj
1975	Villach	AT	27a IFEF	Aŭtomobil-transportado tra la fervoja tunelo inter Salzburg kaj Karintio	dipl. inĝ. Fritz Tschom	orig. en E-o
1975	Kobenhavn	DK	60a UK	DSB-vartransporto	E. Henning Olsen	orig. en E-o
1976	Skel-lefteå	S	28a IFEF	La sveda ercfervojo	aranĝita de Yngve Förslund	laŭ SJ-materialo kun arkivaj fotoj
1977	Swanwick	GB	29a IFEF	Vagondispozicio kaj cirkuladkontrolado ĉe la Britaj Fervojoj per elektronika operaciado	F.W. Young	Tr. Frank Curtis
1978	Roma	I	30a IFEF	La rektega fervojo inter Roma kaj Firenze	d-ro Antonio de Salvo	orig. en E-o
1979	Turku	SF	31 a IFEF	Kombinita vartrafiko kaj rolo de specialaj entreprenoj Parto I: Superrigardo kaj speciala pritrakto konc. "Intercontainer" Parto II: La kompanio "Railship" kaj la teknika realigo de transmara vagon transporto inter Hanko kaj Travemünde	Mag. Gvozden Sredić (YU)  Mag. Nils Gösta Narvala	orig. en E-o  orig. en E-o
1979	Luzern	CH	64a UK	Nova trafikkoncepto de Svislando	Mag. Gvozden Sredić (YU)	orig. en E-o
1980	Løten	N	3a Nordia Kunveno	DSB-pramoj sur Granda Belto dum 100 jaroj	Gunnar Thuesen (DK)	orig. en E-o
	America	NL	32a IFEF	Fervojoj en la Basaj Landoj	inĝ. W. Meijnen	tr. J. Ph. Punt
1981	Regensburg	FRG	33a IFEF	1. Trajnoj sen radoj 2. Sonfilmo "Magnetrajno en Evoluo" (de MBB) 3. Fervojaj aktualaĵoj el 6 landoj: CH, D, DK YU, N, NL.	Gernot Ritterspach	orig. en E-o en E-o komentariis G. Ritterspach orig. en E-o

jaro	loko	lando	kongreso	temo	aŭtoro	rimarkoj
1982	Balatonfüred	H	34a IFEF	1. La estonto de la eŭropaj fervojoj kaj la rolo de la Hungaraj Ŝtatfervojoj 2. Fervojaj Aktualaĵoj el CH, D, DK	dipl. inĝ. István Gulyás	orig. en E-o  orig. en E-o
1982	Antwerpen	B	67a UK	Kelkaj pensoj pri la stato de la fervojoj kaj de Esperanto kiel fervoja faklingvo	Per Engen (N)	orig. en E-o
1983	Oostende	B	35a IFEF	1. La rolo de la fervojo en la haveno Zeebrugge 2. Filmo "La haveno de Zeebrugge" 3. Fakekskurso tra la haveno de Zeebrugge 4. Fervojaj aktualaĵoj el 7 landoj CH, D, DK, GB, N, NL, SF + 2 ĝeneralaj novaĵoj 5. Kelkaj pensoj pri la stato de la fervojoj kaj de Esperanto kiel fervoja faklingvo	Norbert Vanspeybrouck    Per Engen	orig. en E-o kun enkodukaj diapositivoj G. Ritterspach komentariis en E-o orig. en E-o  orig. en E-o (ripeto de 67a UK)
1983	Budapest	H	68a UK	1. La evoluo de la Hungaraj Fervojoj  2. La rilatoj inter UEA kaj la Fervojista Movado de 1909 ĝis la nuntempo 3. La rolo de la Hungaraj Fervojoj en la Komunikado	inĝ. J. Halász  Joachim Giessner  János Patay	kompletigita per 4 serioj de movigantaj dia-oj pri la historio de la vaporlokomotivoj orig. en E.o  orig. en E.o
1983	Opole	PL	2a Renkonto de polaj Fervojistoj esperantistaj	1. IFEF kiel mondorganizo 2. Organizo kaj Funkciigado de okcidentaj Fervojoj	Otto Rösemann Joachim Giessner	orig. en E.o orig. en E.o







## 8-a ĉapitro

### Esperanto en fervojaj horaroj

Lando (Ferv.)	Nomo de la horarlibro	Eldonaĵo tutlanda	Eldonaĵo aliŝpeca	E-teksto de jaro	E-teksto al jaro	Titoloj de la E-tekstoj
Aŭstrio (ÖBB)	Amtliches Österreichisches Kursbuch	x		1936	nur 1 x *	Ŝlosilo por la horarlibro Klarigo de la signoj
Bulgario (BDŽ)	Ptjevoditjel	x		1964/65	nun	Ĝenerala instrukcio por la uzado de la horarlibro
Ĉeĥoslovakio (ČSD)	Jizdni řád	x		1979/80	nun	Ĝeneralaj instrukcioj, konsiloj kiel uzi la horaron, klarigo de signoj
Danlando (DSB)	Koreplan Fjerntrafik	x		1961 1974	nun nun	Klarigo de la signoj en E-o Klarigo de la signoj en E-o
Finnlando (VR)	Suomen Kalkuneuvot "Turisti"	x		1921	1949	Klarigoj de konvenciaj signoj
Germanio, F.R. (DB)	Amtliches Kursbuch Reisefernfahrplan	x	x	1953 1955	1967/68 1965/66	Horarŝlosilo (Esperanto), klarigo de la signoj Klarigoj de la signoj, atentigoj por pasaĝeroj eksterlandaj
Hungario (MÁV)	Hivatalos menetrend Nemzetközi menetrendje	x	x	1961 1981	nun nun	Uzado de la fervoja horarlibro, signoj kaj mallongigoj, enlandaj tarifaj informoj Informoj por la uzado de la horarlibro, atentigo, gravaj tarifaj sciindaĵoj
Italio (FS)	Orario ufficiale	x		1968	nun	Ĝeneralaj avertoj por la uzado de la horarlibro, signoj kaj mallongigoj utiligitaj en la horartabeloj
Jugoslavio (JŽ)	Putnički red vožnje	x	(x)	1960	1972	Horarŝlosilo, klarigo de signoj, internacia trafiko, rabatoj en la internacia trafiko
Norvegio (NSB)	Rutebok for Norge Utdrag av ruter (utkast)	x x		1980 1975	nun 1977/78	Signo-klarigoj Rimarkoj
Pollando (PKP)	Polaczenia		x	1959	nun	Ĝeneralaj informoj, klarigo de signoj kaj mallongigoj

\* La Universala Kongreso okazis 1936 en Vieno.

## 9-a ĉapitro

### NI kaj FISAIC

FISAIC, la granda internacia kulturorganizo de la fervojistoj, dankas sian fondiĝon kaj evoluon nelaste al aktivecoj de esperantistaj fervojistoj. Por ke tio ne forgesiĝu, ni dediĉas apartan ĉapitron pri niaj rilatoj al tiu organizo.

#### Pri la organizo FISAIC

La iniciatinto de FISAIC estis d-ro Marcel Mollion (F), kiu en la jaroj ĉirkaŭ 1950 estis prezidanto de UAICF (Franca Asocio de Kulturflegantaj Fervojistoj, poste landa sekcio de FISAIC). La konata pariza renkontiĝo de francaj kaj nederlandaj geesperantistoj en 1947 kaj eĉ pli la 3a IFEF-kongreso en Paris 1951 konvinkis d-ran Mollion, ke Esperanto estus utila por starigi internacian kulturen federacion de fervojistoj. Al ĉiuj preparaj kunvenoj li invitis reprezentanton de FFEA, kion plej ofte plenumis ties tiama prezidantino Germaine Lemonnier.

La 15an de Novembro 1952 okazis la fondkunveno en Strasbourg (F) en ĉeesto de reprezentantoj el A, B, D, E, F, L, NL, CH, kaj SYR (por FFEA ĉeestis G. Lemonnier kaj Robert Coyac).

La novan federacion oni nomis franclingve "Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots", por ni pli komprenebla Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj. En Junio 1953 estis aranĝita la 1a Generala Asembleo. Tie oni decidis, ke apud la sola laborlingvo, la franca, Esperanto estos uzebla same kiel aliaj naciaj lingvoj, decido, kiu bedaŭrine neniam havis praktikajn konsekvencojn. En tiu asembleo oni elektis d-ran Mollion ĝenerala prezidanto (ĝis 1965); sekvis d-ro Emile Schlessler (L) ĝis 1981, de tiam Gilbert Schmit (L). D-ro Schlessler en 1970 fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de IFEF.

FISAIC ne celas materian gajnon.

Ĝia emblemo estas pelvo, kiu kuŝas sur flugilrado. El la pelvo lumas flamo. Medalojn en oro, arĝento kaj bronzo (ne puraj metaloj) FISAIC donas okaze de konkursoj kaj ekspozicioj, sed ankaŭ pro elstaraj personaj meritoj al unuopaj personoj, ekz. esperantistoj. Tiaj medaloj estas la plej altaj distingaj akireblaj en fervojista medio.

En ĉiujare eldonata "aranĝo-kalendaro" estas publikigataj ĉiuj internaciaj okazantaĵoj aranĝotaj sub aŭspicioj de FISAIC en la venontaj jaroj, do ankaŭ la IFEF-kongresoj. En 1981 FISAIC kreis propran flagon laŭ propono de GEFA. Ĝi flirtis la unuan fojon antaŭ la kongresejo de la 33a IFEF-kongreso en Regensburg.

Laŭ la FISAIC-statuto membreco en ĝi nur eblas pere de la landaj sekcioj de FISAIC. Tio signifas, ke neniel internacia organizo (ekz. IFEF) povas rekte membriĝi, sed nur ĉiu unuopa landa asocio de IFEF pere de sia landa sekcio de FISAIC. IFEF ne nur ekzistis jam antaŭ la fondiĝo de FISAIC, sed eĉ servis kiel modelo por ties starigo, kaj ĝi estas la sola internacia organizo, kiu dum la tuta ekzistado de FISAIC regule ĉiujare aranĝis kongreson.

Nuntempe FISAIC havas 20 landajn sekciojn, nome en A, B, BG, GB, DK, SF, F, D, GR, E, H, I, IL, YU, L, NL, N, P, S, CH.

Aktivecoj de IFEF por FISAIC

Laŭ peto de doro Mollion en la kvindekaj jaroj f-ino Lemonnier kontaktis plurajn landajn asociojn de IFEF kaj informis ilin pri FISAIC. En la 6a IFEF-kongreso 1954 ŝi proponis kunlaboron inter IFEF kaj FISAIC, kio estis unuanime akceptita. En 1956 ŝi donis gravajn informojn en Aarhus (DK). En la UK Marseille 1957 ŝi same agis en la fervojista kontaktkunveno, ĉiam laŭ komisio de doro Mollion. Sekve de tiuj multflankaj klopodoj aŭ la respektivaj landaj asocioj de IFEF aliĝis al la koncernaj landaj sekcioj de FISAIC aŭ tiuj lastaj eĉ far tio estis nove fonditaj. Tio estis la kazo ekz. en B, DK, SF, S kaj CH.

Novaj similaj klopodoj komenciĝis en la jaroj ekde 1964. Tiam la germana landa FISAIC-sekcio petis la prezidanton de GEFA (eĉ skribe kaj kun aldono de tripaĝa "informilo"), k-gon Giessner, helpe de la konataj internaciaj rilatoj de la esperantistoj interesiĝi novajn landojn por membriĝi en FISAIC. Tio kondukis al FISAIC-sekcioj en GB, E kaj N post malmultaj jaroj. Same komenciĝis klopodoj, krei kontaktojn al landoj en la orienta parto de Eŭropo, kie ĝis tiam nur YU estis membro de FISAIC. Tiuj taskoj tamen montriĝis multe pli komplikaj ol la antaŭaj. Daŭris pli ol jardekon, ĝis kiam post kelkfoje ripetitaj kunvenoj ĉe kompetentaj instancoj kaj same ripetitaj

klopodoj de niaj hungaraj k-joj la hungaraj Esperanto-fervojistoj en 1981 povis sendi petskribon al FISAIC kaj en ties samjara generala asembleo estis akceptitaj kiel landa sekcio. Kromaj klopodoj paralelis en aliaj socialismaj landoj, kies lasta rezulto estis la fondo de landa sekcio de FISAIC en Bulgario, ankaŭ tie helpe de la daŭraj klopodoj de la bulgaraj fervojistoj esperantistaj. El Pollando intertempe same aŭdiĝis la deziro membriĝi en FISAIC. Resumante tiun jardekojn daŭran evoluon, oni rajtas konstati, ke la helpo de IFEF ebligis al FISAIC la fondon de minimume 10 el ĝiaj landaj sekcioj.

### **Lingvaj problemoj**

La lingvaj problemoj en FISAIC estas malagrablaj, kiel en ĉiu internacia organizo, kvankam "nur" du laborlingvoj estas uzataj, nome la franca kaj la germana. Tio necesigas seninterrompan interpretadon dum la kunsidoj kaj dulingvan verkadon de ĉiuj protokoloj kaj korespondadoj. Sed eĉ pli maloportune: tiu stato devigas ĉiujn delegitojn, kies gepatra lingvo ne estas unu el la nomitaj du, paroli respektive balbuti per ili aŭ silenti. Jen hontiga diskriminacio inter fervojistoj de granda federacio, kiu inter siaj ĉefceloj mencias la starigon de internaciaj kontaktoj.

La svisa k-go J. Bipp jam komence, kiam la franca estis sola laborlingvo, antaŭvidis tiun evoluon. Pro tio li alvokis la tiamajn landajn asociojn de IFEF, malhelpi la aldonon de aliaj naciaj lingvoj, sed anstataŭ tio pledi por enkonduko de Esperanto. Vane. Ankaŭ pli postaj provoj de k-joj Giessner (D), Greutert (CH) kaj Hauge (DK) fine kondukis nur al la rezulto, ke Esperanto havas la saman rajton kiel intertempe la angla, nome kaze de bezono kaj se ĉeestas Esperanton parolanta interpretisto, oni rajtas uzi ĝin en kunvenoj.

Finante ni konstatu: La multflankaj celoj kaj agado de IFEF ekzakte konformas al la celoj de FISAIC. Sed niaj eblecoj helpe de la Internacia Lingvo kapabligas nin, multe pli direkte, grandskale kaj intime alproksimiĝi al tiuj celoj. Tiamaniere IFEF kun siaj landaj asocioj plej komplete plenumas la kulturalan komision de FISAIC.

*Ekzemploj el kongresa vivo: teatraĵo, ekspozicio, instruado. 2.59(f)*

## II-a Sekcio

### Landaj asocioj

#### Aŭstria Fervojistista Esperanto-Federacio (AFEF)

Jam en 1910 fervojistoj en tiama Aŭstrio-Hungario agadis kiel esperantistoj. Tiam la fervoja ministerio dissendigis cirkuleron pri "Uzado de la lingvo Esperanto por celoj de internacia komunikado sur fervojoj". En la jaroj antaŭ la unua mondmilito la Imperiestra-Reĝa Ministerio por fervojaj aferoj eldonis du ĉarmajn ilustritajn broŝurojn kun po pli ol 100 paĝoj, kiuj priskribis multajn gravajn fervojajn liniojn kaj vojaĝeblecojn en la tiama Aŭstria-Hungara Monarkio.

"Fervoja Esperantisto" n-ro 4/1911 enhavis 34 membroadresojn (la plej multajn en la posta CS). Ankaŭ inter la du militoj ekzistis respektivaj grupoj, ekz. en 1923/24 sub H. Steiner, en 1929 sub J. Zink, kiu estis ankaŭ aŭstria asosoro (delegito). La 14.6.1925 ÖBB-Ĝeneraldirekcio enketigis la nombron de fervojistoj parolantaj aŭ lernontaj Esperanton.

En 1929 la ministerio eldonis gvidfoliojn.

Post la dua mondmilito la fervojista esperantistaro de Aŭstrio laboris en la kadro de la Aŭstria Esperantista Federacio. Fondiĝis faka grupo nomita "Fervojistista Esperanto-Fakgrupo Aŭstrio". Tiu fakgrupo en 1949 kotizis ĉe IFEF por 45 membroj kaj jam en 1950 sukcesis organizi la 2an IFEF-kongreson en Salzburg. Al FISAIC ĝi supozeble aŭtomate kun aliaj libertempaj grupoj aliĝis en la jaro 1953.

Unu membro estu aparte menciata, nome Johann Bürger, kiu sian tutan vivon dediĉis al agado por nia faka movado. Laŭ lia iniciato dum la 50aj jaroj estas instalitaj informtabuloj "Esperanto-Servo" kun oficiala permeso en ĉiuj stacioj, kie deĵoris aŭ loĝis esperantistaj fervojistoj, sume pli ol tridek.

En Septembro 1956 okazis internacia feriosemajno, kiun partoprenis 130 personoj el 9 landoj.

Ekde aŭtuno 1956 aperis propra organo, nomata "Bulteno de la Aŭstria sekcio de IFEF". Redaktis ĝin dipl. ing. Fritz Tschom. Sub gvidado de la fervojistaj esperantistoj **en 1957** estis inaŭgurita Esperanto strato en Knittelfeld. Dum tiu tempo agis fervojistaj Esperanto-grupoj en Knittelfeld, Leoben, Linz, Wels kaj Wien. La 26an de Julio 1958 estis starigita Zamenhof-monumento en Wien. Iniciatinto estis la direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo, kortega konsilisto Hugo Steiner. Same en 1958 aperis ilustrita gvidlibro "Per la fervojo tra Aŭstrio". La 11a IFEF-kongreso okazis 1959 en Linz kun postkongreso en Wien.

La 10an de Aprilo 1960 fondiĝis memstara organizo Aŭstria Federacio Esperantista Fervojistista kun prezidanto ing. E. Eichinger. La statutojn atestis la Ministerio por Internaj aferoj. La memstara federacio prezentis sin al la publiko per solena vespero kun kultura programo. Parolis la ĝenerala direktoro de ÖBB, d-ro Maximilian Schantl.

Baldaŭ fondiĝis ĉefsekcioj en Knittelfeld, Linz kaj Wien, en Salzburg oni fondis sekcion. En la jaro 1960 transprenis la redakcion de la Bulteno k-joj ing. Eichinger kaj Huber. En Junio 1961 okazis Internacia Esperanto-Feriosemajno en la kadro de la Jubileaj Festsemajnoj Wien.

La Aŭstria Fervojoj (ÖBB) laŭ iniciato de AFEF lanĉis en la Eŭropa Horarkonferenco (Sofia, Septembro 1963) diskutproponon, ke la fervojoj aperigu la "Ĝeneralajn Rimarkojn" de la horarlibroj ankaŭ en Esperanto. La decido estis bedaŭrinde nek rekomendo nek la malo.

Post longjaraj klopodoj de la senlaca k-go J. Geroldinger estis starigita moderna Esperanto-monumento en Linz la 10an de Julio 1965. En 1968 la 16an de Decembro la urbestro de Linz inaŭguris en la Zamenhof-strato memortabulon pri

*Johann Bürger 2.60(f)*

d-ro Zamenhof. Geroldinger ankaŭ kuniciatis la Internaciajn Fervojistajn Esperanto-Skisemajnojn (la unuan en 1963), el kiuj li organizis 12. Flanke de la Respubliko Aŭstrio li estis distingita en 1966 per la "Arĝenta Meritinsigno" pro sia poresperanta laboro.

La 22an de Marto 1968 estis malfermita migra ekspozicio en la suda stacidomo de Wien. Poste la ekspozicio varbis en aliaj urboj. La aŭstria televido raportis pri ĝi. En 1967 inĝ. Walter Huber fariĝis prezidanto de la asocio kaj ekde Oktobro 1968 k-go Vavra transprenis la redakcion de la Bulteno.

En la 55a Universala Kongreso de Esperanto en Wien, kiun malfermis la aŭstria ŝtata prezidanto s-ano Franz Jonas, AFEF organizis fakprelegon "La aŭtomata kuplilo". Ĉiuj lokaj gazetoj raportis pri la 27a IFEF-kongreso en Villach 1975. Impona postkongreso sekvis en Salzburg. Post longaj diskutadoj en la jarkunveno la 21 an de Oktobro 1978 oni balotis pri novaj statutoj de la federacio. La titolo de AFEF ekde tiam estas Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio.

### **Belga Esperanto Fervojista Asocio (BEFA)**

Unua mencio de 2 belgaj anoj en la internacia fervojista movado konstateblas en 1929, unu el ili la landa reprezentanto Gustaaf Beirens.

En 1951 BEFA ekĝermis pro vizito da finnaj kolegoj en Bruselo. El tio evoluis kursoj, kaj la 4an de Septembro 1952 okazis la fondkunveno en la suda stacio de Bruselo. 29 membroj aliĝis al IFEF. La membronombro tra la jaroj moviĝis inter 23 kaj 50.

Jam la 22an de Decembro 1952 la nova asocio partoprenis en prepara kunveno por pli posta starigo de belga FISAIC-sekcio, en kiu BEFA-anoj konsiderinde kunlaboris ĝis la nuntempo. En 1954 skribaj Esperantokursoj estis samrajtigataj kun aliaj porfervojistaj kursoj, ekde 1956 tio ankaŭ por buŝaj kursoj validas.

BEFA okaze de la granda mondekspozicio helpis al multaj fervojistaj vizitantoj (1958). En 1960 ĝi aktive kunlaboris en la 45a UK (Bruselo), same 1961 en la 34a SAT-kongreso (Gent), kie oficiale deĵoris 6 fervojistoj en la fervoja akceptejo. Fine de la kvindekaj jaroj kreiĝis migra ekspozicio. 1964 BEFA organizis la 16an IFEF-kongreson en Bruselo. Grandan parton de la ĉi-supre menciita konstrua laboro faris k-go Leo De Bruyne.

Post tiu kongreso BEFA estis trafita de grava krizo. Restis sole dekduo da membroj. Nur en 1967 eblis starigi novan estraron sub prezidanto C. Meeus. En 1971 Meeus devis retiriĝi pro malbona sanstato. Elektiĝis nun Lucien de Sutter kiel prezidanto. Kelkajn jarojn poste li fariĝis prezidanto de unu el la kvar belgaj teknikaj komisionoj de FISAIC. La IFEF-komitato elektis L. de Sutter en 1977 ĉefkomitatano.

Ekde 1966 BEFA regule aranĝas jarkunvenojn, de post 1975 kune kun FERN. Speciala festo okazis pro la 25a jubileo 1977 en kastelo Zellaar.

Ekde 1976 BEFA kunlaboris ankaŭ en la TK.

*Lucien de Sutter. 2.61(f)*

## **Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (BAEF)**

En la internacia organo "Fervoja Esperantisto" jam en la jaroj 1910 ĝis 1914 aperis fakaj artikoloj verkitaj de britaj fervojistoj, kaj "FE" raportis en 1910 pri ilustrita prospekto de la "North Eastern Railway", en 1914 "FE" eĉ varbis por la haveno Hull.

En 1929 ni konstatis 5 britajn anojn de IAEF, inter ili la asesoro H.J. Bustin. Versajne ĝis la milito kaj ankaŭ poste agadis kelkaj fervojistoj. En 1951 26 membroj estis enskribitaj ĉe IFEF. Precipe helpe de la forta kaj vigla grupo de Glasgow la nombro atingis 60 en 1963 kaj poste moviĝas je mezgrade 30. Ni menciis du kolegojn, kiuj dum la jaroj ludis rolon en BAEF, nome Clifford Parry, kiu skribis multajn artikolojn ĉefe en la sindikataj organoj kaj dum la kvindekaj jaroj kiel prezidanto-sekretario-kasisto gvidis la asocion kaj ankaŭ reprezentis ĝin en kongresoj.

La dua estis Horace Barks, kiu invitis la 15an kongreson kun helpo de k-joj T. Scott kaj P. Harvey al sia hejmurbo Stoke-on-Trent, kaj spite al sia aĝo 14 jarojn poste denove kaj preskaŭ sola organizis la 29an en Swanwick. Per tiu sindonemo li savis tiun kongreson, ĉar ne niu lando povis aŭ volis inviti. En Stoke li ludis grandan rolon en la komunumo, eĉ dumtempe estis urbestro. Tie li atingis gravajn rezultojn por la Esperanto-movado, i.a. la nomigon de du stratoj laŭ Esperanto resp. Zamenhof kaj de gastejo kun nomo "Verda Stelo". Loka biblioteko portas lian nomon, kaj li ricevis altan ŝtatan distingajon.

BAEF de tempo al tempo ankaŭ kunlaboris en la brita sekcio de FISAIC. Tiu ĉi estis reprezentita en la 29a IFEF-kongreso.

## **Fervojista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio**

Konata kiel plej frua fervojista esperantisto en Bulgario estis D. Kolev, lerninta la lingvon 1901 en la tiama roto militista. Li kaj kelkaj kolegoj disvastigis la lingvon en pluraj stacioj. En 1922 Kolev kaj k-go S. Vasiliev eĉ estis nomumitaj de la ministerio instruistoj por la lingvo. En la internaciaj organoj aperis en 1911 la nomo Z. Manolov kaj en 1929 kiel bulgara asesoro (delegito) I. Nikolov. Kelkaj kolegoj tiam estis politike persekutataj pro siaj progresemaj ideoj.

En la jaroj 1927-1936 elstaris i.a. S. Pizarov, kiu gvidis novan aktivan grupon en Varna. Li redaktis specialan kolumnon en la oficiala organo de la fervojista unuiĝo en Sofia kaj en la sama organo publikigis lecionojn el malgranda lernolibro de li mem verkita. En 1931 Pizarov partoprenis la fervojistan fakkunvenon en la 23a Universala Kongreso en Kraków (PL).

En la jaro 1947 fondiĝis en Sofia fervojista societo "Prospero". Estis nun pli favoraj kondiĉoj por la movada agado flanke de la Ŝtata Fervojo kaj la transportlaborista sindikato. Precipe ekde 1950, kiam Georgi Dolapĉiev, altranga fervojisto en la ministerio, estis elektita prezidanto de "Prospero", li kun deko da aliaj kolegoj sukcesis pligrandigi la societon ĝis 200 membroj. Tiam ankaŭ fondiĝis la "Fervojista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio". La unuan fojon bulgaraj fervojistoj reprezentis sian societon en la 9a IFEF-kongreso 1957 (Rijeka).

En 1956 G. Dolapĉiev fariĝis prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, kio efike kontribuis al plia prospero de la fervojista sekcio. En la provinco funkciis 24 fervojistaj lokaj grupoj. En 1958 sekvis aliĝo

*Horace Barks. 2.62(f)*

al IFEF, komence kun 50, poste eĉ kun 300 membroj.

Dum la 48a Universala Kongreso 1963 en Sofia okazis IFEF-fakkunveno sub aŭspicio de la vicministro de transporto kun prelego pri la socialaj atingaĵoj de la fervojistoj.

En 1964 G. Dolapĉiev fariĝis prezidanto de la bulgara IFEF-sekcio, kio ebligis al li dum jaroj partopreni kiel bulgara delegito en IFEF-kongresoj kaj zorgi pri bonaj interrilatoj ĉiufranken. Li ricevis en 1959 ŝtatan ordenon de Kiril k. Metodi de la grado.

Kulmino fariĝis la 20a IFEF-kongreso 1968 en Ora Sablo apud Varna kun 815 partoprenintoj el 22 landoj.

Ekde 1977 pro valutaj kaŭzoj la bulgara sekcio provizore devis stari ekstere de la internacia movado, sen ke la interrilatoj ĉesis. Tamen en 1979 la situacio pliboniĝis tiel, ke sub nova prezidanto Marin Marinov ekde Septembro 1979 denove ekzistas bulgara landa asocio de IFEF, komence kun 20, en 1982 jam kun 60 IFEF-membroj. Post bonrezultaj preparoj kun la bulgaraj instancoj eblis en 1983 aliĝi kiel landa sekcio al FISAIC. Tiamaniere oni povis organizi la 36an IFEF-Kongreson (1984) en Slanĉev-Brjag apud Burgas sub aŭspicioj de FISAIC.

### **Fervojista Sekcio de Ĉeĥa EsperantoAsocio (FSCEA)**

Evidente la kolegoj en la nuna ŝtata tereno de Ĉeĥoslovakio dekomence vigle agadis en la faka Esperanto-movado. "Fervoja Esperantisto" jam en 1911 anoncas 29 membrojn de IAEF en Bohemio kaj Moravio, inter ili Josef Blažek. Sed. laŭ aliaj fontoj jam pli frue unuopuloj aktivis, precipe en Olomouc.

Post la unua mondmilito ĉefe estis J. Blažek, J. Řebiček kaj la grupo en Olomouc, kiuj ekde 1920 revigliĝis la kolegojn en la nun memstara Ĉeĥoslovakio kaj samtempe grave influis la restarigon de la movado sur internacia nivelo. De post la Universala Kongreso Praha 1921 tri ĉeĥaj kolegoj eniris la internacian estraron ĝis 1924. Tiam ankaŭ fondiĝis en la "urbo de fervojistoj", Česká Třebová, tutŝtata fervojista Esperanto-movado. ĉi-loke necesas mencii la nomon de Josef Řebiček, kiu jam tiam ja laboris ne sur oficiala scenejo, sed des pli laboregis sur faka kaj nefaka terenoj, ĉefe kiel tradukisto, i.a. de internaciaj fervojaj reglamentoj.

Post 1924 J. Blažek i.a. kunlaboris en la fondo de "Verda Stacio" ĉe Radio Brno kaj klopodis ĉe pluraj fervojoj establi informilojn esperantlingvajn en trafikiloj. En 1932 ekz. en tiama Ĉeĥoslovakio ekzistis ĉ. 80 stacidomaj tabuloj. De 1929 ĝis 1938 regule aperis "Esperanta anguleto", redaktita de O. Charvát, en la oficiala porfervojista revuo, eldonita de la direkcio Bratislava. En la jaroj 1935-1938 kaj 1947-1950 kvar direktoj de ČSD rekomendis partopreni Esperanto-kursojn.

En la tempo post la dua mondmilito ankoraŭ ekzistis en Ĉeĥoslovakio unuopaj fervojistaj esperantistoj, kiuj kolektiĝis en rondetoj de kulturdomoj de la ŝtataj Fervojoj ČSD. Jam en 1951 la "Bulteno" de IFEF anoncis 11, en 1953 19 izolajn membrojn el Ĉeĥoslovakio. Evidente oni observis la evoluon en IFEF, ĉar en aŭtuno 1964 letero de Bohumil Král atingis la IFEF-estraron kun la sciigo, ke ĉe la sindikata komitato de la trafikministerio en Praha li starigis Esperanto-rondeton kun 35 membroj. Samtempe tiam ekzistis viglaj Esperanto-rondetoj de fervojistoj precipe en Česká Třebová, Děčín kaj Havlíčkov Brod. Je novjaro 1965 venis nova sciigo, laŭ kiu okazis kursoj kaj jam ekzistis 200 membroj en la lando. Sekve en printempo kaj dank' al subteno flanke de la trafikministerio fondiĝis fervojista fakgrupo kun 260 membroj sub gvidado de Král. En la 17a IFEF-kongreso en Hamar la 26an de Majo 1965 IFEF

*Georgi Dolapĉiev. 2.63(f)*



akceptis la novan ĉeĥoslovakian landan asocion kun unue 60 membroj. La membronombro en Ĉeĥoslovakio mem atingis fine de 1965 483. La 17an de Aprilo 1966 okazis la unua jarkunveno en Česká Třebová. Ankaŭ inĝ. Jaromir Řebíček, filo de Josef Řebíček, fake kunlaboris.

La nombro de la membroj aliĝintaj al IFEF kreskis al 100 en 1970, sed post 1972 reduktiĝis denove al 60. Dum kelkaj jaroj ĉeĥoslovakaj kolegoj estis bonvenaj gastoj en IFEF-kongresoj. En pluraj lokoj estis kaj estas vigla vivo. Esperanto-rondeto de fervojistoj en Česká Třebová eldonis turisman broŝuron pri Česká Třebová, organizis karavanojn al IFEF-kongresoj kaj ekde 1970 ĝis nun aranĝas regule ŝatatajn Esperanto-balojn. La unuan fojon en 1979 aperis Esperanto-klarigoj en la fervoja horaro. 1970 okazis la IFEF-skisemajno en Slovakio.

En la jaro 1969 estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), al kiu multaj fervojistoj aliĝis kiel Fervojista Sekcio de ĈEA. Aligis precipe kolegoj el Bohemio kaj Moravio, unuopuloj ankaŭ el Slovakio. Propra komunikilo ne ekzistas. Eventualaj informoj aperas en la organo "Starto" de ĈEA.

En la jaroj 1980-81 okazis internaj komplikajoj. Provizore formiĝis dua fervojista organizo, kiu tamen en Januaro 1982 sin mem likvidis. De post tiam nur ekzistas FSĈEA sub prezidanto Jaroslav Kašparec. Aparta celo estas fondi paralelan fervojistan sekcion ĉe Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialista Respubliko, por fine povi membri la kolegojn el la tuta ŝtato al IFEF.

#### Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)

Jam en la fondkunveno de la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF) en Septembro 1909 en Barcelona ĉeestis dana kolego. Kaj "Fervoja Esperantisto" de Junio 1911 prezentas adresojn de 8 danoj. En la jaro 1929 la tiama internacia revuo menciis danan asoron (delegiton) M. Palsberg. Minimume en Aarhus funkciis klubo de 1932 ĝis 1938.

En 1947 dum la unua postmilita SAT-Kongreso en Aarhus la k-joj Thorstedt (DK), Lok (NL) kaj Zink (A) traktis la eblecojn, fondi internacian fervojistan Esperanto-organizon, kio fakte okazis en Aŭgusto 1948 en Amsterdam. Konsiderinde kontribuis N.C. Thorsted kaj J. Christoffersen. Ili ankaŭ iniciatis la fondigon de DEFA la 20an de Marto 1948. DEFA dekomence estis tutlanda organizo, en kiu aŭtomate ĉiu ano estis ankaŭ IFEF-membro.

En Majo 1948 DEFA kreis al si propran insignon, kaj en Julio 1948 aperis la unua modesta Bulteno, poste stencilila. La kurago de la du aktivuloj Christoffersen kaj Thorsted ebligis al DEFA, inviti la unuan IFEF-kongreson, kiu okazis en Majo 1949 en Aarhus.

Ni jen menciuj trian nomon, I. Kensing, kiu apartenis al LKK 1949 kaj denove estis LKK-prezidanto de la 10a kaj 25a kongresoj, krome estis DEFA-prezidanto dum 10 jaroj kaj fariĝis Honora Membro de DEFA. Kion li krome faris dum multaj

*Jaromir Řebíček. 2.64(f)*

*N.C. Thorsted. 2.64(f)*

jaroj, senbrue, estas tro multe por esti priskribata.

La membronombro kreskis konstante de 66 en 1950 al 102 en 1960, poste iom malaltiĝis kaj nun restis konstanta inter 70 kaj 80. Ekde 1953 DEFA disponas pri migra ekspozicio, en 1954 kreis propran libroservon kaj en 1964 propran bibliotekon. Ankaŭ Koresponda Servo ekzistis dum 20 jaroj.

En 1957 DEFA membris ĉe DJIF, landa sekcio de FISAIC, kaj daŭre ludis gravan rolon en tiu organizo. Ekde komenco ĝi helpis en ties internaciaj rilatoj, dumtempe liveris sekretarion kaj ekde 1979 eĉ la prezidanton en la persono de H. Hauge. Ĉiam la interrilatoj estis bonegaj, la ekonomia kaj morala subtenoj flanke de DJIF tre valoraj. Kaj la dana ŝtata fervojo DSB kaj lokaj turistagentejoj eldonis multajn broŝurojn laŭ iniciato de DEFA. En 1961 aperis la Esperanto-klarigoj en la horaro kaj restis ĝis nun en ĝi. DSB ankaŭ konsiderinde helpis, kiam DEFA-anoj okaze de kelkaj Universalaj resp. SAT-kongresoj rajtis deĵori en la kongresejoj kaj trajnoj. En tiuj kongresoj DEFA ankaŭ aranĝis fakkunvenojn kun valoraj prelegoj kaj parte fakaj vizitoj.

Dum preskaŭ 30 jaroj Aarhus estis la ĉefa agadnodo de DEFA. Sed en la lastaj jaroj ankaŭ la grupo en Kopenhavn ludas tre aktivan rolon. La kunlaborado kun la cetera Esperantomovado en Danio precipe sur loka nivelo ĉiam estis fruktodona.

Ankaŭ en la terminara laboro DEFA dekomence partoprenis. Jam en 1951 oni starigis respektivan komisionon, kaj post kelkjara stagnado DEFA nun denove partoprenas en la laboro de la Terminara Komisiono de IFEF.

Entute la aktiveco de DEFA, kvankam inter la malgrandaj landaj asocioj de IFEF, daŭre estis inspira kaj rezultohava. En 1974 la dana asocio la unuan fojon disponigis estraron por IFEF (kasisto Hauge), en 1980 sekvis dua (sekretario Olsen, ekde 1982 redaktoro).

## **Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj (ESFF)**

Antaŭmilita periodo: El la internacia organo "Fervoja Esperantisto" videblas, ke jam en la jaro 1911 finnaj membroj ekzistis (2 adresoj). Sendube tre baldaŭ post la unua mondmilito finnaj fervojistoj estis aktivaj, ĉar ekde somero 1921 aperis en la tiama finna horaro "Turisti" la signoklarigoj ankaŭ en Esperanto. Kaj tio daŭris seninterrompe ĝis 1950.

Sed la societa agado en Finnlando ĉefe komenciĝis lige al la 14a Universala Kongreso en Helsinko 1922. Post ĝi la staciestro Hugo William Salokannel, esperantisto ekde 1904, interesis kolegojn fariĝi membroj de la nova societo. Lia persona aktiveco estis agnoskita ankaŭ sur internacia nivelo (i.a. ora meritinsigno pro 30jara poversperanta agado).

Postmilita periodo: Nova etapo komenciĝis en 1949, kiam la fervojista sindikato iniciatis Esperanto-kurson, tiel ke en 1950 povis fondiĝi la nuna ESFF. La 1an de Januaro 1951 la Societo oficiale aliĝis al IFEF, la 28an de Aprilo 1958 al la finna societo de FISAIC.

Ĉefa aktivulo de ESFF ĝis 1960 estis ĝia sekretario Antti Ruhanainen. La reprezentadon en la IFEF-komitato prizorgis ekde komenco (1965) la societa prezidanto, ĉefinspektoro Nils G. Narvala. IFEF-kongresojn la Societo aranĝis dufoje: 1960 en Helsinko (12a) kaj 1979 en Turku (31a), ambaŭ kun valoraj fakprelegoj. Al la prestiĝo de la lastnoma kongreso kontribuis la samtempa kaj parte en kunlaboro organizita estrarkunveno de FISAIC.

*Mag. N.G. Narvala. 2.65(f)*

La interna societa vivo ĝenerale koncentrigis en la studrondo en Helsinko, kvankam lastatempe ĝi ne regule funkciis. Inter la jaroj 1962 kaj 1967 la Societo aperigis propran Bultenon, entute 10 numerojn. Menciinda estas krome la 4paĝa faldfolio (1969), kies duonan parton formis finna-esperanta listo de plej gravaj fervojaj terminoj. Raportoj kaj artikoletoj de tempo al tempo estas liveritaj al fervojaj gazetoj.

Al "Esperanto-Asocio de Finnlando" la Societo aliĝis en 1965 kiel kolektiva membro. Mag. Narvala elektiĝis vicprezidanto de EAF en la jaroj ĝis 1969 kaj funkciis kiel prezidanto de LKK por la 54a Universala Kongreso en Helsinko 1969. En ties fervojista kunveno li fakprelegis pri la temo "Evoluo kaj nuna stato de internacia persontrafiko ĉe Finnaj Ŝtatejoj".

Ne estu forgesataj la rimarkindaj klopodoj de unuopaj membroj en ekstere sociataj medioj. Ekz. Matti Voltti, direktoro de Fervojo Instituto (= faka lernejo) kaj dum multaj jaroj prezidanto de la Abstinencia Asocio de Finnaj Fervojistoj, longtempe vivtenis en tiu Asocio la intereson pri Esperanto.

### **Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FFEA)**

Jam 1905 kaj 1909 en la kadro de la 1a kaj 5a Universalaj Kongresoj la franca k-go Armand Berlande organizis apartajn kunvenojn por fervojistoj. En 1910 kaj 1911 li estis prezidanto de la tiam Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj. En ties adresaro por 1911 troveblas la adresoj de 57 francaj kolegoj. Samjare la fervoja kompanio "Paris Orléans" eldonis gvidlibron en Esperanto.

El "La Fervojisto" konstateblas, ke kaj en 1925 kaj en 1929 ekzistis en Francio asosoroj (delegitoj), nome s-roj Leutz resp. Kannacher. Membroj evidente nur malmultaj estis. En 1937 s-ro R. Dautry, tiam Generala Direktoro de la ŝtataj fervojoj, instigis la aranĝon de Esperanto-kursoj. Bedaŭrinde la dua mondmilito mortigis la aferon.

Oni devis atendi ĝis 1945 por vidi novan aktivecon en la fervojista movado, de kiam Pierre Poly sukcesis arigi grupeton da esperantistaj kolegoj. Ili projektis la starigon de Asocio. La unua statuto antaŭvidis la aliĝon de la Fervojista Asocio kiel "faka grupo" al la nacia movado. Ne akceptita de la plimulto, tiu statuto estis en 1948 modifita favore al memstareco kaj neŭtraleco de la Fervojista Asocio.

La nova statuto estas leĝe registrita la 26an de Decembro 1949. Tiu dato signas la ekiron de FFEA. Ĉiujare okazis (-as) ĝenerala kunveno, al kiu regule estas invititaj reprezentantoj de IFEF kaj eksterlandaj kolegoj. Dum printempo alia kunveno ebligas liberajn diskutojn pri aktualaj problemoj.

De 1945 ĝis 1949 la membraro rapide kreskis de 30 ĝis 300 anoj. Dum la sekvintaj jaroj ĝi superis 350 membrojn, sed poste stagnis iom da tempo. De post 1972 ĝi denove kreskas kaj en 1981 nombriks 529 anojn.

Ekde 1945 funkcias kursoj en Paris kaj en multaj provincaj urboj kaj fervojaj centroj. Ĝenerale bone vizitataj, tiuj kursoj estas unuagrada kaj duagrada, parolaj aŭ perkorespondaj; la perkoresponda kurso, reorganizita en 1971-72, fariĝis triŝtupa. Ekzamenoj okazas ĝenerale fine de la kursoj.

Ekde komenco la Asocio propagandas per flugfolioj, afiŝetoj, regulaj anoncoj, artikoloj en la fakaj gazetoj "La Vie du Rail" kaj "Arts Cheminots" (ĉi-lastaj bedaŭrinde malaperinta en 1965). Ekde 1973 post reorganizo de SNCF artikoloj aperas en la bultenoj de la regionoj. Plie, laŭ la cirkonstancoj, FFEA aperigas artikolojn en la revuoj de fakaj asocioj (turismaj aŭ bonfaraj). Pere de ekspozicioj, pli malpli imponaj, FFEA klopodis kaj klopodas konatigi sian agadon. La unua okazis en 1948 kunlabore kun la filatelistaj fervojistoj. Dum la sekvintaj jaroj FFEA ofte ricevis angulon en UAICF-ekspozicioj: en Lyon ĝi prezentis belan kolekton de infandeseĝnaĵoj. Nuntempe ĝi posedas panelojn (1,40x0,70). kiuj ebligas transportadon kaj rapidan instalon.

En Januaro 1947 aperis la unua numero de la monata bulteno "La Fervojisto"; plurfoje modernigita, ĝi regule aperas kaj atingis fine de 1982 sian 400an numeron. Tre satata de la membroj, ĝi bone spegulas la vivon de la Asocio. Ĝia nuna nomo estas "Esperanto-Fervojisto".

En 1947 FFEA aliĝis al la Unio Arta kaj Intelekta de la Francaj Fervojistoj (UAICF), peranto inter SNCF kaj la kulturaj asocioj. La rilatoj kun UAICF estis ĉiam bonaj, la kunlaborado speciale aktiva dum la preparaj traktadoj rilate la starigon de FISAIC; plurfoje FFEA kontribuis al la aliĝo de eksterlandaj asocioj al FISAIC. F-ino Germaine Lemonnier, prezidantino de FFEA, partoprenis en la fondiĝo de FISAIC en Strasbourg en 1952. Rerezentantoj de FFEA ankaŭ ĉeestis ties 25an jubileon en la urbodomo de Paris la 22an de Septembro 1977. 1954 en la IFEF-kongreso Verona FFEA proponis daŭran kunlaboradon inter IFEF kaj FISAIC. Postaj prezidantoj estis Guy Delaquaize (1963-70), Pierre Robiolle (1970-79), Gérard Gilbert (1979-81), Georges Mazaud (1981-83) kaj Gérhard Horn.

FFEA troviĝis ekde 1947 inter la kunfondintoj de IFEF, kies fondiĝon ĝia reprezentanto ĉeestis en Aŭgusto 1948. Konstante ĝi havis delegitojn ĉe ĉiuj IFEF-kongresoj. ĝi organizis la 3an kongreson en Paris kaj la 21an en Avignon, krome aranĝis tri skisemajnojn. Ekde 1950 FFEA aktive kunlaboras en la Terminara Komisiono. La unua, ĝi prezentis terminaron en la 7a kongreso (Zürich). En 1978 ĝi eldonis fervojan terminaron entenantan 4500 terminojn. Verkis ĝin André Blondeaux kaj ties kunlaborantoj. Plie FFEA respondecas pri la Internacia Koresponda Servo.

Dum la 5a IFEF-kongreso en Nederlando FFEA proponis, ke fakprelegoj ricevu lokon en la kongres-programoj. En 1978 FFEA starigis novan grupon arigante fervojistajn radio-amatorojn. Tiu grupo aliĝis al FISAIC pere de la franca sekcio de la internacia Federacio FIRAC.

Multaj aliaj faktoj estus menciindaj. Pro manko de loko ni nur notu: la aktivan partoprenon de FFEA en la fondiĝo kaj en la vivo de la Kultura Esperantista Domo (Kastelo de Gresillon), en kiu ĝi fariĝis akciulo en 1951. En 1957 FFEA ĉeestis kiel reprezentanto de UAICF la unuan internacian konferencon de la Popularaj Universitatoj ĉe UNESKO. Menciinda estas ankaŭ la partopreno de FFEA en la peticio al UNO en 1947-48 per 70.000 subskriboj, la partopreno en 1947-50 de FFEA-anoj en la esperantaj radio-elsendoj de la Franca Radio kaj la klopodoj ĉe parlamentanoj pri leĝproponoj, celantaj la instruadon de Esperanto en lernejoj kaj universitatoj.

*Germaine Lemonnier. 2.67(f)*

*Pierre Poly, Honora Membro, kunfondis IFEF. 2.67(f)*

*André Blondeaux. 2.67(f)*

## German Esperanta Fervoĵista Asocio (GEFA)

La disponebla materialo estas tiom abunda, ke ni preferas telegramstilan prezentadon:

- 1907 Unuaj germanaj fervoĵistoj esperantistaj konstateblaj.
- 1908 Jam diverslokaj kursoj, ekz. Oldenburg, Nordhausen.
- 1910 Grupoj en ekz. Kattowitz, Leipzig, Dresden - 2.10. fondiĝo de "Germana Esperanta Fervoĵista Asocio" en Elberfeld, prez. O. Giade - en "Fervoĵa Esperantisto" listo kun 20 IAEF-membroj, inter ili A. Petzold kaj J. Engst (en 1911 sekr. resp. kasisto de IAEF).
- 1911 Esperantolingvaj afiŝoj en la stacidomo de Dresden. Propra germana organo "Fervoĵa Esperantisto".
- 1920 Post la milito nova aktiveco sub prez. Georg Habellok.
- 1921 Propra organo "Mitteilungen" kun La. rubriko "Fervoĵa Terminaro".
- 1922 Unua postmilita jarkunveno en Breslau.
- 1923 Spite al terura inflacio membrokresko de 39 al 108 - regularo starigita - G. Habellok eldonas terminareton G-E kun 1300 terminoj - membrotokizo eblas al literafranko (Julio = 300, Sept. = 75000 GM).
- 1925 Oficiala enketo de fervoĵaj direktoj: 1800 kandidatoj por Esperanto-kursoj - la direkcio Dresden eldonas gvidlibreton (Sprachführer) kun utilaj demandoj kaj respondoj en 21 lingvoj, inter ili Esperanto.
- 1930 95 membroj - Internacia Fervoĵista Kongreso en Hirschberg (Riesengebirge) kun 40 partoprenantoj.
- 1934 Lastaj komunikoj antaŭ likvido far de la nacisocialisma regimo.
- 1936 Lastaj registaraj ordonoj, per kiuj oni likvidis la Esperanto-movadon en Germanio.
- 1947 Kursoj en 10 fervoĵaj faklernejoj (iniciatanto Karl Hell).
- 1948 Refondiĝo de GEFA 16.5. sub prez. Ernst Schuchmann.
- 1949 Aliĝo al Sociala Organizo Fervoĵa (BSW) en Aŭgusto sub Heinrich Pape - tre pozitiva sintenado eĉ de plej altaj instancoj.
- 1950 Januaro aliĝo al IFEF kun 60 membroj - 16 germanoj en la 2a IFEF-kongreso - 31 kursoj - la fervoĵo eldonas sian unuan prospekton "Ferioj en Germanio" en Esperanto.
- 1952 GEFA organizas la 4an IFEF-kongreson en Lindau, LKK-prez. H. Pape - ekde Oktobro propra organo "Bulteno", formato A5, aperas 6 foje jare
- 1953 290 membroj - horarŝlosilo en la tutgermana horaro - aŭtomate kun BSW aliĝo al FISAIC - novaj prezidantoj Adolf Simon, poste F. Hasse.
- 1954 Nova fervoĵa prospekto "Vizitu Germanion".
- 1955 Dua eldono de tiu prospekto ŝlosilo nun ankaŭ en la horaro por longdistancaj trajnoj - permeso de DB porti la Esperanto-insignon sur la uniformo.
- 1956 Nun ankaŭ "klarigoj por pasaĝeroj" en la horaro kaj 3a eldono de la prospekto "Vizitu Germanion" Gernot Ritterspach ekgvidas la Terminaran Komisionon de IFEF.
- 1957 Post preskaŭ trijara periodo sen efika estrara gvidado nova estraro sub prezidanto Joachim Giessner ĉiu GEFA-ano aŭtomate IFEF-ano (489) - kvina prospekto "La Manaĝera Malsano" - fervoĵista laborkomunumo "Esperanto-Filmo-Germanujo (EFG)" en Braunschweig (k-joj Petelkau k Giessner) ekproduktas amatorajn filmojn kaj diskojn en Esperanto - 1a GEFA-jarkunveno en Fulda.
- 1958 Du novaj prospektoj de DB: "Salto tra jarcentoj" kaj "Sei weise - reise" (via saĝo - vojaĝo) - 1a disko de EFG, kiu krome filmas en UK Mainz - GEFA en UK Mainz, 6 kolegoj oficiale deĵoras 8 tagojn, faka vizito de la centra regadejo en Frankfurt, fakprelego - oficialaj bendoj kun vorto "Esperanto" por la manikoj de uniformjako, 25000 informiloj distribuitaj.
- 1959 Tutpaĝa reklamo de DB en UEA-jarlibro - 8a prospekto de DB "Bela kaj komforta" - germanlingvaj glumarkoj "Esperanto - via dua lingvo" - 2 kolegoj deĵoras en la 32a SAT-kongreso (Dortmund) - migra ekspozicio starigita.
- 1960 650 membroj - ĝis nun 4 filmoj de EFG, nome: "Esperantujo en Bildo kaj Sono" (1956), "Vojaĝo al Marseille" (1957), "De Braunschweig al Harz" (1958) kaj "Impresoj el la Universala Kongreso en Mainz" (1958-59), krome 3 diskoj kun popularaj kantoj, modkantoj kaj arĵoj

- el operetoj. La ĥoro de "EFG" kantis en la UK Bruselo, tiuj kantoj poste aperis sur disko-kolektaĵo de 72 kolordiapozitivaj kun duonhora teksto sur bendo kiel informilo kaj propagandilo - la Dokumenta Servo de DB ekde nun transprenas esperanilingvajn fakprelegojn k.s. - lingvaj ekzamenoj en la jarkunvenoj.
- 1961 Regulaj raportoj en la organo de BSW. "Das Sozialblatt" pri nia laboro - nova varbafiŝo sen nacia teksto - pli kaj pli da eksterlandaj gastoj en la jarkunvenoj dokumenta Bulteno pri GEFA-historio.
- 1962 La naŭa DB-prospekto "Tra Germanio per la Federacia Fervojo" - nova GEFA-ekzamenkomisiono, kiu konsistis el fervojistoj kaj rajtis (-as) ekzameni tutlande laŭ direktivoj de la Germana Esperanto-Instituto - arkivo starigita.
- 1963 Al IFEF anocitaj 628 membroj - nova centra biblioteko - en la 7a jarkunveno 40 eksterlandaj gastoj.
- 1964 Unuaj kontaktoj kun la ferv. radioamatoroj (Giessner prelegas en la Eŭropa Kongreso de FIRAC) - germanlinva kvarpaĝa informilo "Esperanto - la lingvo, kiun vi serĉas" (10000).
- 1965 Tre sukcesa partopreno en la subskrib-kolektado de UEA por UN-intensigita kunlaboro kun la tri gravaj sindikatoj (komune 581000 membroj - nun ankaŭ printempaj kunsidoj kun la distriktkomisiitoj GEFA membriĝas ĉe IEM Wien - laŭ germana iniciato la IFEF-kongresoj nun aperas en la aranĝkalendaro de FISAIC.
- 1966 Laŭ peto de la germana FISAIC-sekcio, GEFA utilis siajn internaciajn rilatojn kaj grave kontribuis al la starigo de FISAIC-sekcioj en GB, E kaj N - terminareto G-E-G (1000 ekz.), aŭtoro Gernot Ritterspach.
- 1967 19a IFEF-kongreso Fulda (LKK-prez. J. Giessner), la unua sub aŭspicioj de FISAIC kun 2 stratnomoj, futbalmaĉo, uniformprezentado, du fakprelegoj, traduko de la "Internacia Konvencio pri la Pasaĝer- kaj Frajtrafiko (CIV)" fare de Willi Barnickel.
- 1968 Post 15 jaroj DB forigis la horarŝlosilon kaj la klarigojn el la horaro - J. Giessner elektita IFEF-prezidanto, Elfriede Kruse sekretariino - Willi Brandenburg ekgvidas la Fakprelegan Komisionon kaj fariĝas GEFA-prezidanto - la tri grandaj sindikatoj korporativaj membroj de GEFA.
- 1969 850 membroj anoncitaj al IFEF - Bulteno aperas ankoraŭ 5 foje jare Barnickel gvidas la statut-komisionon de IFEF.
- 1970 GEFA liveras malneton por IFEF-afiŝo.
- 1971 Nova migra ekspozicio kompilita de Kurt Jentsch.
- 1972 13a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno en Spitzingsee - speciala informa Bulteno germanlingva - 16a jarkunveno komune kun Belgio kaj Francio en Clervaux (L) - Giessner denove GEFA-prezidanto - 1100 afisoj kaj 10000 informiloj distribuitaj.
- 1973 Speciala informa Bulteno germanlingva (20000) - 2 renkontiĝoj por emerituloj (ekde tiam ĉiujare).
- 1974 Denove germanlingva informa Bulteno (18000) - oficiala DB-giĉeto (6 deĵorantoj) en 59a UK Hamburg, granda publika: eĥo, "Fervojista Tago".
- 1975 Pro organizaj kaŭzoj 5 DB-direktoj likviditaj kun malagrablaj sekvoj por la kultura laboro, krome pli kaj pli ĝeneralaj kaj financaj premadoj flanke de DB (malfavora konjunkture), eblecoj por informado en fakaj revuoj reduktigis al nulo. 2 renkontiĝoj por emerituloj.
- 1976 GEFA eldonas libron "Konversacia Kurso", tradukita laŭ la angla de Dieter Hartig - 50000 Info-kartoj senditaj al ĉiuj DB-deĵorejoj (500 revenis).

*Willi Graß, GEFA-redaktoro de 1967, 2.69(f)*

- 1977 25 jarojn Bulteno - Hartig nun eldonas internacian ligilon "Terminara Kuriero" kaj kreas enkondukan kurson "Esperanto - viva lingvo" (ankaŭ laŭ la angla) - Ritterspach sekretario de TK kaj FK.
- 1978 Al IFEF anoncitaj 821 membroj - 19a IFES en Grainau.
- 1979 Post jaroj denove tutpaĝa anonco de DB en UEA-jarlibro - 4000 informiloj distribuitaj.
- 1980 GEFA 70 jara - dokumenta Bulteno - E. Kruse ekŝigas el IFEF-estraro.
- 1981 33a IFEF-kongreso en Regensburg (novaĵoj: nomigo de salonoj laŭ iamaj aktivuloj, sendstacio de la radio-amatoroj (FIRAC), literatura konkurso, informstando en la urbo, kantkasetoj kun tekstoj en la aŭtobusoj) - Kunlaboro kun la kultura organizo BSW, kun Germana Esperanto-Asocio, Germana Esperanto-Instituto, sindikatoj kaj laŭbezone fervojaj instancoj ĉiam bonaj sur ĉiuj niveloj. J. Giessner kaj E. Kruse ricevas la Meritkrucon de GEA.
- 1982 Jam de jaroj iompostioma regreso de la nombro de individuaj membroj spite al kontraŭaj klopodoj - 811 membroj anoncitaj al IFEF - Otto Rösemann elektigas IFEF-sekretario, J. Giessner denove IFEF-prez. - G. Ritterspach jam de 1977 estas sekretario de TK kaj FK.
- 1983 IFEF-skisemajno en Bayerisch-Eisenstein - kiel ĉiujare multaj publikigaĵoj pri nia laboro (konstatitaj 84) - 27a jarkunveno en Luneburg - nova telekurso kaj sonkasedo por komuna kantado en preparo.

### **Hispana Esperanto Fervoĵista Asocio (HEFA)**

Pri la tempo antaŭ la unua milito mankas informoj. Sed en 1927 ekzistis du hispanaj membroj de IAEF, inter ili la landa asesoro Emilio del Barrio, kiu en somero 1928 fondis la unuiĝon "Hispana Ligo de Esperantistaj Fervoĵistoj" kun laŭdire 70 aliĝintoj. Ĝia prezidanto estis Luis R. Escartin. Tiu ligo kreis regularon en Marto 1930 kaj ankaŭ propran organon, kies n-ro 48a (Dec. 1932) konserviĝas ĉe IFEF.

La fervoĵista Ligo daŭrigis sian aktivecon ĝis la komenco de la interna hispana milito (1936). Poste ĉiu poresperanta agado stagnis pro militaj kaj politikaj kaŭzoj dum preskaŭ 20 jaroj.

La organo de IFEF anoncis en 1952 du izolajn hispanajn membrojn. Sed la historio de la nuna HEFA komencigas en Julio 1954 kun la Hispana Esperanto-Kongreso en Zaragoza. La plej konata kaj aktiva tiama kolego, José Saladrigas; estis invitinta estraranojn de IFEF. Kaŭze de tiu vizito estis fondita Hispana Esperanto Fervoĵista Asocio. En la sama jaro HEFA aligis al IFEF kun 28 membroj. Jam kelkajn jarojn poste la membronombro kreskis ĝis iom pli ol 200 IFEF-anoj, dum enlande ekzistis 300. Baldaŭ Barcelona fariĝis la plej vigla grupo, kiu ekde 1958 fariĝis sidejo de HEFA kun la prezidantoj J. Saladrigas (ĝis 1967), poste Ramon Gimenez kaj ekde 1983 Rafael Ruiz. Dufoje HEFA transprenis la organizadon de IFEF-kongreso, nome la 13an en Barcelona kaj la 26an en Tarragona.

*José Saladrigas. 2.70(f)*

Precipe komplika estis la preparado de la 13a kongreso en 1961 pro la tiamaĵ politikaj cirkonstancoj. Tamen fine funkciis ĉio, nur la kolegoj el socialismaj landoj ne rajtis veni.

En la hispana FISAIC-sekcio la esperantistoj havas lokon, kvankam ili tie apenaŭ aktivas. Ankaŭ en la Terminara Komisiono HEFA aktive kunlaboras, ĉefe en la persono de Rafael Devis.

## **Fervojista Fako de Hungara Esperanto-Asocio**

### **1. Hungaroj inter la unuaj pioniroj**

En la jaro 1898 Lajos Jakab, fervoja ĉefkontrolisto en Szeged, aperigis artikolojn pri Esperanto en la tiama hungara gazeto "Vasuti lapok" = "Fervojaj folioj"), el kiuj la plej gravan prezentis "Hungara Fervojista Mondo" en 1980. Oni jam tiam aplikis similan devizon kiel estas la nuntempa de IFEF "LA RELOJ KUNLIGAS LANDOJN, ESPERANTO LA POPOLOJN".

En la internacia "Fervojista Esperantisto" jam en 1911 troviĝis hungara adreso. Esperanto-kursoj por fervojistoj estis organizitaj, ekz. en Debrecen, Fiume (nuntempa Rijeka) kaj Szeged.

### **2. Epoko 1914 ĝis 1945**

En la unua mondmilito la movado ankaŭ en Hungario disfalis, sed post la milito ĝi rapide revigliĝis. En Hungario (1918) startis la gazeto "Hungara Esperantisto". Inter la tre talentaj gvidpersonoj de la tiama internacia movado estis kolego Stevan Stojnić, kiu laboris ĉe la hungaraj fervojoj ĝis la fino de la unua mondmilito, sed poste translokiĝis al Jugoslavio.

En la dua volumo de Almanako (Wien 1925) tutpaĝa foto aperis pri la fervojista Esperanto-grupo Budapeŝt kaj ampleksa artikolo pri MÁV de T. Kovács (1879-1961). Dum la 21 a Universala Kongreso en Budapeŝt 1929 okazis "Kunveno faka de IAEF", gvidita de Emil Löbl. Lin cetera mencias la internacia organo "La Fervojisto" kiel hungaran asessoron (delegiton). En 1933 aperis "Enciklopedio de Esperanto", fonto de detalaj informoj i.a. ankaŭ pri fervojista agado.

Pro la dua mondmilito ankaŭ en Hungario sekvis tre dolorigaj jaroj rilate al Esperanto.

### **3. Epoko de 1945 ĝis 1956**

Post fino de la milito la esperantistoj, inter ili ankaŭ la fervojistoj, unue grupiĝis en la sudorienta regiono de Hungario. La unua hungara kongreso kun fervojista renkontiĝo okazis en Marto 1946 en la sudorienta urbeto Orosháza, kiun partoprenis la vicdirektoro de la Budapeŝta Fervojdirekcio, d-ro István Bácskai, flanke de la Fervoja Ĝeneraldirekcio.

Ĉe la Landa Sindikato de Fervojistoj kaj Ŝipistoj kelkmembra grupo komencis la reorganizan laboron. Okazis landaj renkontiĝoj en diversaj urboj de 1947 ĝis 1949. Dum la sekvaj jaroj en la ĉefurbo kaj provincaj fervojaj nodoj fondiĝis Esperanto-grupoj kun lingvokursoj. Plej aktive elstaris k-go Lajos Korsós.

Kiel unua internacia Esperanto-renkontiĝo okazis en 1948 la "Danubvala Esperanto-Konferenco", kiun partoprenis ankaŭ fervojistaj esperantistoj el A, BG, CS kat YU. La sindikato ebligis reeldonon de la tielnomata "Laborista lernolibro" en 500 ekzempleroj. Ĝi estis la unua Esperanto-lernolibro post la dua mondmilito.

Venis la jaroj 1950 ĝis 1956, dum kiuj malfunkciis la Esperanto-laboro.

### **4. Jardekoj de renaskiĝo kaj nova progreso de post 1956**

Sub la novaj sociaj cirkonstancoj dum relative mallonga tempo oni sukcesis rekonstrui la kontaktojn inter la esperantistoj. En 1956 ekfunkciis la fervojistaj grupoj, kaj kiam formiĝis Hungara Esperanto-Konsilantaro, ĝi jam grandparte baziĝis sian laboron sur la fervojistoj. Post la "sesjara silento" denove aperis esperantaĵoj: en la fervoja riparejo Miskolc: "Verda Vojo", en Budapeŝt eldoniĝis "Bulteno", kiun dum jaroj oni multobligis en fervoja presejo. En 1957 dum la 9a IFEF-kongreso en Rijeka restariĝis la kontakto inter la hungaraj fervojistoj kaj la estraro de IFEF. Tiam ankaŭ ekaperis ilustrita faka revuo "Hungara Fervojista Mondo", kies fondinto estis d-ro István Bácskai. La tiama redaktoro estis Simon



Csóra. HFM ekde 1962 regule aperas presita. En 1984 transprenis la respondecon dipl. inĝ. István Gulyás.

En 1959 la hungaraj fervojistoj aliĝis al IFEF kun 30 membroj, en 1961 jam kun 103. En 1961 320 komencantoj kaj 130 progresintaj fervojistoj studis la Internacian Lingvon.

Ekde 1961 kontinue ankaŭ en Esperanto aperas la klariga teksto de "Oficiala horarlibro de MÁV".

En 1962 en Budapeŝto okazis la 14a IFEF-kongreso sub LKK-prez. D-ro I. Bácskai. Ĝia ĉefprotektanto estis samideano István Kossa, la tiama ministro pri Trafiko kaj Poŝto. La impona rezulto (pli ol 1000 partoprenantoj estas ĝis nun nesuperita, eĉ neatingita. Kelkaj lokaj grupoj iniciatis nomigi straton, placon, parkon, eĉ fonton laŭ d-ro Zamenhof aŭ Esperanto, ekz. en Budapeŝto, Debrecen, Miskolc, Székesfehérvár. Memore al la fama kongreskoncerto 1962 troviĝas marmora memortabulo en la groto de Aggtelek.

La Hungara Fervojista Sekcio vikle kaj aktive kunlaboras sur internacia nivelo, ĉefe en la Terminara Komisiono, dumtempe gvidis la Junularan Sekcion de IFEF kaj jam de multaj jaroj disponigas por IFEF la komitatano A de UEA (unue d-ro Bácskai, poste d-ro Phersy, nun dipl. inĝ. István Gulyás). Deko da kolegoj ricevis altajn ŝtatajn distingojn kaj sociajn rekonojn. Ekde Septembro 1981 en Hungario ekzistas landa sekcio de FISAIC, konsistanta el la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Jam en 1983 la fakta membronombro alproksimiĝas al la magia cifero "mil". Granda evento denove fariĝis la 34a IFEF-Kongreso en Balatonfüred (1982) sub LKK-prez. I. Gulyás. Kaj al la grandioza 68a UK en Budapeŝto (1983) multflanke kontribuis la hungaraj fervojistoj, kiuj disponigis i.a. la vicprezidanton de LKK (d-ro Imre Pethes) kaj multajn helpantojn.

### **Itala Fervoista Esperanto-Asocio (IFEA)**

El la jaroj antaŭ la unua mondmilito ni menciis la unuajn fervojistajn esperantistojn en Italio, inter ili k-gojn Filippi (1906) kaj Nanni (1909). Post tiu milito la 1an de Marto 1922 far k-goj Ottavio La Mura kaj Giuseppe Quarone stariĝis en Torino "Itala Fervoista Esperanto-Asocio", kiu ricevis helpon flanke de la ministerio kaj de la Fervojo. En 1926 la libertempa porfervoista organizo "Dopolavoro Ferroviario" akceptis la Esperanto-grupojn en sia sino. Tiam ankaŭ estis eldonita frazaro por pasaĝeroj.

La postmilita historio komenciĝis en 1947 kun fervojista grupo en Verona, denove ĉe "Dopolavoro Ferroviario". El ĝi en 1950 dekduo da membroj partoprenis la 2an IFEF-kongreson en Salzburg. Sekve de tio oni fondis la nunan IFEA la 17an de Septembro 1950 en Milano. La nova asocio tuj aliĝis al IFEF. Ĉar la fervojistaj Esperanto-grupoj jam antaŭ la fondiĝo de FISAIC estis organizitaj en "Dopolavoro Ferroviario", ili aŭtomate ekde ties membrigo al FISAIC laboras en la kadro de FISAIC (1955) kaj eĉ rajtas okupi unu el la postenoj de vicprezidanto.

Prezidanto de IFEA estis kav. Giuseppe Zacconi de 1952 ĝis sia morto en 1964. La ŝtatestro distingis lin en 1953 pro lia poresperanta agado per la titolo "Kavaliro de la Respubliko". Kiel aliaj pioniroj estu menciataj Gino Corso kaj ing. Otello Nanni. En Junio 1951 ekaperis "Informa Bulteno" sub redaktado de kav. p.i. Germano Gimelli, kiu plenumas tiun taskon de pli ol 30 jaroj apud sia alia agado kiel sekretario (de 1954). En la "Informa Bulteno" estis publikigitaj (1961) terminoj pri lokomotivoj kaj vagonoj. IFEA dumtempe kunlaboris ankaŭ en la Terminara Komisiono de IFEF.

*D-ro István Bácskai. 2.72(f)*

IFEA organizis tri IFEF-kongresojn, nome la 6an en Verona 1954, la 22an en Rimini (1970) kaj la 30an en Roma 1978, krome du IFEF-skisemajnojn (en 1975 kaj 1980). Elstaris la amika helpado de k-go Pasquale Ceci (prezidanto de Dopolavoro Ferroviario en Bologna) dum kaj de post la kongreso de Rimini. Por la organizado de la 40a Universala Kongreso 1955 en Bologna IFEA disponigis la prezidanton kaj unu anon de LKK (Zacconi kaj Gimelli). Laŭ iniciato de IFEA aperas de post Majo 1968 la klarigoj por la pasaĝeroj en la fervoja horaro ankaŭ en Esperanto. Sama teksto troviĝas en la eldonaĵoj por deĵora servo aperantaj dufoje jare. FS eldonis ankaŭ prospekton "En Italio por viaj rendevuoj kun la suno".

Konsiderinde kontribuis IFEA en la nomigo de stratoj laŭ "Zamenhof" resp. "Esperanto" en la urboj Bologna, Voghera, Casalecchio di Reno kaj Castel San Pietro Terme. En la 30a IFEF-kongreso elstaris senatano Del Nero, gvidanto de nove starigita "Interparlamentara Grupo de Amikoj de Esperanto" kun preskaŭ 100 deputitoj kaj senatanoj (iniciatinto d-ro A. Menabene).

### **Japana Espoerantista Ligo Fervojista (JELF)**

**Antaŭhistorio:** Jam en 1911 la japana inĝ. K. Takahaŝi estas menciita en "Fervoja Esperantisto", same en 1929 alia kolego, verŝajne H. Iajima.

JELF estis fondita okaze de la 19a Kongreso de Japanaj Esperantistoj la 17an de Oktobro 1931 en Kyoto. Ĝia organo, 16 paĝa, "La Fervojisto" estis eldonita ĉiumonate de Novembro 1931 ĝis Oktobro 1942. La membronombro kreskis de ĉirkaŭ 100 en 1931 al 249 en 1937, sed poste falis pro la tutmondaj cirkonstancoj ĝis Oktobro 1942 al ĉirkaŭ 50. Grave kontribuis al tiu evoluo la eksplodo de la milito inter Japanio kaj Ĉinio. Sekve la movado estis limigita en ĉiu flanko. Kaj fine en Oktobro 1942 ĝi estis tute sufokita.

#### **Dua epoko de post 1969**

JELF restariĝis okaze de la 56a Kongreso de Japanaj Esperantistoj la 27an de Julio 1969 en Tokyo. Samjare en Novembro okazis fervojista kunveno en la urbo Toyohaŝi. De tiam ĉiujare JELF havas sian kunvenon nomatan "Aŭtuna Renkontigo", pri kiu iam kaj tiam raportas "La Revuo Orienta", organo de Japana Esperanto-Instituto. De 1972 ĝis 1973 JELF faris enketon pri laborkondiĉoj de fervojistoj en la mondo. La respondoj de pli ol dek landoj aperis en sindikataj gazetoj.

IFEF akceptis JELF kiel 20an landan asocion en la 25a IFEF-kongreso la 17an de Majo 1973. En Majo 1978 la unuan fojon du japanaj kolegoj partoprenis en la 30a kongreso de IFEF en Roma. En 1980 JELF havis 21 membrojn, kiuj ĉiuj apartenis al IFEF. Laŭbezone tri aŭ kvarfoje jare aperas "Bulteno de JELF" (ĝis fino de 1981 = 66 numeroj).

*Germano Gimelli. 2.73(f)*

*Naosuke Nobuki alparolas en Roma. 2.73(f)*

## **Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE)**

Jam antaŭ la unua mondmilito ekzistis esperantistaj kolegoj en la regionoj tiam apartenantaj al Aŭstrio, ĉar eĉ la prezidanto de IAEF en la jaro 1911, k-go Jaromir Schwarz, devenis el Sarajevo. Post la milito li nomiĝis Ivanović kaj loĝis en CS.

Nur komence de la dudekaj jaroj oni povas konstati agadon de fervojistaj esperantistoj en Jugoslavio. La ĉefa centro tiam troviĝis en Zagreb. La tieaj kolegoj transprenis en 1924 la gvidadon de IAEF kaj donis al ĝi impulsojn ĝis 1930. Elstaris kiel prezidanto Stevan Stojnić kaj kiel vicprezidanto-sekretario-redaktoro Ilija Puhalo. La internacia organo "La Fervojisto" aperis en Zagreb ĝis 1930. Ankaŭ aliaj kolegoj el Zagreb kaj Beograd tiam apartenis al la estraro de IAEF, ekde 1928 i.a. Ljudevit Prebil, dum Josip Zupanić fariĝis asesoro (landa reprezentanto). Dum la tridekaj jaroj la agado de la esperantistoj ofte suferis pro ŝtataj persekutoj. Dum la militaj jaroj multaj kolegoj batalis inter la partizanoj kaj eĉ pagis per sia vivo.

Post la dua milito Franjo Debić organizis fakan kunvenon kune kun sindikatoj en la 38a UK (Zagreb 1953). En 1954 fondiĝis la societoj en Beograd kaj Zagreb, kio kondukis al fondiĝo de JAFE la 3an de Aprilo 1955. Tuj sekvis aliĝo al IFEF en la kongreso de Zürich (Majo 1955). Ekde 1964 JAFE estas membro de FISAIC pere de ties landa sekcio.

Jam en 1957 JAFE organizis la 9an IFEF-kongreson en Rijeka kaj en 1971 sekvis la 23a en Maribor, ambaŭ tre bonsukcesaj. Krome estas aranĝitaj du internaciaj IFEF-skisemajnoj, nome 1973 sur monto Pohorje kaj 1981 en Bohinj.

Lokaj societoj de la fervojistaj esperantistoj disvastiĝis tra la tuta lando. Ekde 1956 aperas "Jugoslavia Fervojisto" kiel tutlanda komunikilo, parte dumonate, parte dumonate. Foje ĝi estis presita, nun ĝi estas multobligita kun plurkoloraj kovrilpaĝoj. Ĉie estis aranĝitaj kursoj, aperis informaj broŝuroj, prospektoj, lernolibroj, afiŝoj, ekzemple

- Lerno- kaj legolibro de Gvozden Sredić.

- 40 jaroj de Esperanto inter jugoslaviaj fervojistoj de Gradimir Macić.

- Esperanto na JŽ (nacilingva) de Gvozden Sredić.

- Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio de Marinko Djivoje.

- Internacia Konvencio pri fervoja vartrafiko (CIM), tr. Josip Zupanić kaj Ljudevit Sekereš.

- Manlibro pri konversacio en fervoja trafiko (seslingva, i.a. Esperanto), kunaŭtoro G. Sredić. Aldoniĝis kelkfoje vojaĝantaj ekspozicioj.

Dum kelkaj jaroj aperis esperantlingvaj klarigoj en la horaro. Okaze de la 9a kongreso la faka gazeto Železnice publikigis dulingvan numeron. Krome en ĝi kaj ankaŭ en aliaj fakaj gazetoj regule aperas raportoj pri la IFEF-kongresoj kaj resumoj de fakprelegoj. Same regule JAFE raportas al la fervojaj administracio kaj sindikato pri sia laboro kaj IFEF.

Membroj de JAFE jam de multaj jaroj kunlaboras sur internacia nivelo en IFEF. Gvozden Sredić apartenis de 1968 ĝis 1972 kiel vicprezidanto al la unua tutinternacia estraro. Aliaj kunlaboras en la Terminara Komisiono de IFEF En 1973 inĝ. Sekereš transprenis la gvidadon de la Komisiono. Pluaj kunlaborantoj fariĝis J. Ladjević kaj inĝ. Ĉukovski. Kiel redaktoro kaj verkisto elstaris Marinko Djivoje. Okaze de la kongreso Maribor estas eldonita "Fervoja Terminareto" far JAFE kun pli ol 3000 terminoj, prilaborita de k-goj Zupanić kaj Sekereš. En la Somera Universitato de UK Beograd (1973) mag. Sredić prelegis pri la ekonomieco de vartransporto en konteneroj. Li ankaŭ zorgis en 1980 por eldono de ricenhava prospekto de la internacia entrepreno "Intercontainer".

*Mag. Gvozden Sredić. 2.74(f)*

## **Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda (FERN)**

Jam en la jaro 1910 ekzistis lokaj grupoj de fervojistaj esperantistoj. La unua estis la Esperanto-klubo de Fervojistaj Oficistoj en Boxtel. Laŭ "Fervoja Esperantisto" la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj en 1911 anoncis 4 nederlandajn membrojn, inter ili la delegiton J. Bal el Breda.

En la jaroj 1926 kaj 1929 la tiama "La Fervojisto" raportis pri 11 nederlandaj membroj, inter ili asesoro (nacia reprezentanto) A. Pelder el Leiden. La nederlandaj fervojoj NS tiam permesis porti Esperanto-insignon sur la uniformo.

La 22an de Marto 1932 fondiĝis UNFEG (Unua Nederlanda Fervojista Esperanto-Grupo). La propra gazeto nomiĝis "La Verda Lumo". Anoj el ĉi tiu grupo iniciatis fondi FERN kaj IFEF.

La 16an de Septembro 1937 fondiĝis en Utrecht la Esperanto-grupo "Fervojo" (La fluganta Rado).

La fondiĝdato de FERN estas la 14a de Novembro 1946. La aliĝo al IFEF okazis la 4an de Aŭgusto 1948 (fondiĝdato de IFEF).

Pere de la landa fervojista asocio antaŭe BSO, nun BSSO (FISAIC-sekcio nederlanda) nia Rondo estas ekde 1952 membro de FISAIC. Ni ekde 1951 kunlaboras en la Terminara Komisiono de IFEF. Antaŭ tiu tempo la Amsterdama Fervojista Grupo (UNFEG) jam publikigis fervojajn terminojn en sia gazeto "La Verda Lumo".

La Nederlanda Terminara Komisiono laboris (-as) sub gvidado de: ekde 1951 G. Bouwkamp, ekde 1955 J.J. Labordus, ekde 1967 J.A. Harveld kaj ekde 1976 C.A. Broekman.

En 1959 ni publikigis pere de aldonaj folioj en nia gazeto 3000 terminojn.

En 1971 ni eldonis la t.n. Ritterspach-terminareton (E-N-E). Poste ni prilaboris la terminojn el LG II kaj LG III.

Prezidantoj de FERN estis ekde 1946 C.A. Broekman, ekde 1949 J.J. Labordus kaj ekde 1981 estas J. Bultman.

La titolo de nia gazeto estas "Fervojisto". Ĝi regule aperas ekde la monato Decembro 1946. Redaktoroj estis ekde 1946 H. Becker, ekde 1955 G.G.V. Veldhuizen, ekde 1961 W.L. van Leeuwen, ekde 1971 K.G.J. de Jong kaj ekde 1980 estas J. Poptie.

Ni eldonis multege da afiŝoj kaj flugfolioj. Ekspoziciojn ni aranĝis dum la BSO-tagoj 1957-1962, en 1975 kaj 1979 dum la fervojaj sporttagoj en Arnhem kaj dum la inaŭguro de la nova distrikta oficejo de NS en Utrecht CS. (1977). Tie ni donacis al la vizitantoj globkrajonojn, sur kiuj trovigis la nomo de nia Rondo kaj la vorto "Esperanto". Konventempe ni verkas propagandcele artikolojn pri nia Rondo kaj IFEF por la landaj kaj distrikta fervojaj bultenoj.

La membronombroj: 1946: 93, 1947: 157, 1950: 230, 1955: 211, 1960: 141, 1970: 110 kaj 1980: 61.

En la komenco ni havis multajn kursanojn en la buŝaj elementaj kursoj, sed post 1955 en Nederlando la regreso komenciĝis. Multaj fervojaj kulturaj unuiĝoj malaperis. Grava Esperanto-organizo en nia lando havis antaŭ la 2a mondmilito pli ol 6000 anojn kaj nun en 1980 500. En Amsterdam kaj Utrecht okazas daŭrigaj kursoj. Eblas sekvi skriban kurson.

Ni aranĝis 3 IFEF-kongresojn: en 1953, 1966 kaj 1980. La 18a IFEF-kongreso en Utrecht estis la unua, en kiu dum la malfermo ĉiuj gastoj salutis la kongresanojn esperantlingve.

Nia grupo en Zwolle aranĝis de 1952 ĝis 1972 feriosemajnojn, dum kiuj ni instruis Esperanton laŭ la rekta metodo.

Ni plurfoje klopodis havigi Esperanto-klarigojn en la horaro, sed ni ne sukcesis. La fervojo rigardas tion kiel komercan aferon. De 1948 ĝis 1964 FERN disponigis por IFEF kompletan estraron, poste ĝis 1968 kvar estraranojn kaj denove la

*Jaap Labordus. 2.75(f)*

vicprezidanton de 1972 ĝis 1980, krome ĉefkomitatanon de 1964 ĝis 1967.

Honorigoj de niaj membroj flanke de BSSO: 1977: J.J. Laborbus (arĝenta insigno) kaj 1980: W.L. van Leeuwen (arĝenta insigno). Aliaj gravaj eventoj: Ni havas FERN-flagojn, FERN-insignojn kaj FERN-glumarkojn.

Ĉiujare ekde 1947 ni aranĝis jarkunvenon, ekde 1974 kun BEFA. Starigo de Esperanto-monumento en Utrecht (9.9.1966). Laboris por la starigo i.a. la k-joj Bergman, van 't Hoog, Hoogendijk kaj Laborbus. En la Zamenhof-parko en Leeuwarden staras busto de d-ro Zamenhof, skulptita de nia ano D. Blanksma (1976).

### **Norvega Esperanta Fervojista Asocio (NEFA)**

Du norvegaj esperantistoj fervojistaj jam estis menciitaj en 1911 (Fervoja Esperantisto) kaj en 1926 la asesoro (delegito) R. Horrisland el Iveland.

Tuj post 1930 grupo da esperantistoj inter la fervojistoj de Oslo Orienta Stacio komencis pli malpli regule kunveni. Aŭtune 1936 fondiĝis Esperanto-klubo por fervojistoj en Oslo kaj ĉirkaŭaĵo. Inter la iniciatantoj estis Magnus Carlsen kaj Johan Sundhagen. Dum tiu tempo multaj eksterlandaj kolegoj vizitis nian landon, ekz. niaj nederlandaj kolegoj Lok kaj Stapel, kies prelegoj estis granda instigo por pli vigla agado.

Dum la dua mondmilito Esperanto-organizoj estis malpermesitaj en Norvegio. La grupo en Oslo do kase daŭrigis siajn kunvenojn. En Majo 1949 ses norvegaj esperantistaj fervojistoj partoprenis la 1an IFEF-kongreson. Tie ili interkonsentis fondi sekcion de IFEF en Norvegio.

La 4an de Novembro 1949 la fonda kunveno okazis en Oslo. La nova asocio ricevis la nomon "Norvega Esperantista Fervojista Asocio" kaj havis komence proksimume 30 membrojn. La kunveno decidis aliĝi la asocion al IFEF, kio tuj poste efektiviĝis. Prezidanto de nove estis Magnus Carlsen.

Dum la jaroj sekvintaj la asocio helpis al NSB esperantigi turistajn sonfilmojn, aranĝis kursojn, renkontiĝojn kaj eldonis instru- kaj informbroŝurojn. Ankaŭ migra ekspozicio estis starigita. NEFA kuniciatis kelkajn belajn Esperanto-prospektojn de la Ŝtataj Fervojoj kaj de la Norvega Fervoja Muzeo. Ĝi ankaŭ liveris artikolojn por la fervojistaj revuoj. Ekde la jaro 1980 NEFA sukcesis aperi la klarigojn por la pasaĝeroj en la horaro ankaŭ en Esperanto. La fervojo permesis porti la verdan stelon sur la uniformo. La nombro de la anoj kreskis al proksimume 70.

En 1962 Per Johan Krogstie transprenis la funkcion de prezidanto. En 1965 NEFA aranĝis la 17an kongreson de IFEF en Hamar, okaze de kiu estis inaŭgurita Esperanto-strato en Elverum. En Septembro 1968 NEFA eldonis fervojan terminareton, kiun verkis P.J. Krogstie kaj P. Engen. Samjare ekvivis "Norvega Fonduso" kun baza kapitalo de 1000 nKr. Ĝia celo estas, ĉiujare helpi al membroj el nepagipovaj landoj pagi kongres- aŭ membro-kotizon.

NEFA ĉiam havis bonajn kontaktojn kaj bone kunlaboris kun la Norvegaj Ŝtataj Fervojoj, la fervojista sindikato kaj la norvega FISAIC-sekcio, al kiu ĝi apartenas ekde la jaro de ties ekzistado (1969). Tiuj instancoj morale kaj ekonomie subtenas ĝian agadon. Ankaŭ al Norvega Esperantista Ligo la asocio havas bonajn rilatojn. En ĉiu numero de la gazeto de NEL, NEFA havas spacon por sia "Fervojista Paĝo".

NEFA disponigis du IFEF-estraranojn, nome P.J. Krogstie kiel redaktoron (1968-1974) kaj ekde 1980 la vicprezidanton P. Engen.

*Per Johan Krogstie. 2.76(f)*

## **Landa Fervojista Sekcio de Pola Esperanto-Asocio**

Polaj kolegoj tre frue, nome en 1911, sufiĉe multnombre interesiĝis pri la faka movado. "Fervoja Esperantisto" menciis en 1911 jam 21 membrojn de IAEF, inter ili F. Sandecki, kiu apartenis eĉ al la unua internacia estraro. Iliaj nomoj ĉiuj aperis sub "Rusujo", al kiu la pola tereno siatempe apartenis, sed eĉ ne unu vera ruso estis en tiu adresaro.

Pri la tempo inter la militoj nur estas konate, ke en 1926 ekzistis asesoro (landa delegito) Josef Kucharz kaj por 1929 la internacia organo anoncis 3 polajn membrojn. Tio ne ekskludas, ke entute ekzistis pli granda nombro da fervojistaj esperantistoj en Pollando. Kiel daton por la naskiĝo de postmilita fakmovado oni povas rigardi la 6an de Oktobro 1957, kiam Erasm Nawrowski fondis la unuan lokan fervojistan Esperanto-grupon en Gdansk. Poste ankaŭ fondiĝis fervojistaj Esperanto-rondoj en aliaj urboj. La nova organizo nomis sin Pola Fervojista EsperantoFakgrupo (PFEF). En 1959 ĝi aliĝis al IFEF, unue kun 8, ekde 1961 kun 25 personoj. Pli poste PFEF atingis 112 membrojn.

Dum la aktiva tempo de PFEF, E. Nawrowski iniciatis, ke pola transoceana frajtiŝipo ricevis la nomon "M/S Zamenhof" (12.7.1959). Same en 1959 en Sopot estis plantita Esperanto-kverko, en Gdynia, Sopot kaj Wejherowo inaŭguritaj Zamenhof-stratoj. Ankaŭ esperantlingvaj klarigoj por pasaĝeroj troviĝas en la fervoja horaro.

Kelkaj klopodoj, translokigi la gvidadon de PFEF al Warszawa, fiaskis. En la jaro 1973 PFEF ĉesis sian ekzistadon kiel organizo, por pli poste esti nove organizita en la kadro de Pola Esperanto-Asocio. El tiu evoluo rezultis, ke la kotizoj, pagitaj de la fervojistoj, ne plu atingis la IFEF kasiston. Tio fine kondukis al eksciĝo de la praktike ne plu ekzistanta pola landa asocio el IFEF en la 28a IFEF-kongreso 1976. En 1977 PEA organizis enketon, por konstati la nombron de fervojistaj esperantistoj. Sed la intereso ne estis tro granda. Same en 1977 la kotizoj por 1974-75 fine atingis la kasiston. Sed spite al kelkjaraj klopodoj flanke de IFEF, eĉ kun helpo de UEA, daŭris ĝis 1979, kiam la 16an de Julio nova pola landa asocio kun 20 membroj aliĝis al IFEF. Ĝi eklaboris en la kadro de PEA.

Dum la sekvintaj jaroj la situacio tamen restis iom neklara. La statuso de "Landa asocio" ekzistis ĉefe el vidpunkto de IFEF, dum la membraro en Pollando mem estis organizita en lokaj rondoj en la kadro de PEA. En Majo 1982 grupo da ĉ. 40 polaj gekolegoj vizitis la 34an IFEF-kongreson en Balatonfüred. Ili havis apartan kunsidon kun la IFEF-estraro.

Baldaŭ poste, la 5an de Junio 1982, fondiĝis en Bydgoszcz "Landa Fervojista Sekcio de PEA" kun sepka estraro kaj ĉ. 300 membroj sub prezidanto Czeslaw Holz.

Okaze de la 2a Renkonto de Polaj Fervojistoj esperantistaj en Opole la 29.10.1983 elektis nova estraro sub prez. Wieslaw Różankowski.

## **Sveda Esperanta Fervojista Asocio (SEFA)**

Jam en 1911 la internacia organo de IAEF menciis 11 svedajn kolegojn. En 1925 oni fondis lokan societeton "Stockholma Fervojista Esperanto-Klubo" kun prezidanto Ernst Eriksson. La klubo laboris en la kadro de tiam IAEF. Eriksson ankaŭ estis sveda asesoro por IAEF, kiun li persone kelkfoje konsiderinde subvenciis ekonomie.

La sveda sekcio de IFEF, SEFA, fondiĝis en la jaro 1951. E. Eriksson tiam vokis la stokholmajn esperantistajn kolegojn al la fondkunveno. Prezidanto farigis Hj. Olsson, ekde 1963 R. Palmgren, ekde 1968 E. Rausek. Membronombro en 1951: 25, 1964: 191, 1981: 118. Depost 1955 SEFA apartenas al la Sveda Fervojista Libertempa Asocio (Sv. J.F.), kiu 1958 aliĝis kiel landa sekcio al FISAIC. Tio estas por SEFA tre favora, morale kaj ekonomie.

SEFA aranĝis du IFEF-kongresojn, la 8an en Stockholm 1956 kaj 20 jarojn poste la 28an en Skellefteå 1976. LKK-prezidantoj estis Hj. Olsson resp. Y. Forslund.

Por informado kaj varbado SEFA kutime uzis la materialon, kiu ekzistis ĉe la lokaj kluboj, al kiuj la membroj apartenas. Ekspozicioj estis aranĝitaj kadre de la sveda FISAIC-sekcio. Kursoj okazas private, sed SEFA repagas la kursmaterialon.

De post 1968 SEFA neregule eldonis por la membraro propran organon, nomitan "INFORMILO" kun informoj en sveda aŭ

esperanta lingvoj. Iniciatinto kaj prizorganto de la gazeto estas la sekretario Erik Bengtsson, Helsingborg.

Terminara laboro: Jam en 1955 la k-joj Harry Bengtsson, Hj. Olsson kaj B. Agren komencis labori por sveda terminaro. 1964 mortis Agren kaj 1967 Olsson. Post tio H. Bengtsson sola devis pretigi la laboron, kio estis tre malfacila. Fine terminaro S-E-S povis aperi en la 28a IFEF-kongreso en Skellefteå 1976, ellaborita de Harry Bengtsson.

### **Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF)**

Kvar svisaj kolegoj jam en 1911 estas menciitaj kiel membroj de la internacia IAEF. Sed la fondo de SAEF datiĝis de la 16a de Septembro 1925 en Bern. Prezidanto fariĝis Jules Perlet, kiu ankaŭ agadis kiel asesoro (landa delegito) en IAEF. Jam en la sama jaro la nova asocio atingis, ke la fervojo subvenciis Esperanto-kursojn. Sekvis en 1926 mapo de Svisio kun Esperanto-tekstoj kaj prospekto de la Bern-Lotschberg-Simplon-Fervojo. La Ŝtataj Fervojoj elektis la vorton "Fervojo" kiel telegram-adreso, kiu eĉ nuntempe validas. En 1929 kreiĝis speciala insigno. IAEF tiam anoncis 29 svisajn membrojn.

Sed 1929 estis ankaŭ la jaro, kiam SAEF el IAEF eksiĝis kaj post disfalo de IAEF (1930) aliĝis en 1931 al nova internacia unuiĝo de Esperanto-fervojistoj en la kadro de la Internacia Transport-Laborista Federacio. Neeviteble ankaŭ en Svisio la tiamaj politikaj cirkonstancoj kiel ĉie en Eŭropo kondukis al negativaj sekvoj por SAEF, kiu en 1937 transformiĝis al "Svisa Amikaro de Esperanto- Fervojistoj" kaj tiel transvivis la militajn jarojn.

Poste en 1947 svisaj fervojistoj kunlaboris en UK Bern. La svisa k-go Emil Keiser partoprenis en la fondkunveno de IFEF (1948). Post tio li kaj Hans Bipp sukcesis, starigi denove solidan asocion, tiel ke ekde la unua IFEF-kongreso SAEF ĉiam estis reprezentita. La membronombro kreskis de 26 en 1950 al 100 en 1960, kaj de tiam moviĝas eirkaŭ 100.

Regule okazis kursoj en pluraj regionoj. La fervojo disponigis instruejojn. En kelkaj stacioj estis instalitaj informkestoĵoj. Kiel informiloj por la membroj servis sporadaj cirkuleroj, la IFEF-Bulteno kaj ekde 1961 dufoje jare paĝo en "La Svisa Espero" (redaktoro Otto Walder). Krome ekde Januaro 1958 aperas propra "Svisa Fervojisto", eldonata 4 foje jare. Entute SAEF publikigis multe da artikoloj en la porfervojista gazetaro, eldonis afiŝojn, varbilojn, aranĝis ekspoziciojn kaj kursojn, ankaŭ korespondajn, en germana, franca kaj itala lingvoj. Sole en 1975 aperis 45 artikoloj en ĉiuj tri lingvoj verkitaj de SAEF-anoj. Elstaris Kurt Greutert kiel longjara prezidanto kaj redaktoro.

SAEF organizis la 7an (1965) kaj la 24an (1972) IFEF-kongresojn en Zürich resp. Lugano. De post 1958 la asocio okazigis 18 Internaciajn Ferio-Semajnojn (parte kun trigradaj kursoj), kiujn ĉefe organizis k-go Hans Hunkeler.

*Harry Bengtsson. 2.78(f)*

*Kurt Greutert. 2.78(f)*

La 1-an de Januaro 1954 ekfunkciis la svisa landa sekcio de FISAIC, kiun SAEF kunfondis kaj en kiu ĝi dekomence kunlaboris.

Dum jaroj SAEF disponigis kunlaborantojn al IFEF, nome O. Walder kiel vicprezidanton (1964-1968) kaj kasisiston (1968-1974) kaj K. Greutert kiel ĉefkomitatano (1967-1977), same por la Terminara Komisiono (kgojn Bipp kaj Hunkeler). La kunlaboro kun Svisa Esperanto-Societo estis ĉiam bona. En la Universalaj kongresoj de Bern (1939 kaj 1947) plej aktive kunlaboris O. Walder, en la UK Luzern (1979) K. Greutert eĉ kiel LKK-prezidanto. Laŭ persona iniciato de O. Walder, la strato da lia logejo en Septembro 1965 estis nomita "Esperantoweg".

La svisa FISAIC-sekcio nomumis Hans Bipp Honora Membro en 1978, Otto Walder fariĝis Honora Membro de Svisa Esperanto-Societo.

#### I F E F - KONGRESOJ

n-ro	jaro	loko	lando	LKK-prezidanto	kongresanoj	el landoj
1	1949	Aarhus	DK	Thorsted	149	8
2	1950	Salzburg	A	Steidl	395	9
3	1951	Paris	F	Lemonnier	400	11
4	1952	Lindau	D	Pape	450	11
5	1953	Utrecht	NL	Labordus	403	12
6	1954	Verona	I	Ceroni-Bassani	583	14
7	1955	Zürich	CH	Bipp, H.	263	13
8	1956	Stockholm	S	Olsson	373	12
9	1957	Rijeka	YU	Kaksić	459	14
10	1958	Aarhus	DK	Kensing	376	15
11	1959	Linz	A	dipl. ing. Tschom	484	17
12	1960	Helsinki	SF	mag. Narvala	282	13
13	1961	Barcelona	E	Saladrigas	750	13
14	1962	Budapest	H	d-ro Bácskai	1004	17
15	1963	Stoke-on-Trent	GB	Barks	400	17
16	1964	Bruselo	B	De Duytsche	420	14
17	1965	Hamar	N	Krogstie	430	17
18	1966	Utrecht	NL	Labordus	340	18
19	1967	Fulda	D	Giessner	430	20
20	1968	Varna	BG	Dolapčiev	815	22
21	1969	Avignon	F	Motto	523	19
22	1970	Rimini	I	kav. Gimelli	701	20
23	1971	Maribor	YU	Pratnemer	710	18
24	1972	Lugano	CH	Tognini	660	18
25	1973	Aarhus	DK	Kensing	502	18
26	1974	Tarragona	E	Gimenez	648	17
27	1975	Villach	A	ing. Huber	675	20
28	1976	Skellefteå	S	Forslund	482	19
29	1977	Swanwick	GB	Barks	346 *)	17
30	1978	Roma	I	d-ro Menabene	350	18
31	1979	Turku	SF	mag. Narvala	354	20
32	1980	America	NL	Labordus	290	17
33	1981	Regensburg	D	Giessner	515	18
34	1982	Balatonfüred	H	dipl. ing. Gulyás	605	22
35	1983	Oostende	B	de Sutter	435	19
36	1984	Burgas	BG	Marinov		

\*) limigita pro disponeblaj lokoj



## Organiza Skemo

pri la Internacia Fervoĵista Esperanto-Movado

- A) Periodoj de 1909 ĝis 1919 kaj de 1920 ĝis 1930 sub nomo Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervoĵistoj (IAEF); poste ĝis 1945 Internacia Federacio de Esperantaj Trafikaj Transportlaboristoj (IFETT),
- B) Periodo de 1945 ĝis 1984 sub nomoj Internacia Federacio de Esperantistaj Fervoĵistoj (ĝis 1953), Internacia Federacio Esperantista Fervoĵista (ĝis 1963), de tiam Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEF).

	IFEF	
--	------	--

	Estraro (gvidinstanco) prezidanto, vicprezidanto, sekretario, kasisto, redaktoro	
		Federacia Organo

	Komitato (decida instanco) komitatanoj delegitaj de la landaj asocioj - unu el ili estas ĉefkomitatano	
--	---	--

Fakaj Komisionoj Terminara Fake Aplika
---

Junulara Sekcio
-----------------

Koresponda Servo
------------------

Komitatano A de UEA
---------------------

Terminara Kuriero
-------------------

Membrokategorioj			
Asociaj Membroj de la aliĝintaj landaj asocioj (19)	Individuaj Membroj	Honoraj Membroj	Membroj de la Honora Patrona Komitato

FISAIC
16 landaj IFEF-asocioj estas membroj de la Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervoĵistoj

UEA
IFEF estas Aliĝinta Asocio de Universala Esperanto-Asocio

SAT
IFEF estas subtenanta membro de Sennacieca Asocio Tutmonda

IEMW
IFEF kunlaboras kun la Internacia Esperanto-Muzeo Wien